

OMAGĜE AL Kálmán Kalocsay

El Abaújszántó ĝis Esperanta Parnaso

SEPA VOLUMO

(rekonstituita sen bildoj)

ĈAPITRO 14

KALOCSY EN LA ESPERANTA MOVADO

14.1 Enkonduko

Multaj riproĉis al Kalocsay pro tio, ke li malofte vizitis esperantajn aranĝojn kaj sidis kvazaŭ "en ebura turo" fore de la verda popolo. La movadan laboron de Kalocsay ili komparis al tiu de Baghy, kiu estis tre populara kaj ĉiam dorlotata de la publiko.

— *Mi havis ankaŭ alian profesion krom Eperanto* — diris foje Kalocsay — *do mi ne povis min tiel multe movi inter esperantistoj. Mi ne estis Cseh-instruisto kiel Baghy, Morariu aŭ Lidja Zamenhof, kiuj portadis sin tra la tuta mondo kaj konatiĝis sin.*

Vere la grava profesio, hospitala deĵorado, verkado de medicina fakliteraturo kaj kultivo de la Esperanta literaturo konsumis ĉiujn tempon kaj forton de Kalocsay. Ankaŭ al la redaktoraĵoj li dediĉis sennombrajn horojn, ĉar sendepende de tio, kies nomo rolis sur la titolpaĝoj de LM aŭ HV, la leonan parton de la laboro plenumis ĉiam Kalocsay. Tiu laboro malpli ŝarĝis la poeto-fraton Baghy, kiu povis intense partopreni en la movado. Krome lia ĉarma persononeco, aktora talento kaj ekstera aspekto altiris la homojn, precipe virinojn, kaj — kiel iu skribis ie — *Baghy ne unufoje larmigis virinojn ne nur per siaj kortuŝaj verkoj.* En lia poŝo ĉiam troviĝis Baghy-portretoj, kiujn la "Kara Paĉjo" volonte donacis kaj dediĉis al beletaj virinoj. *Jes* — rimarkis foje Kalocsay — *Baghy estis papilio.* Oni babilas — ĉu estis vere, ĉu klaĉo? Kiam Baghy jam agoniis, du adorantoj aranĝis laŭtan scenon en la koridoro de la hospitalo: kiu estis la ĉefa Muzo de la poeto, kiu rajtas sidi ĉe la mortolito?

Revenante al Kalocsay.

Estas fakto, ke dum siaj lastaj jaroj Kalocsay tre malofte estis videbla antaŭ publiko. Grava malsano devigis lin retiriĝi, sed ne "en eburan turon", nur en la Nyúl-stratan hejmon. Tamen Kalocsay neniam disiĝis de la movado. Li havis kontakton ne nur kun verkistoj pere de larĝa korespondaĵo, sed ankaŭ kun funkciuloj, kiuj regule vizitis kaj informis lin pri la aferoj. La vizitantoj ricevis de li konsilojn, helpon kaj ne unufoje bonajn ideojn kaj kuraĝigon.

Esplorante la tiutempajn gazetojn, evidentiĝas, ke Kalocsay fervore laboris ankaŭ en la

movado: instruis, organizis, deklamis, rolis teatraĵon, plenumis diversajn funkciojn, sed lian ĉi-rilatan brilon paligis la verkista mondfamo.

Laŭ la registritaj indikoj Kalocsay ofte voĉlegis poemojn antaŭ hungara aŭ internacia publiko. Li opiniis, ke *la poezio havas gravan rolon ankaŭ en la movado. La esperantistoj bezonas la poezion por ĉerpi el ĝi entuziasmon, amuzon kaj praktikon.*

Li ĝisfunde konis la prezentitajn temojn, kio, kaj lia neordinara memorkapablo ebligis, ke li prelegis plej ofte parkere. Tiel li povis legi de sur la vizaĝo de la ĉeestantoj kaj adaptis la paroladon al la situacio. Estas nedubebla fakto, ke tiu ĉi preleg-maniero ĝenerale estas pli interesa ol la voĉlegado, sed por la posteuloj estas granda perdo, ĉar certe valoraj prelegoj ne estas konservitaj. Nur kelkajn titolojn el ili:

La poeziaĵo de Sándor Petőfi en la Esperanta literaturo (1948).

La humoraĵo de Raymond Schwartz (1961).

Leo Belmont (1962).

La vivo kaj verkado de Devjatnin okaze de lia centjara naskiĝdatreveno (1962).

Pri la unua jardeko de la Esperanta literaturo (1964).

La poeziaĵo de Dante Alighieri (1964).

Pri la prelegoj, kiujn Kalocsay destinis por vasta internacia publiko, pretiĝis tajpitaj folioj. Bedaŭrinde ankaŭ el ili mankas kelkaj. Ĉu la dua mondmilito, la revolucio (en 1956), aŭ la nezorgemo pereigis ilin? Demando, hodiaŭ jam nerespondebla.

Jen la malaperintaj pecoj:

La vorto en Esperanto (Somera Universitato, Paris, 1932).

Iom da gramatiko (Bern, 28.07.1947).

La Esperanta literaturo kaj ĝia signifo (Somera Esperanto-Universitato, Gyula, 1962).

El la malaperintaj (ĉu ie kaŝiĝintaj?) manuskriptoj ni pleje priploras la lastan, kiun — anstataŭ la malsana Kalocsay — voĉlegis Paŭlo Balkányi. Li ĝenerale zorge gardis ĉiujn esperantaĵojn, sed ĉi tiu grava peco ne troviĝas en liaj postlasitaj paperoj. Ĝi malaperis en Hungarujo, dum kvietaj, sentempestaj jaroj.

El la prelegoj de Kalocsay sep pecojn vere en la lasta momento oni sukcesis savi por la estonto.²⁷⁵

(275) Vd en: DPr p. 103-104.

ESPERANTAJ POSTENOJ DE KALOCSAY

Hungarlanda Esperanto-Societo

Komitatano 1919-1920, 1924-1931, 1947-1949
Sekretario 1919-1920
Vicprezidanto 1920-1924
Honora membro 1931-1943
Kunprezidanto 1937
Prezidanto 1938-1941
Honora prezidanto 1943

Hungara Esperanto Propaganda Komitato

Afergvida direktoro 1920

Lingva Komitato

Membro 1922-1948

Hungara Oficista Esperanta Ligo

Vicprezidanto 1927-1928

Hungarlanda Ekzamena Komitato

Membro 1933-

Hungara Esperanto-Federacio

Kunprezidanto 1936-1942

Hungara Esperanta Pedagogia Societo

Prezidanto 1937-1939
Honora membro 1941-1944

Akademio de Esperanto

Membro 1949-1976

Hungarlanda Esperanto Konsilantaro

Vicprezidanto 1955-1960

Konkordo Esperanto-Fakgrupo

Prezidanto 1958-1969
Honora prezidanto 1969-1976

Hungara Esperanto-Asocio

Komitatano 1960-1969
Honora prezidanto 1969-1976

* * *

14.2 Kiam, kial kaj kiel mi lernis Esperanton?

Mi lernis la lingvon dum la somero de 1912. Kun mia amiko, Ludoviko. Győry-Nagy, mi promenis sur la ĉefstrato de Miskolc, kaj en la montrofenestro ni ekvidis Esperantogramatikon. Mi jam ne memoras kiu el ni proponis la eklernon, sufiĉe, ke ni tuj interkonsentis. Kial? Se mi bone memoras, sole pro scivolo pri la strukturo de artefarita lingvo, do pro pure lingvistika interesiĝo. Post unumonata reciproka instruado diligenta ni jam komencis grandan konkurson — pri poŝtmark-kolektadon (kompreneble: poŝtmarko bildflanke). Ni ekkorespondis kun la tuta mondo. Kaj la kurson gajnis — ne ni, sed tria persono, nia komuna amiko kaj instruato, al kiu ni liveris la korespondajn tekstoskemojn, kaj kiu — ĝis hodiaŭ ne lernis Esperanton. Mi senreviĝis pri la poŝtmark-kolektado, mi volis min nun perfektigi en la lingvo.

Nu — plej bone oni lernas instruante: Mi preparolis mia amiko kursgvidadon dum la somero 1913. Nia neforgesebla Giesswein,²⁷⁶ laŭ niaj petoj, vojaĝis al Miskolc, faris propagandan paroladon, kaj ĝin sekvis nia kurso. Mi bone memoras, kiel ni timis fiaskon de la propaganda parolado en la somera morta sezono, kiel ni iris kaleŝe de domo al domo por varbi publikon per persona persvado. Sed tiamaniere ni sukcesis kuntrumpeti vere rekordan publikon. La kurso estis la kutima kurso Esperanta: multaj komencantoj, malmultaj finantoj. Ĝi estis certe plej efika por mi mem, je la fino mi jam sentis min tute certa en la lingvo. Kaj miaj lingvistikaj interesoj ne lasis min ripozi. Avide mi legis ĉion rilatan al la lingvaj problemoj, mi kritikis la lingvon, havis reformideojn, kaj fine mi bele atingis la bluajn bordojn de Ido. Mi lernis ĝin. Poste mi komencis fari verstradukojn, samtempe en Esperanto kaj Ido. Surprizis min la granda natureco, fleksiĝemo, elasteco, versebleco de Esperanto, dum Idon mi trovis nenatura, rigida, seka, tro artefarita. Ofte mi devis fari, kiel poezian permeson, deflankiĝon de la rigidaj Idaj derivreguloj, kaj per tio nevole reveni al Esperantaj formoj. Fine, kiam mi eksciis, ke mia Ido jam estas neekzistanta lingvo, ĉar dumtempe oni definitive fiksas Idon en alian formon, ol mi lernis ĝin el mia lernolibro, mi decidis, ne lerni plu ĉi tiun novan formon kaj resti definitiva esperantisto.

Poste venis la milito kaj Esperanto por mi tute eksilentis. Ĝi eksilentis, dormis, sed ne mortis. En 1918 reveninte al Budapeŝto, mi tuj reaŭdis ĝian voĉon en mia animo. Kaj de tiam — sed tio ĉi jam ne apartenas al ĉi tiu temo.²⁷⁷

K. Kalocsay.

Lajos Győry-Nagy rakontis:

Por certigi la sukceson de nia kurso, ni ambaŭ vizitis ĉe Sándor Giesswein kaj petis lin al la malfermo de la kurso. Li konsentis, sed menciis, ke li volas paroli en konvenaejo kaj antaŭ multnombra publiko. Mia aŭdaca respondo estis, ke li ricevos por la prelego la grandan salonon de la urbodomo, lin akceptos la urbestro ĉe la stacidomo, kaj la urba ĉevaljungaĵo portos lin al lia loĝejo, ktp. Kolomano paliĝadis dum miaj promesoj kaj kiam ni ŝanceliĝante atingis la koridoron, nur tion li diris al mi: "Kion vi faris, vi malfeliĉulo?!" Tamen plenumiĝis ĉio, nur anstataŭ la urbestro, la vicurbestro atendis diron Giesswein ĉe la stacidomo. La parolado de la altranga gasto okazis inter solenaj cirkonstancoj.

²⁷⁶ D-ro Sándor/Aleksandro Giesswein (1856-1923) estis papa prelato, progresema politikisto, parlamentano kaj prezidanto de HES inter 1912-1923).

²⁷⁷ En: Hungara Heroldo 3. 1930:4, p. 3-4; Bulteno (HEK) 1958:4, p. 83; Eventoj 1992: Julio (2). 0010, p. 8.

Esperanto kurso en Miskolc, 1913

Meze sidas K. Kalocsay kaj maldekstre de li L. Győry-Nagy kursgvidantoj.
La flageton tenas Sándor Venetianer/Vándor, poste renoma komponisto kaj
ĥorestro. Li iĝis viktimo de la faŝismo. En Budapeŝt strato gardas lian
nomon.

Ĉi tiu bildo estas la unua, kiu prezentas Kolomanon Kalocsay en Esperanto-rondo.

*

Dum la jaroj 1914-1918 pro la unua mondmilito kaj universitataj studoj Kalocsay ne povis intense okupiĝi pri Esperanto. Tamen — kiel li rakontis — li kunportis al la batalkampo Esperanta-Germana vortaron, gramatikan libron pri Ido kaj la verkon de Saussure, en kiu li diskutas kun la Ido-patroj pri la vortfarado.

14.3 (1919)

Post la mondmilito — skribas Paŭlo Balkányi en sia memuaro — mi konatiĝis kun Kálmán. Ni baldaŭ fariĝis amikoj, kaj li denove interesiĝis pri Esperanto. Li scivolis: ĉu eblas traduki hungaran poemon al la Internacia Lingvo? Vidinte tian eblecon, li komencis kultivi la Esperanto-poeziaĵon, kaj mi sukcesis entiri lin ankaŭ en la movadon.

En Hungario post la milito kaj dum la Konsilia Respubliko (1919.03.31. — 1919.07.31.) malfermis novaj ebloj por la E-movado. Fondiĝis *Propaganda Komitato de l' Lingvo Internacia*, kies membroj estis kelkaj konataj hungaraj verkistoj, profesoroj. La du societoj: HES kaj HESL laboris kune. Aperis *Hungara Esperantisto*, kio fariĝis oficiala organo de HES.

Kunveno de Esperantistoj

Antaŭ la barelo staras P. Balkányi (en soldata uniformo).

Dekstre staras Kalocsay (same en soldata uniformo).

La grizharulo sidanta ĉe la tablo estas Samu Patai.

Foto 1919

Je mia peto Kalocsay tradukis la komunistan kanton: *La Internacio*, kiun la *Hungarlanda Esperantista Societo Laborista* instigis eldoni sur poŝtkarto. Eble ĉi tiu estis la unua Esperanta poezia teksto de Kalocsay aperinta multobligite. La kanton ni kantis publike la 1-an de junio 1919 en la liberaera teatro *Aquincum*,²⁷⁸ okaze de la 32-a datreveno de apero de la unua Esperanto-lernolibro. En la aranĝaĵo ĉeestis 150 personoj. Kalocsay ne ĉeestis.

La unua strofo de *La Internacio*

Manuskripto de Kalocsay.

Flugfolio 1919

— Post la falo de la *Konsilia Respubliko*, momenta malfortiĝo, la E-movado revigligis.

— La 3-an de oktobro Kalocsay prezentis siajn poemtradukojn el hungaraj poetoj kaj hungarajn popolbaladojn.

— En la *Socia Muzeo* la 17-an de oktobro okazis la *I-a Literatura Vespero*. La plej sinceran sukceson akiris dro Kalocsay per liaj bonegaj tradukaĵoj el la poemaro de famaj hungaraj poetoj: Kölcsey, Arany, Vörösmarty, Petőfi, Vajda, Babits kaj precipe el hungaraj popolbaladoj kaj popolkantoj. Proksimume 70-80 esp-istoj ĉeestis tiun ĉi brilan sukceson... Oni esperas, ke la geniaj tradukoj de Kalocsay baldaŭ aperos en libroforme, por ke ĉiu esperantisto povu ekkoni kaj ĝui la majstrajn tradukojn el la perlo de hungara poemaro.

(HE 1919:Novembro, p. 10.)

— La 31-an de oktobro Kalocsay voĉlegis novajn poemojn.

— La 3-an de novembro en la *Socia Muzeo* estis aranĝita la *II-a Literatura Vespero*. Ĉeestis ĉ. 50 personoj. La programo estis: *El finna literaturo kaj poezio*. Kalocsay por tiu vespero verkita prologo²⁷⁹ malfermis la laŭtleĝadon. La plej grandan sukceson atingis la finnaj poemoj kun hungaraj tradukoj de Kalocsay. Tiuj pruvis, ke li estas ankaŭ bonega hungara poeto. (HE 1919:Novembro, p. 9.)

Invitilo por la *Literatura Vespero*

El la prezentitaj poemoj plej grandan aplaŭdon ricevis la *Kanto de Suomi* de E. von Oventen. La svedlingvan poemon Hilma Hall tradukis al Esperanto.²⁸⁰ Laŭ tiu teksto faris Kalocsay la hungaran tradukon:

KANTO DE SUOMI

Aŭdu kiel kanto sonas
Kantele de Vaino tonas
jen la Suomi-kant'!
Aŭdu la pinar-bruadon
Kaj la akvofal-muĝadon:
jen la Suomi-kant'!

A SZUOMI DAL

Hallga: bŭvös szók remegnek,
Dala kél mohlepte hegynek:
Ím a Szuomi dal!
Hallga: zengnek hímes völgyek,
Fenyők zúgnak, vízesések:
Ím a Szuomi dal!

— La *III-a Literatura Vespero* okazis la 24-an de novembro. Kalocsay prelegis hungarlingve pri la Esperanta poezio. Oni deklamis el la originalaj poemoj de Zamenhof, Grabowski, Schulhof, Privat, Hankel kaj Kalocsay. Plej grandan entuziasmon vekis la poemoj de Kalocsay, precipe la *Sonoriloludo*. (HE 1919:Decembro, p. 13.)

*

— Kalocsay gvidas progresan Esperanto-kurson.

— La *IV-a Literatura Vespero* la 15-an de decembro estis dediĉita al la memoro de Zamenhof.

"... La unua parto de la vespero finiĝis per elokventa deklamo de Kolomano de Kalocsay: *Al la naskitago de Zamenhof en la jaro 1919*. Tiu belega poemo jam aperis en *Hungara Esperantisto*... Ankaŭ ĉi-okaze Kalocsay laŭtlegis belegan, entuziasman paroladon tradukitan el la parolo de Prof. Ghez pri la venkiro de Esperanto. Tiu ĉi laŭtlegado kaj ni atentigas la samideanojn, se okaze ili aranĝos ian propagand- aŭ festvesperojn, prunteprenu tiujn ĉi tekstojn kaj uzu ilin, ĉar multe pli bonaj certe ne estas fareblaj.

La vesperfesteno havis nur unu mankon: la ĉambrego ne estis hejtita — tio estas: oni hejtis en la forno, sed la ĉambrego ne varmiĝis. Des pli bela estis de la prelegantoj, ke pro la festeno ili deklamis kaj laŭtlegis sen surtuto. Ja, Esperantismo hejtis ilin!" (HE 1920:Januaro, p. 7.)

*

— "Hungario — Budapeŝto: Malgraŭ la renverso de ĉiuj Esp. entreprenoj, kaŭzita de la registara ŝanĝo, kursoj kaj kunvenoj okazas. Tiel 70 personoj vizitis la literaturan vesperon, kie S-ro Giesswein paroladis, kaj S-ro Kalocsay, hungara poeto, legis siajn Esp. versaĵojn..." (Esperanto 1919:12, p. 203.)

— La 19-an de decembro la komitatkunsido de HES — laŭ la propono de Paŭlo Balkányi — komisiis Kolomanon Kalocsay esti provizora sekretario. Pri la kunsido detale raportis Kalocsay.²⁸¹

278 Ruinoj de la iama Romia urbo.

279 La prolog-poemo *La renkonto de kantoj* en STREĈITA KORDO p.19-20 (datumita 1921).

280 En: La Verda Standardo 1914:Decembro, p. 163.

281 En: HE 1920:Januaro, p. 3.

* * *

14.4 (1920)

La 20-an de februaro kunsidis la *Komitato de Disvastigado de la Internacia Lingvo*.

Kalocsay opiniis necese, ke ankaŭ la nomo de la Komitato esprimu pri klare, ke temas pri Esperanto, ĉar tiu vivanta lingvo estas la sole konvena kiel internacia lingvo. La nomon — proponitan de Kalocsay — *Hungara Esperanto-Propaganda Komitato* la ĉeestantoj unuanime akceptis.

Laŭ la propono de Paŭlo Balkányi oni elektis d-ron Kalocsay afergvida direktoro de la Komitato.

La hungarlingvan protokolon pri la kunsido faris Kalocsay.

La manskribita dokumento
estas valora relikvo de la
KAL-ĈI Dokumentaro

*

—"La temo de la *V-a Literatura Vespero* estis: <Bonhumore en Esperantujo>. Ĝi ne estis vizitata. Preskaŭ nur la kunludantoj ĉeestis kaj amuzis tre bonhumore kaj familie inter si... Kalocsay laŭtlegis poemon kaj humoraĵon. La ĉeestantoj bedaŭris tiujn, kiuj ne ĉeestis."

(HE 1920:Februaro, p. 2.)

—"Oni fondis <*Esperantan Kameron*> en la *Socia Muzeo* (Eötvös u. 3.), ties celo estas la propagando... Oni elektis por prezidanto dron L. Loránd, por ĝeneralaj kaj kulturaj aferoj dron K. de Kalocsay." (P. B.)

— En majo okazis estrarelekto de HES. Inter la nomoj de la komitatanoj troviĝas ankaŭ tiu de Kalocsay.

Esperanto-tago la 16-17-an de majo
En la organiza laboro partoprenis ankaŭ Kalocsay.

Dro Loránd malfermis la kunsidon, post li Dro Kolomano Kalocsay hungare parolis pri la historio de Esperanto. Post mallonga paŭzo oni malfermis la jaran ĝeneral-kunsidon de *Hungarlanda Esperanto-Societo*. Dro Kalocsay laŭtlegis la sekretarian raporton pri la lastaj monatoj.

Posttagmeze okazis hungarlingva kabareto, aranĝita de sro Endre Hevesi. La plej grandan sukceson atingis la duakta teatraĵo de Dro Kolomano Kalocsay *Ĉu Li aŭ Ŝi?*²⁸² Espereble ĝi aperos libroforme, ĉar ĝi estas ludinda kaj leginda ankaŭ por la tutmonda esperantistaro. Al la teatraĵo skribis Dro Kalocsay por la neesperantista publiko hungaran prologon.

(HE 1920:Majo-Junio, p. 6, 8.)

*

Zamenhofa-vespero

"La 17-an de vendrede post la duono de la sesa pleniĝis la ĉambrego de *Socia Muzeo...* Jozefo Major *diris la faman poemon de Dro K. Kalocsay: Al la naskotago de Zamenhof*, kiu ĵus aperis en *Esperanto Triumfonta*. Post la paŭzo, la jam de longe ne vidita Dro Kalocsay deklamis poemon speciale verkita por morttago de Zamenhof: *Funebra fest'*. Ĝi sonis, sed ĝi eĥis en niaj koroj kaj pruvis denove la geniecon de nia samideano poeto. Sed pst! Ni ne parolu pri tio, ĉar ŝajne tiu ĉi dorlotado kaj laŭdado instigas lin al ne laboro, ne versfarado kaj ne vizitado de niaj kunvenoj! Ĉar se li volus, li povus mirindajn poemojn multajn doni al ni! Ĉi tia homo rajtas silenti? Lia arto estas propraĵo de la tuta mondo!" (HE 1921:Januaro, p. 2.)

*

— " Kalocsay ne ĉeestis en la *Silvestra Vespero*. Mi laŭtlegis poemtradukon de Grabowski en la hungara transplanto de Kalocsay.²⁸³ Oni devas mencii, ke en tiu tempo komencis viziti la Budapeŝtajn kunvenojn Julio Baghy kaj Mihály Sárosi hejmenvenintaj el la Siberia militkaptitejo. Ilia unua prezentiĝo okaze de la *Silvestra Vespero* estis la plej brilaj programpunktoj. Julio Baghy deklamis poemojn proprajn, elokventajn, kiuj egalas al la poemoj de Kalocsay. De tiu tempo Baghy fariĝis ĉefa organizanto de literaturaj vesperoj."

(P. B.)

282 La teatraĵo sub titolo: *Li aŭ Ŝi?* poste aperis en la dua volumo de ARGENTA DUOPO p. 247-274, kaj oni prezentis multfoje ankaŭ eksterlande. Vd ĉi-libre p 23.

283 La poemon de Narcyza Zmichowska esperantigis Grabowski. Ĝi aperis en la antologio EL PARNASO

DE POPOLOJ sub titolo: *Ensorĉita Rondo*. Laŭ tiu teksto faris Kalocsay la hungaran tradukon.

* * *

14.5 (1921)

Esperanta Rondo Amika

Ĉi tiu jaro portis abundajn eventojn por la Hungarlanda movado. Novaj aktivuloj komencis agadi. Mihály Sárosi, la unua Esperanto-kanzonisto, rememoras pri tiu tempo:

"En Kristnasko de 1920 mi alvenis kune kun Baghy el la rusa kaptitejo. En 1921 Baghy fondis Esperanto-klubon ERA (Esperanto-Rondo Amika). La klubejo estis en la strato Eötvös, en tre frekventata loko. Regule vizitis ĝin la Budapeŝtaj literaturistoj. La klubo baldaŭ iĝis vere familia rondo."²⁸⁴

"En ERA — skribas L. Halka — kelkfoje aperis ankaŭ Kalocsay kiel soleca meteoro, kiu jam tiam preferis la izolecon..."²⁸⁵

En la ejo de ERA

De maldekstre: L. Halka, L. Zimmermann,
K. Kalocsay, K. Bodó.

*

— Raporto pri la jarkunveno de UEA en Budapest.

La komunikaĵo rimarkis: "Tre mankis sdo Kalocsay, pri kiu oni de monatoj neniu aŭdis."
(HE 1921:Aprilo, p. 6.)

— Publika ekzameno de Baghy-kurso

Ĉe ties fino aŭdiĝis krioj: Ni aŭdu Kalocsay! Kaj li devis deklami el sia verkaro. En majesta silento oni aŭskultis la belegan tradukon de la fama balado de J. Arany: *La velsaj/kimraj bardoj*. Denove tondris aplaŭdo.

— En la *Komerca Lernejo* de la VII-a distrikto s-anoj Kalocsay kaj Balkányi klarigis al la kunsido de la profesoroj la movadon kaj la gramatikon de Esperanto. La kunsido dankis kaj decidis enkonduki Esperanton en la venonta lernej-jaro (HE 1921:Julio-Aŭgusto)

*

Postkongreso en Budapest

Kalocsay denove aktivadas. Kvankam li ne partoprenis en UK en Praha, sed antaŭ la *Postkongreso* en Budapest li verve organizis.

Kadre en la malferma programo Kalocsay deklamis siajn belegajn, novajn poemojn: *Sonorilludo* kaj *Kavaliroj de la nova sent'!* (Cetere ĉi lasta sub titolo *Supren la korojn/Korojn supren!* en la ĉi-jara *VIII-aj Internaciaj Floraj Ludoj* en Girono estis premiita).

Fraŭlino Elizabeto Székely kaj la deklamo de Kalocsay el siaj tradukoj: *La bela Antonio* (hungara popolbalado) ravis la korojn.

La bonega ludo de la unuakta komedio LA PAĜIO DE L' REGĜINO²⁸⁶ de J. Heltai kaj E. Makai, en traduko de Kalocsay, jam vekis ekstazon pro ĝia neatendita ĉarmeco kaj viva humoro. Kalocsay kiel poeto, Baghy kiel longobarda reĝo, fraŭlino Margareta Tomán kiel edzino, Sárosi kiel paĝio kaj s-rino Irena Zacssek, kiel bonega mastrino, donis pli ol ĝis nun la esperantistaj aktoroj donis. Ĉi-foje debutis Kalocsay kaj Baghy antaŭ internacia publiko.

La teatra afiŝo

La komedio estis kelkfoje prezentita ankaŭ eksterlande: en Nürnberg (1923), Tallin (1931), Budapest (1962). La reĝisoro de la kvar prezentado estis Baghy, krome li ludis la rolon de la bankiero. La rolon de la poeto ludis Kalocsay nur en 1921 kaj 1923.

Grupo de postkongresanoj en Budapest 1921

Maldekstre (signita per kruceto) staras Kalocsay.
En la unua vico sidas S. Giesswein, prezidanto de HES.

*

— La granda evento de la jaro 1921 estis la apero de la 32 p. kajereto de Kalocsay sub titolo MONDO kaj KORO.²⁸⁷ La eldonon mi sugestis kaj preparis, portis ĝin al la presejo proksima al mia loĝejo.

— La alia grava afero estis, ke en tiuj tagoj revenis el la rusa militkaptitejo Teodoro Schwartz/Soros,²⁸⁸ kiu fondis la revuon *Literatura Mondo*. Li kunportis la salutojn de rusaj esperantistoj kaj raportis pri la *Tutrusa Esperanto-Kongreso* okazinta en Leningrad.

— La 9-an de oktobro okazis jarkunveno de la *Hungarlanda Esperanto-Societo*. Ĉeestis ĉ. 100 personoj. Post la raportoj de la sekretario, kasisto, bibliotekisto kaj de la raporto pri la postkongresaj festoj, okazis novelekto de la estraro: Estis reelektita kiel prezidanto D-ro S. Giesswein. D-ro K. Kalocsay estis elektita kiel vicprezidanto. (P. B.)

284 En: Letero al A. Csiszár.1976.08.14.

285 En: ARGENTA DUOPO p. 122.

286 Vd en: OMAĜE 4-a vol. p. 42-45; ĉi-libre: p. 24, 82.

287 Vd en: OMAĜE 2-a vol. p. 8-9.

288 Patro de Georgo Soros, kiu establis fondaĵojn en pluraj landoj.

* * *

14.6 (1922)

— Rezulte de la aktiva agado de Balkányi, Baghy kaj aliaj entuziasmaj junuloj, en Budapeŝto formiĝis tia forta grupo, kiun oni povas kalkuli kiel kernon de la tiama Hungarlanda Esperanto-movado, kaj la ERA-kunvenojn kiel ekzemplodonan modelon.

— "En la *Kafejo Kovács* sdo dro Kalocsay laŭtleĝis imteresan artikolon pri anglaj infanoj, kiuj post naskiĝo lernis Esperanton. Ili uzas Esperanton, kiel aliaj infanoj la gepatran lingvon."

(HE 1922:Majo, p. 8.)

— "La 11-an de junio, dimanĉe estis aranĝita la jubilea festo de ERA. La poezian festparoladon de Dro Kalocsay oni devas kalkuli al liaj aliaj plej bonaj originalaj poemoj. Domaĝe, ke li ne skribis ĝin por la estonteco. La deklamoj de Sárosi kaj Kalocsay jam mem meritis la penon veni al la festo." (HE 1922:Julio-Aŭgusto, p. 34.)

Komitat-kunsido de Hungarlanda Esperanto-Societo

La 2-an de julio okazis eksterordinara komitat-kunsido. La sola punkto de la programo estis delegado de reprezentanto de HES al la *XIV-a Internacia Esperanto Kongreso* en Helsinki. La komitat-kunsido opiniis, laŭ la propono de la prezidanto, ke sinjoro dro Kálmán Kalocsay, vicprezidanto de la societo, estas la plej inda por la reprezentado kaj donis al li mandaton. Dro Kalocsay danke akceptis la honoron kaj promesis, ke li agos en la kongreso laŭ la intencoj de la societo.

Alvenis invito el Helsinki. Niaj finnaj amikoj, unuavice V. Setälä ne forĝis la gastaman akcepton kaj la kulturan prezenton okaze de la postkongreso en 1921, kaj ili deziris, ke Kalocsay kaj mi estu iliaj gastoj, eĉ parton de la vojaĝkostoj ili pagos. (P. B.)

*

Reprezentanto de Hungarlando en la XIV-a Kongreso en Helsinki.

"Iom malfrue, tamen ankoraŭ ĝustatempe rememoris la Budapeŝtaj samideanoj, ke oni devas reprezenti Hungarlandon en Helsinki, rememorante, ke lastjare venis al ni kelkaj el niaj finnaj fratoj por viziti nian postkongresan feston. La elekto trafis sdon Kalocsay, kiun ankaŭ la kongres-komitato invitis, por fari salutpoemon al la kongreso kaj promesis gastigi lin. La okazon oni devas nepre uzi kaj post klopodoj de sdino Terinjo Tamás, sdoj Balkányi, Székely, Zimmermann kaj de kelkaj ERA-membroj oni sukcesis kolekti kelkajn milojn por tiu celo. Aparte kunvokita komitat-kunsido decidis sendi sdon Kalocsay, kiel oficialan reprezentanton de la Landa Esp. Societo kaj disponigi por li la necesan monon. Sed laŭ decido tiu mono, por ne tuŝi la societatan havaĵon devas esti kolektita. Do oni alvokis la samideanojn, por doni malgrandan tributon de K. 20.— al la nobla celo. K. 20.— ne estas signifa sumo hodiaŭ, eĉ por la plej malriĉa homo, tamen tre malmultaj sekvis la inviton kaj la sukcesa kolektado estas dankebla al tiuj, kiuj dekobligis kaj centobligis la petitan sumon! Koran dankon ankaŭ kelkaj provincaj grupoj, kiuj trasentante, ke sdo Kalocsay meritas travivi tian esperantan okazintaĵon, kaj ke neniu povus pli inde reprezenti nian landon, malavare helpis la kolekton. Kelkaj samideanoj aranĝis por tiu celo en Budapeŝto ekskurson, sed kvankam oni dissendis 500 invitilojn, kaj la vetero estis belega, ekskursis nur kelkaj dekoj, kiujn posttagmeze samideano Kardos amuzis per tutprograma kabareto... Kun samideano Kalocsay forvojaĝos — ankaŭ invitita de Helsinki — samideano ĉefdelegito Balkányi."

(HE 1922:Julio-Aŭgusto, p. 4.)

*

La granda sukceso en Helsinko: *Kongresa Runo*.

En la malferma kunsido post la festa parolado de Prof. E. N. Setälä sekvis la deklamo de Kalocsay, kiun li enkondukis jene:

Suomi!

Vi estas al mia animo ĉiam la lando de l' pratempaj fabloj heroaj. Ĉi tie vivis la gloraj fratoj: Väinämöinen la eterna kantisto, kies instrumento, la dolĉsonora kantelo ruligis el ĉiuj okuloj la larmojn de l' ravo kaj kortuŝo, kaj Ilmarinen la lerta kaj genia forĝisto, la forĝinto de l' ĉielarkaĵo. Ĉi tie estis farita per lertaj manoj kaj akirita per fortaj brakoj la mirakla muelilo Sampo, kiu donas abundon kaj feliĉon malavare. Väinämöinen, Ilmarinen, gloraj idoj de prapatro Kaleva, mirinda, fabla, heroa epoko de Kalevala, ĉu vi perdiĝis droninte en la nebuloj de l' malproksimaj tempoj? Ho ne! Kantema, fablema popolo konservis vin ame fermite en sia koro, kie vi plu vivas vian vivon eternan. Kaj la runojn pri vi babilas la ondoj de mil brilantaj lagoj, eĥas la muskaj montoj, murmuras la majestaj abiaroj. Aŭdu!

Flugfolio de *Kongresa Runo*

Ĝin pretigis kaj disvastigis P. Balkányi dum la Kongreso.

La *Kongresa Runo* en la deklamo de Kalocsay akiris la korojn de ĉiuj, sed precipe tiujn de finnoj. La tuta kongres-estraro ekstaris kaj manpremis kun Kalocsay. La poemo aperis en finna lingvo en *Uusi Suomi* (Nova Finnlando) tradukita de tiutempe la plej fama finna poeto Otto Manninen. La runo aperis ankaŭ en sveda lingvo en la taga ĵurnalo *Hufvudstadsbladet* tradukita de la parenco de fama mortinta poeto Runeberg.²⁸⁹

La finnaj samideanoj multnombre iris al Kalocsay kaj dankis lin pro la poemo, kiun la kongresa prezidanto von Frenckel nomis naskiĝtaga donaco de la kongreso.

Kalocsay devis sian poemon deklami okaze de la festa gast-akcepto de la naciaj reprezentantoj en la malnova cara palaco antaŭ la prezidento de *Finnlanda Respubliko*, kaj ankoraŭfoje dum la lasta kongres-tago en la *Nobelara domo*.²⁹⁰ (P. B.)

"La 14-an de Aŭgusto, post la fermo de l' kongreso okazis en la *Nobelara Domo* laborista festo... alportis salutojn de eksterlandaj laboristoj diversnaciaj parolintoj, interalie S-ro Kalocsay el Hungario, kiu elokvente parolis kiel kutime." (Esperanto 1922:9, p. 16.)

Pri la deklamo de Kalocsay skribis F. Ellersiek: "... kun nesuperebla vervo ĉi tiu nova stelo sur la ĉielo de la Esperantista poeto prezentis memverkitan *Kongresan Runon* pri la finna nacia eposo Kalevala. Per granda, ĉiam denova eksplodanta aplaŭdo la emocie aŭskultintaj kongresanoj dankis al la deklaminto pro la havita ĝuo. S-ro v. Frenckell, prezidanto de la kunveno prave diris: *Kiu asertas, ke Esperanto ne taŭgas por poezio, tio mensogas*". (Esperanto-Praktiko 1922:9, p. 9.)

"Post tagmanĝo okazis komuna fotografado de la kongresanoj sur la ŝtuparo de Nikolao-katedralo. De tie la kongresanaro promenadis tra la urbo al la monumentoj de Kalevala kaj Runeberg. Ĉe la unua parolis dro Privat, ĉe la dua poeto Kalocsay. Ambaŭ metis florkronon al la piedoj de la monumentoj..." (Esperanta Finnlando 1922:89, p. 143.)

"Dum la ekskurso sur la ŝipo *Arcturus* Kalocsay kaj Balkányi aranĝis por kaj kun la ĉeestantoj sepdek esperantistoj malgrandan koncerton... Sed ni devas rimarki, ke dum la lastaj tagoj oni ne tro ofte rimarkis ilin en la kunsidoj. Ŝajne ili aranĝis gravajn, apartajn fakkunsidojn kun blondaj samideaninetoj. Eble sdo Kalocsay kolektis temon por novaj poemoj kaj samideano Balkányi certe studis la plej bonan propagandmanieron ĉe belaj fraŭlinetoj, kiuj ankoraŭ ne bone scias Esperante, aŭ ambaŭ esploris la elparolmanieron de finnlandaninoj. Kiu scias? Ni nur vidis, ke du poŝtuketoj tute aparte adiaŭ-salutis ilin ĉe la bordo al la ŝipo *Astrea* per kiu ili forlasis Finnlandon." (HE 1922:Septembro, p. 9.)

*

Suomi estis inspiranto de du Kalocsay poemoj: *Sur la Saimaa*; *Vallinkoski*.

289 Vd en: OMAĜE 2-a vol. p. 65-68.

290 Represita el OMAĜE 2-a vol. p. 64.

Ĉe la monumento de Runeberg parolas Kalocsay

En la unua vico staras V. Setälä (plej alta),
kaj P. Balkányi (mantelo surbrake).

Balkányi kaj Kalocsay
kun blondaj Finlandaninoj

Balkányi kaj Kalocsay sur la malsupra ferdeko

"Ho, adiaŭ kara, jam disiĝi devas ni" —
skribis blondulino sur la dorsflanko de la bildo.

Pri la kongresa sukceso de Kalocsay raportis la Miskolca ĵurnalo *Reggeli Hirlap* (Matena Ĵurnalo) la 20-an de aŭgusto 1922.

La deklamo de la *Kongresa Runo* eĉ post multaj jaroj apenaŭ paliĝis en la memoroj. E. Privát rememoris jene:

"Vian voĉon mi ankoraŭ povas aŭdi, kiam en Finnlando vi mem en flamaj versoj alparolis la bardojn de la nordo kaj al niaj oreloj mirigitaj profetis la esperon de l' estonto laŭ la ritmo de l' pasinto mistera. Nova Väinämöinen renaskiĝis en Esperanto. Plua runo sonis trans la maro blua kaj alvokis el profundo la mortintojn de l' miljaroj kaj la vivantojn de la pli paca homaro!" (AD p. 61-62.)

* * *

La IV-a Hungarlanda E-kongreso

La kongreso estis aranĝita en Miskolc la 26-27-an de aŭgusto. La kongresa vicprezidanto Kalocsay transdonis la saluton de finnaj esperantistoj. Pri la XIV-a UK detale raportis Balkányi. Laŭ deziro de la kongresanoj Kalocsay ankaŭ tie deklamis la grandsukcesan *Runon*.

Vespere okazis kabareto. Kalocsay deklamis salut-poemon verkitan por la hungara landa kongreso:

DOLORA SALUTO²⁹¹

Ne oraj trumpetoj kun ĝoja sonoro,
Nek liro arĝenta kun silka ruband',
Nur kordoj obtuze sonantaj de l' koro
Salutas vin, fratoj el tiu ĉi land'.

Ekfrapus mi koron por festaj akordoj,
Por gajo solena, por ĝoja ekstrem',
Sed kuŝas senforte, malstreĉe la kordoj,
Sub fingro frapanta eksonas nur ĝem'.

Jen poplo hungara — ŝirata de vento,
Velkfalas jam ĝia folia ornam',
De sud, oriento, de nord', okcidento,
Ĝin blovas samumo de arda malam'.

Ve, poplo hungara, senfrata kaj sola,
En nuda dezerto soifas ĝis sven'.
Jen mankas al ĝi eĉ la revo konsola,
Pri pluvo de amo, pri pluvo de ben'.

Jam kie la floroj, la zumo ebria
En vento printempa? Jam kie la pomp'
De fruktomatur' en aŭtuno radia?
La trunkon mordantan minacas la romp'.

Ho, poplo hungara, popolo hungar',
Ho nova Lazaro en kria mizer'!
Popol' senigita! Al mondo avara
Do petu, petegu pri seka paner!

Kaj —vidu la mondon! En sanga nebulo
Droninte baraktas la tuta homar',
Kaj ĉie inkubo, detruo kaj brulo,
Subpremo, malamo kaj murdopreper'.

Ho, kiu forrabis la dolĉajn momentojn
De temp' idilia, de kora kviet',
Stultetajn dezirojn kaj molajn revsentojn,
Vesperojn afablajn kun roza ridet?

Ho, kiu distaŭzis la ĝojajn mienojn
Kaj ŝtelis la ruĝon de vang' de infan',
Plenigis per dornoj de zorg' la kusenojn,
Ho, kiu forrabis la molon de l' pan'!

Forfluis la sango... Kaj aman florĉenon
Ni revis post longa malama sufer'...
Ho, kiu preparis teruran venenon
El sango fluinta, por trinko de l' Ter'!

Malama venen' en sovaĝa ebrio
Pelegas homaron al danco de Vit'.
Kaj ludas orkestro de ĝemo, vekrio,
Kaj supre rikanas fantom' de Milit'!

Ho fratoj, ho fratoj, se ĉiuj trezoroj
De ĝojo, feliĉo perdiĝis eĉ jam:
Ni premu gardante la manojn al koroj,
Ne lasu, ne lasu la senton de Am'!

Se tranĉas sin mem la Homaro per glavo,
Ni krii tra ĝemoj, dentgrincoj kaj ve':
La amo: la Pravo! ĝi estas la Savo,
Ĝi estas la Beno, ĝi estas Kre'!

Ĝi estas radie brilanta lumturo
En skua, detrua, ciklono de mar':
Ĝin sekvos, aŭ en ĥaoso, teruro,
Abismo pereos la tuta Homar'!

Kaj estas la lasta moment' por elekto,
Kaj por la decido pri l' propra destin':
Al Vivo kondukas la unu direkto,
Kaj gvidas la vojo alia al la fin'!

Homar', ĉu la veo ne estis sufiĉa?
Ĉu volas vi ĉeson de ploro kaj ĝem'?
Al alto serena, al ĝojo feliĉa
Jen vojo, Homaro! *Ho, amu vin mem!*

Kaj tiam sub pompe festantaj festenoj
Solenaj fanfaroj kun ĝojharmoni',
Kaj gorĝoj muĝantaj de hommilionoj
Anoncas alvenon de l' Lando de Di'!

(1922)

291 La doloran poemon verkis Kalocsay ĝuste post unu jaro de validiĝo de postmilita packontrakto inter la venkintoj kaj Hungario. Laŭ la "Trianona Packontrakto" Hungario perdis la 71,5 procentojn de sia teritorio kaj 54 procentojn de la loĝantaro. Unu el la subskribantoj de la dokumento estis aktiva esperantisto Ágoston Benárd (1880-1968), ministro pri socialaj aferoj. Laŭdire post la subskribo li rompis sian plumon en du pecojn.

BILDOJ EN LA IV-a HUNGARLANDA KONGRESO

Komuna fotografado sur la monteto *Avas*
En la unua vico meze sidas Kalocsay inter du virinoj.

Grupo de kongresanoj

De maldekstre

(?), 2. K. Kalocsay, 3. d-ro J. Takács, 4. L. Kőnig/Király, 5. I. Krausz/Kéthelyi,
6. P. Turzó, 7. d-ro V. Tóth, 8. T. Kovács, 9. d-ro L. Loránd, 10. B. Bayer,
11. E. Tolnai, 12. P. Balkányi.

Sidas: I. Nagy-Molnár, d-ro S. Giesswein, d-ro B. Rácz Kövesd.

— Granda sukceso de tiu jaro estis la naskiĝo de *Literatura Mondo*.²⁹²

Fondo de *Hungara Esperanto-Instituto*

Ĝian fondon (anstataŭ la *Hungara Esperanto-Ligo*) proponis J. Baghy dum la *Hungarlanda Esperanto-Kongreso*. La kongreso komisiis Baghy, Balkányi, Kalocsay kaj aliajn prilabori la organizaĵon. Ĉe la fondo de la *Instituto* multe klopodis ankaŭ d-ro Vince Tóth. Poste li estis ĝia gvidanto. En la estraro troviĝis d-ro Béla Rácz Kövesd kiel ĉefdirektoro, Julio Baghy ĉefsekretario, S. Roboz kasisto, S. Nagy Molnár kontrolisto. La *Instituto* havis fakgrupojn. La *Literaturan fakon* gvidis Kalocsay helpe de la faksekretario Béla Bayer. (P. B.)

Zamenhof-festeno

"Tridek personoj kunvenis la 15-an de decembro vendrede vespere en la *Kafejo Kovács* al komuna vespermanĝo por festi la memoron de Zamenhof okaze de lia naskiĝtago. Post manĝo dro. Lóránd per festa parolado gvidis la aŭskultantojn tra la vivo de Zamenhof... Terinjo Tamás deklamis por tiu ĉi okazo faritan poemeton de Kalocsay, kies facilaj, sonoraj, naivaj vortoj, kvazaŭ infansoj karesis la orelojn de la ĉeestantoj. Jen:

NAIVA POEMETO

Je la naskiĝtago de Zamenhof

Blondaj, brunaj homoj junaj
Kun ŝaŭmanta vigla sang'!
Kantu ĥore, ĝojsonore
Festan kanton via lang'!

...

Eksonis aplaŭdego kaj oni volis aŭdi la poeton mem! Kalocsay ekstaris kaj deklamis alian festpoemon, jam seriozan kaj belegan novan trezoron de nia originala poemaro!" (HE 1923:Januaro, p. 3-4.)

*

Centjara festeno en Budapeŝto.

"La centjaran datrevenon de la hungara poeto Sándor Petőfi oni solene festas en la tuta mondo, ĉar li estas konata, kiel unu el la plej grandaj lirikaj poetoj. En Budapeŝto okazis la 17-an de decembro dimanĉe internacia festo por memoro de Petőfi aranĝita per la *Societo Fontaine* en la *Teatro Urania*, kie en 1912 dum la *Unua Hungarlanda Esperanto-Kongreso* esperantlingve estis ludita la triakta teatraĵo: *La tri gardistoj*. La festprogramo estis franca, sed en sep lingvoj sonoris la voĉo de Petőfi: angle, france, germane, itale, finne, esperante kaj hungare. Esperante la aktoro Julio Baghy deklamis kun granda sukceso tradukon de Kalocsay: *La leono mallibera*. La publiko miris pri la belsoneco de Esperanto kaj estis kvazaŭ memkomprenebla afero, ke ankaŭ Esperanto partoprenis en internacia festa literaturo."

(HE 1923:Januaro, p. 4.)

Petőfi poemaro en Esperanto

Dro. Kolomano Kalocsay tradukis cent elektitajn poemojn de Aleksandro Petőfi kaj la popolfabel-poemon *Johano la Brava*. Estus interesa scii, kiom da personoj volus havi tiun en nia lingvo unikan, belegan kaj valoran poemaron, por povi informi eldonejojn kaj prepari la eldonon dum la centjarfesto de Petőfi. (HE 1923:Januaro, p. 4.)

292 Vd en: OMAĜE 6-a vol. p. 26-76.

* * *

14.7 (1923)

— Petőfi-festo en Budapest

La 23-an de marto okazis la festa kunveno. Oni deklamis tradukitajn poemojn de Petőfi. La plej sukcesa estis la tradukanto mem Kálmán Kalocsay.

La V-a Hungara Esperanto Kongreso

La kongreso estis aranĝita la 19–21-an de aŭgusto en Pécs. Dum la kongreso okazis fakkunsido de komercistoj, ekspozicio, katolika Esperanto-diservo, jarkunveno de UEA, fakkunsido de gazetserva fako, ekskurso, festtagmanĝo, art- kaj dancvespero, kie Baghy kaj Kalocsay deklamis... La plej grandan sukceson atingis la duakta komedio de Kalocsay: "Li kiel Ŝi", en kiu Baghy kaj F-ino A. Pechan brile ludis.²⁹³

La duakta teatraĵeto de Kalocsay jam en 1920 (tiam sub titolo: *Ĉu li aŭ Ŝi?*) portis sukceson al la ludantoj kaj al aŭtoro. En ĝi temas pri Hungaro, kiu erara pensas, ke lia ĉina korespondanto estas knabino. Tiu daŭrigas la ŝercon sendante bildon de lia fianĉino. Sed dum la milito el Siberia militkaptiteco hazarde alvenas la Hungaro kaj la trompo estas malkovrita. Fine la knabino kaj la hungara oficiro reciproke enamiĝas kaj la Ĉino perdas sian fianĉinon. (P. B.)

Pri la komedio skribis Kalocsay:

En 1921 oni volis prezenti ian teatraĵon ĉe la landa kongreso en Budapest. Oni turmentis min, ke mi verku tian. Sed la nepra kondiĉo estis, ke la prezentado estu kiel eble plej malmultekosta. Tamen, oni avizis, ke iu samideano havas du ĉinaj vestojn, unu viran kaj unu virinan. Krome, post la milito ne estis malfacila trovi eluzitan soldatjakon.

Nu, por tiuj ĉi tri ekvizitoj mi ekpensis la historion... Ĉar la prezentadon ĉeestis multaj neesperantistaj interesiĝantoj, mi verkis ankaŭ hungarlingvan prologon en versoj antaŭ ambaŭ bildoj. Ĝi perdiĝis... Ĉar la verko ne havas literaturan valoron mi tute ne intencis ĝin publikigi. Sed nun la arĝentaj redaktoroj ĝin elfosis el mia tirkesto kaj ĝin presigos, malgraŭ mia averto. Tre solene mi deklaras, ke nur kaj sole ili havas la tutan respondecon pri la aperigo de la peco. (ARĜENTA DUOPO p. 247-248.)

*

La XV-a Universala Kongreso en Nürnberg

En la kongreso elita grupeto reprezentis Hungarion. Heinrich Post (Menden) rakontis pri la kongreso kaj renkontiĝo kun Kalocsay:

"Mi unuafoje partoprenis internacian kongreson en Nürnberg. Jam en la akceptejo antaŭ la ĉefstacidomo mi interkonatiĝis kun J. Baghy kaj K. Kalocsay. Ni ofte kunsidis dum la kunvenoj kaj aranĝoj. Hodiaŭ, post preskaŭ 54 jaroj, mi ankoraŭ bone memoras pri la entuziasma, vigla, tre simpatia homo Kalocsay, kiu firme kredis la venkon de Esperanto. Li parolis pri la utileco de la internacia lingvo por la tuta homaro, kvankam li mem sciis ankaŭ aliajn lingvojn krom Esperanto kaj sia gepatra.

La 3-an de aŭgusto multaj kongresanoj marŝis al la monumento de la pentristo A. Dürer. Festprolon diris s-ro Page el Edinburg. Ĉe la statuo elokvente parolis ankaŭ Kalocsay pri la nobla karaktero de Dürer.

Mi staris ĉe la dekstra flanko de Kalocsay. La muzikistaro ludis kaj en la nomo de la kongresanaro LKK metis kverkfolian florkronon sur la soklon de la monumento. La festaranĝo iom malfruiĝis pro la pluvo kaj tiel ĝi daŭris pli longe ol antaŭvidita. Por atingi ĝustatempe la kunsidon, Kalocsay je la fino de la florkronado prenis mian manon kaj man' en mano ni kuris al la kongresejo."²⁹⁴

Dum la kongreso la hungara grupeto aranĝis kabareton sub la egido de *Literatura Mondo*. Pri tio post multaj jaroj rememoris Kalocsay jene:

Teodoro Schwartz, la tiama eldonanto de la revuo eldonis la sloganon: "Ni ĉasu abonantojn!" Kaj kie oni povas trovi pli taŭgan ĉasteritorion de abonantoj ol en Universala Kongreso. Li tenis al ni proksimume jenan oracieton. "Vi, Baghy, estas fama pro via PRETER LA VIVO, krome vi estas aktoro kaj reĝisoro. Vi, Kalocsay, estas vaste konata pro via MONDO kaj KORO kaj pro la traduko de JOHANO LA BRAVA, kaj pro via Kongresa Runo, deklamata en Helsinki. Vi nepre povas kaj nepre devas fari por ni grandan bruon en la Nürnberga Kongreso."

Fakte, ni decidis, ke en Nürnberg ni ludos kabareton. Por tio ni varbis la kanzonistinon Irene Noiret, la aktoron kaj kantiston Mihály Sárosi, kiu havis tre agrablan baritonon kaj povis sin mem akompani per gitaro, kaj la du fratinojn Pechan, el kiuj Corona havis neordinaran kapablon ludi rolon komikan kaj Anna estus grandŝanculino de "Miss Kongreso", se tiam belkonkurso jam estus aranĝita.

Nian kabaretludon ni faris antaŭ plenŝtopita spektejo. Ni ludis ĉarme ironian unuaktaĵon de J. Heltai kaj E. Makai: LA PAĜIO DE REĜINO.²⁹⁵ Groteskan ŝercon de F. Karinthy ludis Baghy kaj mi, Irene Noiret kaj M. Sárosi kantis kanzonojn, speciale zorganta pri tio, ke la teksto de la kantoj ĉiuvorte estu bone komprenebla. La tuton enkondukis prologo en versoj, kiu miksis la propagandon por nia revuo kun la apologio de E-o kiel poezia kaj teatra lingvo. La sukceso estis grandega: E-o vere viviĝis sur la scenejo, vivigis ĝin baladoj, romanoj, serenadoj, barkaroloj, transkapiĝoj de plej kurioza farso, naiva sed freŝa voĉo de popoleska kanto: "Tra la stratoj, tra la la stratoj, marŝas, marŝas la soldatoj." Poste plurfoje ni aŭdis, ke iu aŭ alia kongresano ĝin zumas por si.

La materiala sukceso tamen estis malgranda; ties kaŭzo estis inter aliaj la furiozado de la plej freneza inflacio en Germanio. Ankaŭ la gazetara eĥo estis tre magra. Kelklande pro politikaj kaŭzoj: en la landoj de la "Entento" nin, hungarojn, oni rigardis duongermanoj. Alilande pro miskompreno: la kabareto tie estis io triviala, vulgara, preskaŭ fia, dum ĉe ni en Hungario ĝi estis nobla amuzaĵo, kie oni kantis poemojn de la plej bonaj poetoj (Ady, Babits, Kosztolányi, Szép, Emőd ktp.). Tion ne sciante, kaj eble eĉ ne ĉeestinte la prezentadon, pluraj, raportantaj ri la kongreso, skribis pri nia entrepreno kiel pri io malalta, neinda al Esperanto.

Ni ĝuis la sukceson, glutis la mallaŭdojn. Teodoro Schwartz elportis la materialan malsukceson, dirante: "Post unu jaro ree estos kongreso! Spiro, spero!" Do ni spiris kaj esperis plu. (Hungara Vivo 1975:3, p. 5.)

El la gazetoj:

Bedaŭrinde la prezentado de *Literatura Mondo* ne estis ĝustatempe kaj ne altiris sufiĉajn aŭskultantojn. Sed la kelkcento da aŭskultantoj deklaris, ke tia altnivela, interesa, novarta prezentado ankoraŭ ne okazis en Esperantujo. Kelkaj samideanoj, kiel d-ro Privat, direktoro de UEA, en publika kunveno laŭdis la entreprenon de

Literatura Mondo kaj oni aranĝis je honoro de la kunludantoj festan bankedon. Ni esperas, ke ilia entrepreno dum la tempo akiros al LM la finan sukceson. (HE 1923:Aŭgusto-Septembro, p. 1-2.)

Posttagmeze je la 4-a okazis speciala *Kunsido de la Germana Esperanto-Asocio*, anstataŭanta la nunjaran ĉefkunvenon de la Asocio. Laŭ interkonsento de la Loka Komitato ĝi estis okazonta en la granda ĉambrego. Sed la kabaredema *Literatura Mondo* estis pli forta kaj elĵetis la germanojn el la ĉambrego, por prepari ĉi tiun por la vespera prezentado. La germana kunsido do devis esti aranĝata en multe tro malgranda apudĉambro, kaj la estraro mem devis alporti la necesajn seĝojn... La Kabaredo de *Literatura Mondo*: Mi ne multa ŝatas tiun "malgrandarton", ne pro tio, ke mi estas bigotulo, tute ne, sed rilate al surscenejaj prezentaĵoj mi preferas pri seriozajn aŭ pri riĉajn (laŭ enhavo kaj ideoj) al la ĝenerale trivialaj kabaredaĵoj. Sufiĉe multaj vizitantoj de la prezentado verŝajne jam dum la unuaj numeroj de l' programo akiris la saman konvikiĝon, ĉar, kiel mi eksciis, ili baldaŭ foriris. Povas esti, ke la efikoj de la prezentaĵoj perdiĝis en la tro granda ĉambrego; pli malgranda ĉambro estus estinta pli taŭga. Ankaŭ la tre altaj enirprezoj por la Kabaredo verŝajne retenis multajn kongresanojn de la vizito. (Ek.; Germana Esperantisto 1923:Oktobro, p. 152-153.)

Kabaredo de "Literatura Mondo". Ĉu Esperanto estas lingvo vivanta? Nur nesciantoj kaj malbonvoluloj povas tion nei. Ke ĝi estas lingvo senpere donanta esprimon al ĉio, kio emocias la homon, ke ĝi estas lingvo — kiel natura — rekte iranta de koro al koro tion mi spertis neniam tion forte, kiom en la *Kabaredo*, kiun dum la kongreso okazigis redaktantoj kaj kunlaborantoj de la bonega Budapeŝta gazeto "Literatura Mondo". "Kabaredo" — la vorto enpensis nin al tiuj grandurbaj aranĝoj de dubinda valoro, en kiuj kutime eks-, duon- aŭ malartistoj amuzas sian (alkohole stimulitan) publikon pri diverspecaj kaj diverskvalitaj prezentaĵoj montrantaj alterne frivolecon, malveran sentimentalecon kaj neniomkoston patriotismon. Ke nenion tian mi trovis en la Kabaredo de "Literatura Mondo" garantiis al mi jam antaŭe la nomoj Kalocsay kaj Baghy — nomoj karaj al ĉiu poeziama esperantisto. (D-ro W. Lippmann; Esperanto 1923:Aŭgusto, p. 15.)

La Teatra Grupeto de Literatura Mondo

E. Hevesi, T. Schwartz, C. Pechan,
M. Sárosi, A. Pechan, J. Baghy, I. Noiret, K. Kalocsay

"... Anstataŭ la ekskurso nun interŝange okazis Internacia Recitado, sed ankaŭ en tro malgranda ĉambro. Estis la sama malbonaĵo kiel dum la dua laborkunsido: senĉese malfermiĝis la pordoj por en- aŭ ellasi personojn, kaj la deklamantoj unue ne trovis la merititan atenton pro troa maltrankvileco en la ĉambro. Dro Privat prezidiis la Recitadon kaj diris enkondukajn vortojn... Deklamantoj estis nur ses... Dro Kalocsay el Budapeŝt (Hungarujo). Ili prezentis versaĵojn, parte originale Esperantajn, pli grandparte tradukitajn el sia gepatra lingvo. Ili ĝenerale plenumis sian taskon bone. Plej bone deklamis s-ino Isbrücker..." (Ek.; Germana Esperantisto 1923:Oktobro, p. 157.)

La "Nürnbergga Kabareto" vige vivis ankaŭ en la memoro de M. Sárosi. Jen lia letero al Kalocsay:

Bpest. la 22-an de VII. 975.

Altestimata, karega Amiko Kálmán!

Kun ne esprimebla ĝojo mi legis
Vian rememorigon pri la iama E-spektaklo
en Nürnberg. Neforgesebla estas la tiama
ambicia laboro kune kun niaj gekamara-
doj. Domaĝe la financa rezulto ne estis
kontentiga, ni intencis plibonigi la mal-
bonan bilancon de L. M. Tamen ni estis
ĝojaj, feliĉaj kaj — junaj.— De tiu tempo
Vi fariĝis kara Kolomano brilanta Stelo
sur la Esp. ĉielo. Ni estas fieraj je Vi!
Mi deziras al Vi longan-longan
bonsanan vivon, pluan fortan energion
al Via literatura kaj pedagoga laboro!
Akceptu koran saluton de
Via malnova adepto kaj amiko

Mihály Sárosi

*

— La 3-an de septembro okazis la unua kunveno de la *Esperanto-Kamero*, kies celo: plivigligi la movadon.²⁹⁶ Kalocsay proponis, ke se la *Budapeŝta Unua Grupo* ne estas vivkapabla, unuiĝu kun ERA.

— La 28-an de oktobro posttagmeze okazis kabaredo en la *Socia Muzeo*. Ĉeestis 106 personoj, partoprenis ankaŭ Kalocsay.

Zamenhof-Giesswein Festo en Budapeŝt

La 16-an de decembro okazis en la *Socia Muzeo* la memorfesto de Giesswein kaj Zamenhof. Nia kara prezidanto mortis ĉi-jare la 15-an de novembro.

En la festo ĉeestis proksimume cent personoj. Pri la vivo kaj verkoj de Zamenhof kaj Giesswein parolis D-ro L. Lóránd. La laborista kantistaro kantis la E-Himnon kaj aliajn kantojn. D-ro J. Takács laŭtlegis la kondolenc-esprimojn de eksterlandaj societoj. D-ro Kalocsay deklamis sian poemon verkitan je la memoro de Giesswein. (P. B.)

— Centra komitat-kunsido de HES

La komitat-kunsido okazis la 28-an de decembro en la *Socia Muzeo*. Ĉeestis ankaŭ Kalocsay.

293 Ĝi estis prezentita en Antwerpen en Julio de 1938. Vd ĉi-libre p. 10.

294 Letero de H. Post al A. Csiszár: 29.03.1977.

295 Vd en: OMAĜE 4-a vol. p. 42-45; ĉi-libre p.12-13, 82.

296 Vd p. 9.

14.8 (1924)

— La 29-an de februaro en la *Socia Muzeo estis* aranĝita UEA jarfesto, kie Kalocsay deklamis sian originalan poemon: *Versoj leoninaj*.

— La 9-an de marto okazis la ĝeneral-kunveno de HES. Ĉeestia ankŭ Kalocsay kaj lia nomo estas registrita en la listo de novelektitaj komitatanoj.

— La VI-a Hungara Esperanto-Kongreso estis aranĝita en Szombathely la 8-9-an de junio. Kalocsay ne ĉeestis, lin tute absorbis la literatura agado, laboro super la traduko de la TRAGEDIO DE L' HOMO.

XVI-a Universala Kongreso de Esperanto

La kongreso okazis en Vieno la 6-14-an de aŭgusto. S-ro Warden, vicprezidanto de la Akademio raportis pri la konkursoj kaj premioj, kio decidis post voĉdonoj de la akademianoj honori per premio du verkojn, nome: Julio Baghy: PRETER LA VIVO kaj Kolomano Kalocsay: traduko de JOHANO LA BRAVA de S. Petőfi.²⁹⁷

Estas iom surprize, ke en Vieno ne rolis la trupo de *Literatura Mondo*, kaj ke Kalocsay ne partoprenis en tiu kongreso, kiu estis aranĝita en la najbara lando de Hungario.

Postkongreso en Budapeŝt. El Vieno per ŝipo alvenis 83 gastoj. La 15-an okazis festeto sur la *Margaret-insulo*. Partoprenis samideanoj Baghy, Kalocsay, el la gastoj s-roj Jung, Fethke, Morariu. (P. B.)

*

— Giesswein memorfesto okazis la 14-an de novembro en la *Socia Muzeo*. Ĉeestis 40 personoj. Parolis I. Nagy Molnár, D-ro Lóránd, P. Balkányi kaj deklamis Kalocsay.

— La 12-an de decembro en Dohány str. 71. la I-a Grupo de HESL aranĝis Zamenhof-vesperon kun partopreno de Baghy kaj Kalocsay.

— En eldono de *Hungara Esperanto-Instituto* aperis la ĉefa verko de la hungara literaturo, la drama poemo de Imre Madách: LA TRAGEDIO DE L' HOMO. La majstran verkon de Madách majstre tradukis Kalocsay.²⁹⁸

Premiitaj poemoj de Kalocsay en la *X-aj Internaciaj Floraj Ludoj* en 1924 en Vich:

Kanto de Vagabondo meritis la Unuan Mencion.

Kisoj gajnis la Unuan premion de Natura floro.

Plendo de Don Juan meritis la Trian mencion.

Ridu, kara meritis la Kvaran mencion.

Tri benoj ricevis la Unuan premion de "Terkulturista Ĉambro Austeana".

297 Vd en: OMAĜE 3-a vol. p. 37-42.

298 Vd en: OMAĜE 3-a vol. p. 43-47.

* * *

14.9 (1925)

— Teo-vespero en la *Budapeŝta I-a Grupo*. La 25-an de marto posttagmeze je la 5-a kunvenis 150 samideanoj en la *Socia Muzeo* por amike kunesti. Deklamis Kalocsay kaj Baghy.

— "Esperantaj poetoj Baghy kaj Kalocsay" estis la temo de parolado de N. Hohlov la 11-an de marto en Varsovio.

— La 23-an de majo en Palme de Malorca estis aranĝita la *XI-aj Internaciaj Floraj Ludoj*. La prezidanta parolado de Kalocsay²⁹⁹ voĉlegis D. Dalmaŭ kaj li katalune klarigis kelkajn fragmentojn por la multaj neesperantistoj, kiuj ĉeestis la feston.

La VII-a Hungarlanda Esperanto-Kongreso en Budapest en majo
La ĉeestantaro ne estis granda (4 eksterlandanoj, 60 provincoj, 90 Budapeŝtanoj), tamen la kongreso atingis sukceson ĉar ĉeestis la reprezentanto de la ministro pri instruado kaj religio.

La interkonatiĝa vespero okazis la 30-an en la *Hotelo Park*. Ĉeestis ĉ. 60 personoj. Samtempe okazis la radio-koncerto de *Literatura Mondo*. Partoprenintoj de la radio-koncerto estis: S-ino Kéthelyi, Baghy, Sárosi, Kalocsay, Balkányi, D-ro Tóth.

La 31-an vespere okazis la bankedo kaj kabaredo, kiun partoprenis famaj gesamideanoj. S-ino Kéthelyi, Margit Wakots, Balkányi. Baghy kaj Kalocsay deklamis, Sárosi gitarludis kaj kantis. (P. B.)

La XVII-a Universala Kongreso de Esperanto
Dum la kongreso la 5-an de aŭgusto en la *Granda Operejo* de Genova okazis la prezentado de "Ginevra", verkita de D-ro Privat. La prezentado havis seriozan fakan preparon. La dramon reĝisoris Baghy kaj li brile ludis la malfacilan rolon de la intriganto Modredo. S-rino Starke ludis la noblan reĝinon, S-ro Starke prezentis la reĝon. S-ro Sárosi elokvente ludis la rolon de Lancelot, S-ro H. Keŝik kaj f-ino Elsa Haefelinger lerte kunludis. La prezentadon enkondukis poemo de Kalocsay: *Prologo antaŭ Ginevra* prezentita de s-ro Keŝik.

En la dua parto de la programo la deklamo de Baghy kaj la kantado de Sárosi ricevis merititan aplaŭdon de la publiko. La kantataj poemoj de Baghy kaj la ĉarma poemo *Kisoj* de Kalocsay per la orelkaresaj melodioj estis surprize belaj.

La dramo de D-ro Privat (originale verkita en Esperanto en versoj) estis unufoje prezentita en la IX-a UK en Bern. Oni intencis prezenti ĝin en XVI-a UK en Vieno, tamen tio ne okazis. (P. B.)

299 La parolado de Kalocsay sub titolo: *La Esperanta Poezio* aperis en: *Kataluna Esperantisto* 1925:12-13-14, p. 184-189; repr. en: DPr p.79-85.

14.10 (1926-1927)

— En 1926-1927 apenaŭ troviĝas indikoj pri la movado kaj la agado de Kalocsay. La revuo *Literatura Mondo* bankrotis, ĝia lasta numero aperis en aprilo 1926. Ĉesis ankaŭ *Hungara Esperantisto*, la oficiala organo de la *Hungarlanda Esperanto-Societo*.

La memuaro de Paŭlo Balkányi mencias ununuran okazintaĵon: la 30-an de oktobro en 1927 fondiĝis *Hungara Oficista Esperanta Ligo* kies vicprezidanto fariĝis Kalocsay.

* * *

14.11 (1928)

— La dormanta Hungarlanda Esperanta movado vekiĝis. Oni fondis monatan gazeton sub titolo *Hungara Heroldo*, kio bone plenumis la taskon de kronikisto. Ĝia responda redaktoro kaj eldonisto fariĝis Ludoviko Kökény. Ano de la redaktorado estis Kalocsay ĝis marto 1929.

— D-ro Kálmán Kalocsay gvidas kurson en Budapest de la 13-a de februaro por oficistoj. Inter la kursanoj estas ankaŭ altrangaj oficistoj. (HH 1928:3, p. 46.)

— La jarkunsido de la *Hungarlanda Esperanto-Societo* okazis la 6-an de majo. Kalocsay estas reelektita kiel komitatano. (HH 1928:5, p. 78.)

— La komitat-kunsido de HES al la *Kontrola Komitato de la Viena Internacia Esperanto-Muzeo delegis samideanojn*: J. Baghy, K. Kalocsay kaj D-ro J. Takács. La muzeon fine de julio en 1929 oni malfermos por la publiko. (HH 1928:6, p. 91.)

Fondiĝo de la *Hungarlanda Katolika Esperanto-Societo*

La 22-an de julio okazis la fondiĝ-kunveno. Prezidanto fariĝis parlamentano Matiaso Frühwirt, kiu per aktiva laboro deziras akceli nian movadon en Hungarujo. Kunprezidanto fariĝis D-ro Kolomano de Kalocsay, vicprezidantoj prof. Jozefo Mihalik kaj Stefano Zöldy, ĉefsekretario D-ro Ludoviko Chambre. (HH 1928:6, p. 94.)

Estraro de la Hungarlanda Katolika Esperanto-Societo
De maldekstre la sesa estas Kakocsay.

* * *

14.12 (1929)

La XXI-a Universala Kongreso en Budapest
Granda evento de la jaro estis la UK aranĝita en la hungara ĉefurbo. Inter la famaj
gastoj troviĝis Lidja Zamenhof kaj Felix Zamenhof.

Malfermo de la kongreso en la Vigado (Reduto)

En la unua vico sidas Lidja Zamenhof (signita per kruceto).
Antaŭ la podio staras P. Balkányi, unu el la ĉefaj aranĝantoj de la kongreso.

Inter la kongresanoj

En la unua vico meze sidas F. Zamenhof (barbulo).

Inter la plej ŝatataj gastoj, apud la nomoj de Lidja Zamenhof kaj Felix Zamenhof nepre menciindas tiu de Andreo Cseh. Li alvenis Budapeŝton jam en majo por helpi la kongresan organizadon kaj antaŭpreperi internacian specialan Esperantan kurson, la unuan por geinstruistoj. En tiu kongreso estis aranĝita belec-konkurso same unuafoje en Esperantujo. La titolon "Miss Esperanto" ricevis estonino Veronika Eksta.³⁰⁰

Kalocsay aktive ne partoprenis en la kongreso. Se mi bone rememoras, li ĉeestis en la malferma solenaĵo kaj la inaŭguro de la memortabulo starigita al grafo István Széchenyi.³⁰¹ Lia neektiveco estas komprenebla: antaŭ kelkaj semajnoj, precipe la 1-an de junio li fariĝis juna edzo de Margit Vangel. (P. B.)

*

— Oni reorganizis la *Budapeŝtan 1-an Grupon*. La 15-an de oktobro okazis elekto de la nova estraro. Inter aliaj J. Baghy, K. Kalocsay, M. Sárosi, d-ro V. Tóth kaj B. Vikár fariĝis komitatanoj. (HH B eldono. 1929:5, p. 5.)

— La *Hungarlanda Katolika Esperanto-Societo* vikle funkcias. La 27-an de oktobro Kalocsay parolis pri la poezia valoro kaj literaturo de Esperanto. (HH B eldono. 1929:6, p. 13.)

— La 1-an de novembro pilgrimadis multaj al la tombo de Giesswein. En la nomo de HES parolis d-ro S. Patai, en la nomo de la *Hungarlanda Katolika Esperanto-Societo* faris poezian memorparoladon d-ro Kolomano Kalocsay. (HH B eldono 1929:6, p. 12.)

300 En: ANDREO CSEH La *GAJA STELO* KIEL "EDZPERANTO". Budapest: A. Csiszár. 1996.

301 Grafo Széchenyi (1791-1860) estis fondinto de la *Hungara Scienca Akademio*, kaj la ĉefa apoganto de la 19-a jarcenta reform-movado. En lia akademia parolo (la 27-an de novembro 1842) li pledis ankaŭ la kreon de neŭtrala internacia lingvo. La Kongreso per starigo de memortabulo deziris esprimi sian internacian omaĝon al la "plej eminenta hungaro". Dum la dua mondmilito la memortabulo neniigis. Je la iniciato de HEA helpe de la *Hungara Fervojista Esperanto-Movado* en 1989 oni repreparigis la memortabulon en originala formo laŭ la ununura restinta foto de la KALĈI Dokumentaro.

* * *

14.13 (1930)

— La 23-an de februaro estis jarkunsido de la *Hungarlanda Katolika Esperanto-Societo*. La kunsido elektis novan gvidantaron. Landa prezidanto: Mátyás Frühwirth parlamenta deputito. Kalocsay estis reelektita kiel kunprezidanto. J. Baghy estis elektita komitatano.

(HH 1930:3, p. 6.)

— Giesswein memorfesto. La 18-an de marto HES aranĝis grandsukcesan vesperfeston je la memoro de sia unua prezidanto, papa preleto d-ro Aleksandro Giesswein. Parolis la reprezentantoj de multaj societoj. Deklamis Nelly Gáldos kaj d-ro K. Kalocsay.

(HH 1930:4, p. 4.)

— Koncerto en la Muzikakademio. Informo. La *Hungara Heroldo* decidis organizi memstare koncerton dum la *Budapeŝta Internacia Foiro*, la 10-an de majo. Szilágyi, Kalocsay, Baghy, Sárosi kaj aliaj artistoj, verkistoj prezentos interesan programon. (HH 1930:4, p. 5.)

— La *Budapeŝta I-a Grupo* la 1-an de aprilo aranĝis literaturan vesperon. L. Halka deklamis la faman poemon de Poe: *La korvo* en la traduko de Kalocsay.

La 22-a Universala Kongreso de Esperanto en Oxford 1930

Kalocsay ne partoprenis en la kongreso. Dum la solena malfermo Julio Baghy deklamis lian poemon verkitan speciale por la 22-a UK. Jen:

KONGRESA PROLOGO

(Oxford)

Ekflugu, kanto! portu sur flugiloj
La vagajn veojn, flugu al ĉiel'!
Kaj vin baninte en eteraj briloj,
Reporti iom da ĉiela bel',
Kiel mielon portas la abel'.
Alportu dolĉon de Espero flata
Al koroj, kiuj por majesta cel'
Entuziasmas kun batado frata:
Por granda mondkompren' benanta kaj benata.

La pac' ne portis al ni paradizon.
Milito ĉesis, sed ne — la Malben'.
La mond' suferas kataklizman krizon,
Mizero hurlas lupe, kaj Ĉagren'.
La ĝoj' estas mem estas narkota sven'.
La mond' malsanas, kvazaŭ korp' ŝirita,
Kies partetoj, kun senorda pen',
Nur konvulsias en barakto ŝvita,
Ĉar mankas kunlabor', ĉar mankas gvid' spirita.

La mond' malsanas, sed ĝi sani volas.
Ho, kie estas por ĝi balzam'?

Jen, bonaj koroj, bonaj cerboj bolas,
Por ĉi balzamon fine trovi jam.
Nun flagru brile ankaŭ nia flam'!
Kaj se nin oni mokas <stranga sekto>:
Ni estu do la sekto de la Am',
Ĉar Amo: jen la vera vojelekto!
Sub signo de Esper' ni marŝu en la Rekto!

Espero, jes, Espero, ĉiam ree,
Kun forta spito, kaj kun spita fort'.
Espero vivas, vibras senpere,
L' Esper' pli forta estas ol la Mort'!
Jen, prete staras nova packohort':
Heroldoj de la Lingvo, por fermentojn
De amo ŝuti per instrua vort',
Por semi vortojn kaj rikolti sentojn:
Bible: iri kaj instrui ĉiujn gentojn.

Jen la evento granda de la jaro.
Saluton, Kanto, al la brila Fond',
Ke vigle varba apostola aro
Ekiras migre tra la tuta mond'.
Potence kreskos Familia Rond',
La lingvo Frata, ĝiaj dolĉaj sonoj
Inundas ĉien per triumfa ond',
La Forta Vok', en ĉiuj regionoj,
Resonos en la kor' de junaj legionoj.

Ĉeestas ĉio por esperi firme,
Ne povas velki jam la granda Verk'!
Se l' semon tenas junaj koroj ŝirme,
Elkreskos el ĝi mondombranta kverk'.
Nur vartu ĝian verdon kontraŭ velk'
La roso de la Amo ĉiopova:
Ja venke flugos supren el la ĉerk'
La sankta sent', malnova, tamen Nova
Sento de granda kor', la sento Zamenhofa!

(1930)

"... Eble oni devus nomi ankaŭ la aliajn kunvenojn de la *Somera Universitato* <Laborkunsidoj>, ĉar certe oni ne povis lasi la cerbojn endormiĝi. Okazis paroladoj de Prof. Collinson kaj Migliorini el Romo, ankaŭ nia kara Profesoro Cart. Ĉiuj temis pri lingvistiko, kiel ankaŭ la prelego de Doktoro Kalocsay, kiun legis amiko Sturmer. Nur la lastan mi povis aŭskulti, temis pri la evoluo en Esperanto de aparta poezia lingvo, kaj la rajto de la artistoj provi neologismojn. Tre bone, se ili jam pruvis talenton kaj kiel verkistoj kaj kiel majstroj de nia lingvo." (ANO; Esperanto 1930/133.)³⁰²

*

XV-a Internacia Katolika Esperanto Kongreso
Ĝi estis aranĝita en Budapeŝt la 16-20-an de aŭgusto en 1930.

Solena malfermo de la kongreso

Parolas K. Kalocsay, kunprezidanto de la Hungarlanda Katolika Esperanto-Societo.
Ĉe la tablo sidas: ?, Joan Font-Giralt, ?, Andreo Cseh.

302 La prelego de Kalocsay: "La evoluo de nia poezia lingvo" aperis en LINGVO, STILO, FORMO. Vd en: OMAĜE 5-a vol. p. 59-61.

14.14 (1931)

— Granda evento de la jaro estis la renaskiĝo de *Literatura Mondo*. Ĝia unua numero aperis en januaro. Tiun brilan periodon de la revuo ebligis la talenta kaj organiza kapablo de Vilmos Bleier. La du ĉefredaktoroj ree estis Baghy kaj Kalocsay, responde redaktoro Karlo Bodó, kunredaktoroj Ferenc Szilágyi kaj Ludoviko Totsche.³⁰³

— La 10-an de aprilo okazis la dudek-jara ĝenerala kunveno de HES. Per granda aplaŭdo oni deklamis, ke D-ro K. Kalocsay kaj D-ro J. Takács estis nomataj honoraj membroj de HES. (Esperanto 1931/116.)

XXIII-a Universala Kongreso de Esperanto en Kraków

"... La 6-an de aŭgusto, en la bela kino-teatro "Uciecha" okazis *Literatura Matineo* por la partoprenantoj de la kongreso. La solenon de nia modesta kulturfesto plensukcese kreis la deklamado de Henryk Rozmarynowsky, pola drama aktoro, kiu verve kaj artiste prezentis la poemon *Verda stelo super la Wawel*, verkita de K. de Kalocsay por la kongreso. Ni aparte mencias, ke lia alparolo estis modela kaj perfekte redonis la muzikon de la Esperantaj ritmo kaj sonoj..." (Literatura Mondo 1930/169.)

Jen la poemo de Kalocsay:

STELO SUPER LA WAWEL

Leviĝas de la bluaj ondoj de l' Vistulo
Kaj pace sin rigardas en la ondspegulo
Sub la mirinda blua kupolo ĉiela
La musko-mura Wawel — kastelo fabela,
El kiu la alto de pura lazuro
Sin streĉas la majesta katedrala turo.
Super la tur', jen, nuboj arĝenta flugpendas.
Oni kredas, ke tie flugilojn etendas
Por triumfo ekflugi, ia birdo granda:
La brile blanka aglo: simbolo Pollando.

Muskaj muroj de Wawel jen staras, sensonaj,
Mute ripozos tie en la litoj ŝtonaj
La reĝoj episkopoj nobeloj altrangaj:
Ilin ŝirmas per ombro la flugiloj blankaj
De la pola aglo. Sed ja, se la suno dronas,
Kaj el preĝejoj urbaj sonoril' eksonas,
El Maria-preĝejo per trumpetsignaloj
La alvenon de l' nokto anoncas hejnaloj: *
Inter la muskaj muroj misteraj murmuroj
Kaj susuroj eksonas: rakontas la muroj
Inter si pri la gloro de tempo pasintaj,
Kiam sur Wawel glore brilaj reĝoj regis,
Tumultis vigla vivo, brilis glavoj tintaj,
Batalaj krioj eĥis, ĉevalhuf' bruegis;
Ho, pri tempoj pasintaj de glor' kaj armiloj.
Kiam iris patrujon defendi la filoj.

* pola vorto: korno.

Heroo Kosciuszko gvidis batalvice
La nacion al venko apud Raclavice.

Muskaj muroj, kuŝantaj en dormo silenta,
Grizaj ŝtonoj, kovrataj per polvo jarcenta,
Songantaj pri pasinta glor' de arda armo!
Vekiĝu nun, kaj aŭdu! marŝas nova svarmo
De novaj batalantoj sur Wawel potenca
Por nova batalado obstin-pacienca!
Ĝi marŝas por konkeri de l' mond' malamika
Kun kantoj kaj krioj en lingvo muzika!
Muskaj muroj de Wawel, ĉu do vi nun aŭdas
Kion ĉi svarmo kantas kaj kiun ĝi laŭdas?
Ĉu vi miras, ke iras ĉi armeo stranga
Al stranga batalado: paca kaj sensanga?
Jen, por ili ja estas la sola armilo
Tiu muzik' en buŝoj, kiun nobla filo
De l' pola lando kreis, por ke Forta Voko
Ekflugu ventflugile de loko al loko.
Jes, miru, muskoj muroj! el ĉiu angulo
De l' mondo svarmoj venis al blua Vistulo,
Por festi homan feston kun nobla ekflamo
Kaj por fari el Wawel la templon de l' Amo.

Kaj vi, ho noblaj filojde la Pola tero,
Kiujn vizitas nun la arme' de l' Espero,
Aŭskultu pri la voĉoj strange melodiaj,
Kiu nun eksonoras super tomboj viaj!
Ho, heroo kuraĝa, brilanta kaj glora,
Kiun kovras ĉi tie la ĉerko marmora,
Ekaŭdu, Kosciusko! Ni venis admire,
Ho helpu nin per brila ekzemplo inspire!
Instruu nin, ho brila, brava batalisto,
Pri leona kuraĝo kaj spita persisto,
Ke per via kuraĝo kaj fajra intenco
Ni venku kontraŭ ĉiu malica potenco!

Kaj vi, ho di-benita kantisto orbuŝa,
Revinta en ekzilo kaj amo kortuŝa
Pri la naskotero litva, kaj per sorĉa kreo
Songinta la figuron de sinjor' Tadeo,
Atendinta dum veoj de nostalgio
La savantan alvenon de nova Mesio,
Kaj korpe nun kuŝanta ĉi tie ĉerkferme,
Sed vivanta en verkoj kaj koroj eterne,
Mickievicz! al via kantado potenca,
Pri la granda fratiĝo, jen estas parenca
Kantosonoro, aŭdu! kaj helpu inspire,
Malamo nian mondon mordadas dentŝire!
Ho vian oran buŝon ni ege bezonus,

Vian poetan voĉon ravante dolĉkantan,
Kiu per la potenco de l' vorto admonus
Kaj alarmus la Koron obstine dormantan.

Starante el la bluaj ondoj de l' Vistulo,
Sin pace rigardante en la ondspegulo
Jen streĉas sian turon al lazur' ĉiela
La musko-mura Wawel — kastelo fabela.
Kaj jen super la turo de la Katedralo
Kaj super la arĝenta brila nubvualo
Ŝvebante tie kvazaŭ aglo blankfugila,
Rigardu, nun eklumas stelo, strange brila,
Kaj dum mallumon sternas la nokto karesa,
Jen, pli kaj pli ĝi brilas kaj brilas promese,
Radiojn de Espero fajreras ĝi sorĉe,
Entuziasmaj koroj salutas ĝin torĉe,
Sur la dormantajn reĝojn de l' fabelkastelo
Misterajn ombrojn ĵetas nia Verda Stelo.

*

Postkongreso en Budapeŝt

La postkongresa varbado komenciĝis en Krakowo. La ĉefaj organizantoj de la aranĝaĵoj estis s-ro Szász, F. Szilágyi kaj P. Balkányi. Aparta sensacio estis dum la artvespero la prelego de la eminenta verkisto Frigyes Karinthy, kiu voĉlegis sian novelon: *Barabas* en la traduko de K. Bodó. Jen kelkaj eroj el la riĉa programo: Sárosi kantis kun gitarakompano muzikigitajn poemojn de Baghy, Kalocsay kaj Szilágyi. Baghy deklamis, Eta Szász lerte dancis, la skoltoj prezentis aron da humorajoj. Kalocsay laŭtlegis el siaj spritaj RIMPORTRETOJ, Szilágyi repafis per la rimportreto de Kalocsay.

En la postkongreso partoprenis el 18 landoj 51 personoj. Laŭdleteroj pruvas, ke la Budapeŝta aranĝaĵo estis tre sukcesa kaj utila por propagandi Esperanton. (P. B.)

*

— Zamenhof memorfesto estis aranĝita la 15-an de decembro. Festparolis Kalocsay.

— Estas inda rimarki, ke en tiu ĉi jaro aperis kvar verkoj de Kalocsay. Nome: ETERNA BUKEDO,³⁰⁴ STREĈITA KORDO;³⁰⁵ RIMPORTRETOJ³⁰⁶ kaj LINGVO, STILO, FORMO.³⁰⁷ (P. B.)

303. Vd en: OMAĜE 6-a vol. p. 28-33.

304 Vd en: OMAĜE 3-a vol. p. 56-57.

305 Vd en: OMAĜE 2-a vol. p. 13-16.

306 Vd en: OMAĜE 2-a vol. p. 10-12.

307 Vd en: OMAĜE 5-a vol. p. 59-61.

* * *

14.15 (1932)

La XXIV-a Universala Kongreso de Esperanto

La stabo de *Literatura Mondo* opiniis, ke por la revuo la plej bona propagando estas la kongresa prezentado. La Nürnberga magra rezulto³⁰⁸ ne difektis la entreprenemon de la trupo kaj dum la kongreso en Parizo denove estis aranĝita *Literatura Vespero* de la revuo.

Pri la prezentado raportis Julio Baghy:

"Per la afabla helpo de LKK nia revuo aranĝis ĉi tiun vesperon en la teatra salono de la kongresejo. Kun agrabla surprizo ni konstatis, ke la granda salono estis plenplena... Mi rememoras, ke antaŭ jaroj en Nürnberg, en la unua periodo de nia revuo, malplenaj seĝoj oscedis antaŭ la scenejo de nia prezentado — kia ĝojiga ŝanĝo de tiam! Jes, ĝojiga, ĉar en ĝi ni vidas la signon de tio, ke nia publiko rekonis la grandan signifon, kiun la literaturo havas en nia movado. Nia publiko volas alproprigi tiun pli kaj pli grandan, pli kaj pli belan konstruaĵon, kiun la senlaca laboro de niaj verkistoj kreas sur la malnova Fundamento. Kaj en tiu paca sieĝo ilin plu ne malhelpas la alto de la etaĝoj kaj la granda nombro de la ŝtupoj.

Literatura Mondo havas du celojn. Unue, malkovri, instigi, laborigi, grupigi talentulojn por literatura kreado due, krei legantaron kun tia lingva preteco, ke ĝi povu kompreni, taksu kaj ĝui la kreaĵojn de tiuj talentuloj... Komprenible la plenumo de tiu tasko estas pli facila, se nia publiko povas konatiĝi kun siaj verkistoj ne nur litere, sed ankaŭ persone. Jen kial ni aranĝis tiun Vesperon de Verkistoj, kaj jen kial ni ĝojas, ke nia publiko aprobis ĉi tiun aranĝon per amasa vizito.

Parolante pri nia programo, mi antaŭe konstatas, ke ĝi plaĉis: ĉiuj kun kiuj mi parolis pri ĝi, laŭdis ĝin, ofte tre entuziasme. Poste mi konfesas, ke ni mem ne estis pri ĝi kontentaj. Nu, ĝi ja certe enhavis multan valoron, mi ne kontestas, kiel mi kuraĝas ja kontraŭdiri al tiel multaj aplaŭdantoj. Sed ĝi estus multe pli vigla kun kelkaj scenoj kaj kantoj, precipe kantoj scenigitaj, kiuj estus donintaj al la seriozaj partoj multkoloran kaj varian kadron...

Ĉe la komenco de la Vespero K. Kalocsay salutis la ĉeestantojn per kelkminuta parolado kaj li tuj sukcesis krei tiun intiman, varman atmosferon, kiu estas nepre necesa por tiaspecaj aranĝoj. La intima humoro konstante altiĝis dank' al la tikla seriozo de Raymond Schwartz, kiu sprite kaj basvoĉe anoncis ĉiun verkiston... Teo Jung, la ĉefredaktoro de la Herolddo parolis pri Kolonjo, kongresurbo de la XXV-a kaj la ŝercoj, per kiuj li spicis sian parolon, rulis tra la aŭskultantaro vastajn ondojn de la rido. Jean Forge parolis pri la "heroaj" tempoj de nia literaturo, varmtone li pentris antaŭ ni la la penan kaj pezan laboron de la Majstro. Kaj je la fino de sia parolado li prezentis la grandan surprizon: mallumiĝis la ĉambro, eksonis la Himno malantaŭ la scenejo kaj sur malvolviĝinta ekrano staris antaŭ ni la Majstro mem, deklamanta "La Esperon". La karaj konataj trajtoj tie vibris vive antaŭ ni, kaj la impresoj, kiun ti ĉiu apero de la karmemora Mortinto faris, estis tiel granda, ke per unu fojo stariĝis la tuta aŭdantaro kaj kune kantis la Himnon kortuŝite. Bone, ke sekvis paŭzo, neniu estus kuraĝinta prezenti ion post ĉi tiu grandimpresa sceno.

En la paŭzo ni intencis amuzi la publikon per gramfondiskoj de Miĥaelo Sárosi, sed tiu punkto ne rikoltis atenton, eble neniu ĝin rimarkis.

Post la paŭzo leviĝis la antaŭkurteno en la scenejo, sur purpura fonkurteno paradis per grandegaj arĝentaj literoj "Literatura Mondo" kaj la konata emblemo de nia revuo. Bele ĝi aspektis, ricevis longan aplaŭdon... Sekvis K. Kalocsay: en lia prezento unue la *Vento* de E.Verhaeren trasiblis, ĝemis, trumpetis kaj hurlis super la kapo de la publiko, poste lia propra

<*Ezopa Fabelo*> vekis ridon per sia neatendita fino... La sinsekvaj aplaŭdoj, la dumpaŭza varma humoro de la publiko, la postvesperaj gratuloj (ne sen aŭtogrampeto), montras, ke ankaŭ ĉi tiu eta prezentado havis surprize grandan sukceson, ke nia publiko avidas la literaturon, en kiu ĝi sentas vere vivi nian lingvon..." (LM 1932/146-147.)

"... Dum la tuta semajno la vetero en Parizo estis senenergiige varma, sed eĉ tio ne malhelpis, ke la salono estu plena dum la Literatura Vespero de Literatura Mondo, kiun partoprenis Kalocsay, Baghy, Schwartz, kaj aliaj kunlaborantoj de LM..." (A. Venture; BrE 1932:Septembro, p. 242.)

"En la Somera Universitato parolis la literaturisto D-ro Kolomano Kalocsay pri <La vorto en Esperanto>. Precipe kursgvidantoj multe povis lerni el tiu parolado." (NE 1932:17-18, p. 261.)

Vizito al Versailles
Kalocsay kun kongresanoj .
Foto: G. Waringhien.1932.08.05.

Kalocsay kaj Waringhien renkontiĝis unuafoje dum ĉi tiu kongreso en Parizo. Waringhien per poemeto (gravurita sur fleksebla disko) signis ilian renkontiĝon: Jen:

Sur ŝtuparo ni renkontis nin
Kaj unuavide nin rekonis.
Haltis tuj pied', ekpemis sin
manoj, kaj en ĉiu nia sin'
Ĝojsaluta kant' amike sonis.

Sed ĝi ne vortiĝis. Dec' admonis
de sentimentala malabstin':
ĉu elverŝo de la kor' bontonis
sur ŝtuparo?

Poste baldaŭ, kiam ni salonis
en hotel', por alia destin'
tempon tuj kaj vortojn ni bezonis:
se poet' iam viziton donis
al poet', ne longe restas Rim'
sur ŝtuparo.

Dum la kongreso oni vendis la verkon de Peter Peneter: SEKRETAJ SONETOJ. En tiu tempo la erotika poezio ankoraŭ ne enhejmigis en la Esperanta literaturo, do la libreto vendiĝis kaŝite, tamen la stoko baldaŭ elĉerpiĝis.³⁰⁹

*

— En tiu jaro aperis en Esperanta traduko de Kalocsay ankaŭ la ROMAJ ELEGIOJ — La TAGLIBRO de Goethe, kiu same kalkuliĝas inter la la klasikajn erotikaĵojn.³¹⁰

— Ĉi-jare aperis la verko de Kalocsay-Waringhien: PARNASA GVIDLIBRO. En ĝia *Poezia Fakvortaro* listigita 602 neologismoj pruviĝis oleo al la fajro de la "neologmilito".^{311, 312}

— *Esperanto Literatura Vespero* okazis en la *Vajda János Literatura Societo*. La renoma hungara verkisto F. Karinthy en la antaŭparolo pruvis kial taŭgas Esperanto por literaturaj postuloj. La partoprenantoj prezentis en poemoj, prozoj kaj kantoj la belsonecon de Esperanto. M. Sárosi kantis, F. Szilágyi deklamis. Oni prezentis ankaŭ la unuan akton de LA TRAGEDIO DE L' HOMO en la traduko de Kalocsay. (P. B.)

— Supera kurso komenciĝis la 18-an de oktobro en la aranĝado de la *Hungarlanda Esperanto-Societo*, *Hungarlanda Katolika Esperanto-Societo* kaj *Landa Esperanto Ekzamena Komitato*. Kursgvidantoj: d-ro Kalocsay, d-ro Loránd, Totsche, Bodó, Balkányi, Mihalik, d-ro Marczell, V. Bleier, Halka kaj Kökény. (HH 1932:2, p. 3.)

— La 23-an de decembro okazis la unua kunsido de la *Landa Esperanto Ekzamena Komitato*, kies prezidanto fariĝis d-ro Á Benárd eksministro. Inter aliaj ankaŭ Kalocsay estis ano de la *Komitato*.

308 Vd p. 24-26.

309 Vd en: OMAĜE vol. 2, p. 17-22

310 Vd en: OMAĜE vol. 3, p. 58-59.

311 Vd en: OMAĜE vol. 5, p. 62-66.

312 Vd en: OMAĜE vol. 5, p. 5-7.

*

14.16 (1933)

— La supera kurso de HES kaj *Katolika Esperanto-Societo* progresas kontentige. Ĝis nun parolis s-anoj Kalocsay, Kökény, Halka, s-ino Tolnai-Göndör, Bleier, Balkányi kaj Totsche. El la sukceso evidentiĝis, ke troviĝas sufiĉe da s-anoj, kiuj ne kontentiĝas nur pri supraĵa alproprigo de Esperanto. Espereble de nun oni aranĝos ĉiujare similajn, altnivelajn instruparoladon. (HH 1933:1, p. 4.)

XXV-a Universala Kongreso de Esperanto

Kolonjo estis la loko de la jubilea kongreso de UEA. Post la festparolo de la Ed. Stettler, prezidanto de UEA, s-ro Telling voĉlegis poemon verkitan de K. Kalocsay honore al s-ro Stettler. Jen:

LA KAPITAN' EL BERNO

Hoj he! la mar' tempestas!
Danĝeraj ondoj krestas
kaj frapas sur la ripo
de la malgranda ŝipo
kaj ĝin kolore skuas;
la velojn vento truas;
mevoj eligas veon,
anoncas la pereon.
L' animojn ĝis radiko
ekregos jam paniko:
"Rifuĝi! Al boato!
Tuj venos lasta bato!"
Sed en la venta bleko
jen staras sur ferdeko
en sia gvida loko,
pli firme ol la roko,
kun firme certa mano
la kapitano.

Kaj ju pli letargie
l' espero ĉie svenas,
en des pli energie
li direktilon tenas.
Kaj inter akraj rokoj,
kiujn ŝaŭmpolvo kovras,
tra l' plej danĝerej lokoj
trankvile li manovras:
kaj kiam rif' minaca
jam ŝajnas ŝipon spliti,
li, kun lerteg' sagaca,
suksesas ĝin eviti!

Kaj ĉi trankvilo fera,
persisto bonespera
kaj celkonscia gvido
plenigas nun per fido
korojn. La ŝipanoj

postenojn siajn prenas,
kaj per fervoraj manoj
laboras, luktas, penas,
kaj, jen, la ŝipo — flugas
triumfe ondojn jugas!
Se iom eĉ ŝirite,
ĝi kuras, kuras, spite
al ĉiu uragano
al la haven' — merite
de l' kapitano.

Ŝipanoj! Pro la gvido,
pro l' peno kaj sindono,
pro l' enverŝita fido,
konsilo kaj admono
pro l' firma kaj trankvila
manteno direktila
en la koler' tempesta:
ni danku nun tutkore
al kapitan' modesta!

Ni danku, ŝipanaro,
pro la kvaroncentjaro,
dum kiu vane vipis
la ventoj: li plu ŝipis:
amanto de libera
maro kaj moro: vera
gvidisto, klara, klera
kaj modestmaniera,
sed firma kaj sentima,
egalanima
en ĉiu sort-alterno:
la kapitan' el Berno!

Tondra aplaŭdo sekvis tiun poemon, kiu esprimis tion elokvente, kion la esperantistaro povas danki al Ed. Stettler. Post la solenaĵo la ĉeestintoj ricevis plaĉe presitan folion kun la teksto *La Kapitan' el Berno*.

*

— En la redakto de Kalocsay aperis la 470 p. HUNGARA ANTOLOGIO³¹³ kaj en lia traduko la INFERO de Dante.³¹⁴

Esperanto en la skolta Jamboreo

Laŭ la invito de la *Hungara Skolta Asocio* la tutmonda skolta kunveno kun tendaro en 1933 okazis en Gödöllő (urbeto proksime al Budapeŝto).

La nombro de la partoprenintoj esperantistaj skoltoj estis ĉ. 200. En la skolta ekspozicio estis aparta muro por montri la rolon de Esperanto en la skolta movado. Esperantaj flagetoj vidiĝis ĉe aro de tendoj. Skoltoj sciante Esperanton troviĝis en ĉiuj oficoj: banko, polico, trafiko kaj en vendejo. La ĉiutaga skolta gazeto enhavis artikolon pri kaj

en Esperanto. Ankaŭ en la radio-dissendoj povis esti parolita kelkfoje en Esperanto. Ĉe la poŝtoŭicejo oni povis akiri la jamboreo-poŝtmarkojn kaj memorfolion, donacitan de UEA kaj *Literatura Mondo*.

La propaganda efiko de Esperanto en la internacia tendaro grandparte estas dankebla al la *verdskolta general* alias Paŭlo Balkányi. Ĉi-okaze li verkis *Esperantistan Skolthimnon* kaj Kalocsay komponis la muzikon. Ĝi aperis flugfolio.

313 Vd en: OMAĜE 3-a vol. p. 48-50; 6-a vol. p. 23, 59.

314 Vd en: OMAĜE 3-a vol. p. 60-65.

* * *

14.17 (1934)

— Okazis *Literatura Vespero* la 2-an de februaro. Antaŭ la grandnombra publiko Kalocsay prezentis la *V-an Kanton* de la INFERO. La aŭskultantaro ovaciis la tradukon de Kalocsay.

— La 2-an de marto estis aranĝita *Litaratura Vespero* honore al la renoma poeto, verkisto Mihály Babits. Enkondukan prelegon diris F. Karinthy. Kalocsay deklamis Babits-poemojn. Ankaŭ Babits prezentis unu poemon el sia verkaro.

— La 6-an de aprilo oni aranĝis memorfeston la ĵus foriranta hungara verkisto Ferenc Móra. Li estis honora membro de HES. Kalocsay kun granda sukceso interpretis el la prozaj verkoj de Móra. M. Sárosi per gitarludo riĉigis la programon.

— La unuaj ekzamenoj okazis en la *Komerca Akademio*. Inter la ekzamenantoj troviĝas ankaŭ la nomo de Kalocsay kiel ekzamenanto pri "scienca kapableco".

— En la eldono de *Literatura Mondo* aperis la plej fidela kaj kompleta spegulo de Esperantujo: ENCIKLOPEDIA de ESPERANTO. Ĝia iniciatinto Ŝirjaev kolektis gravajn materialojn pri la-E-movado. Liaj posteuloj: L. Kökény kaj V. Bleier — helpe de diverslandaj kunlaborantoj kaj konsilantoj — pli riĉigis la amplekson kaj redaktis la 784 p. verkon. La lingvofakon redaktis K. Kalocsay. (P. B.)

* * *

14.18 (1935)

Ĉesigo de la laborista societo

"La plej granda Esperanto-societo en Hungarujo estis la *Hungarlanda Esperantista Societo Laborista*, ĝi estis eĉ pli granda, ol aliaj hungaraj Esperanto-organizoj kune. Al ĝi apartenis multaj grupoj, ĝia kultura laboro estis ampleksega. Tiu ĉi grava societo ne funkcias de junio, ĉar la ministerio disigis ĝin. Ni ne konsentas, ke per ununura gesto oni povas ĉesigi la agadon de granda societo. Ni scias, ke okazis diversaj strangaj aferoj en la kadro de HESL, kaj ni informiĝis pri laŭdire grava respondeco de la lastaj gvidantoj. Sed kial oni ne forigis nur tiujn, kiuj vere estas danĝeraj aŭ suspektindajn?..." (HH 1935:1, p. 22.)

— La 10-an de majo fondiĝis la *Hungara Esperanto Federacio* sub la gvido de Jozefo Mihalik. La celo estis: plifortigi la Hungarlandan movadon kaj ĉefe, ke ĝi reprezentu Esperanton ĉe la oficialaj faktoroj, krome Mihalik mem volis esti la ĉefa estro de la movado. Li ne ĉesigis aliajn societojn, male, li kolektis ilin en la novfonditan *Federacion*. Per la fondo de Federacio, la hungara E-movado tiriĝis al la dekstra flanko. La gazeton *Hungara Heroldo* ekde 1937 redaktis same Mihalik. *Eble tiu ĉi dekstrula gazeto kontribuis, ke oni ne ĉesigis la movadon.*

— Festkunsido dum la *Nacia Labor-semajno* estis aranĝita la 4-an de oktobro en la *Hungara Esperanta Pedagogia Societo*. Ĉeestis ĉ. 100 personoj. Julio Baghy deklamis la Petőfi-poemon "*Mallibera leono*" en traduko de K. Kalocsay.

Ĉi-jare aperis la 472 p. verko de Kalocsay-Waringhien: PLENA GRAMATIKO de ESPERANTO. Dum la verkado Kalocsay tute retiriĝis kaj ne vizitis Esperanto-kunvenojn.

* * *

14.19 (1936)

La XXVIII-a Universala Kongreso de Esperanto

Malgraŭ la ĝenerala ekonomia krizo, Vieno altiris multajn esperantistojn, inter ili ankaŭ Kolomanon Kalocsay.

Kiel honoraj membroj estis prezentitaj s-roj Baghy, Kalocsay kaj Stockinger. Aklame akceptita de la kongreso.

Kongresaj mozaikoj

Georgo Verda raportis: "... la amikojn de *Literatura Mondo* atingis la novaĵo, ke posttagmeze alvenas Vienon Kalocsay. Kaj laŭ speciala invito kunvenis vespere en la restoracio *Volksgarten* ĉ. 30 amikoj kaj kunlaborantoj de nia gazeto por en intima rondo kaj vere kolega agordo pasigi plezurriĉajn horojn. La bona vino regalita de Bleier agordis niajn verkistojn kaj poetojn tre bonhumore. Spritaj tostoj, amika babilado alten levis la animojn kaj kreis vere liberan, senĝenan atmosferon. Similaj liberaj kunvenoj de nia literaturistoj devas fariĝi daŭra tradicio dum la universalaj kongresoj. Tio estas necese ne nur plifirmigi la kolegajn rilatojn kaj senton de solidareco inter niaj verkistoj, sed ankaŭ por doni al ili realan eblecon libere preparoli la diversajn problemojn de nia literaturo, kies normala disvolviĝado estas plej fidinda pruvo pri la natura kresko de nia afero ĝenerale...

Tial neniam tro granda estas nia aprezo al la nediskuteblaj meritoj de la eldonejo de *Literatura Mondo*, kiu per rimedoj vere modestaj sukcesis krei literaturan centron, blovi en ĝin vivdeziron kaj vivkapablon, zorgi pri konstanta altigado de ĝia nivelo kaj doni tiamaniere al nia movado la plej fortan kaj plej certan apogon. Estis jam malfrua post noktomezo, kiam ni kun agrablaj impresoj kaj kun bonega humoro forlasis la kunvenon..." (LM 1936/122.)

Somera Universitato

"... Sekvis Kolomano Kalocsay, nia fama hungara verkisto, kiu sub la temo *La Esperanta Literaturo*³¹⁵ pritraktis la disputigan temon de neologismoj apologiante la propran sintenon kaj pledante por la riĉigo de Esperanto pere de literaturo..." (TBE 1936:Septembro (377), p. 365.)

Hilda Dresen skribis: "... Mi persone restis kontenta pri la kongreso, ĉefe dank' al la eblo renkonti la kunlaborantojn de Literatura Mondo. Entute meritas nian dankon s-o Bleier, kiu aranĝis kunestadon de kunlaborantoj de LM. Kolektiĝis pli ol dudeko — Kalocsay, Waringhien, Totsche, Newell, Leizerowitz, Leo Belmont kaj aliaj, el kiuj multaj renkontis unu la alian unuafoje persone. En ŝerca maniero s-ro Bleier prezentis la kunvenintojn, notente ĉe tio ankaŭ la pseŭdonimojn, uzatajn de la koncerna verkisto, ekz, <konas bone Lali Blond>, <intima amiko de Alex Kay>, ktp. Kiom da surpriziĝoj!..." (LM 1936/124).

Al la kongresa kroniko apartenas ankaŭ la vortoj de Kalocsay respondante al la demando de L. Halka:

— Vi partoprenis en la ĵusa Viena Kongreso. Multaj kritikis ĝin. Via opinio? Ĉu vi estis kontenta?

—Jes, mi estis tre kontenta, ĉar mi konatiĝis kun kelkaj tre karaj kolegoj, kaj, mi povis, kun Waringhien aranĝi multon por la dua eldono de nia Gramatiko, kion mi estis povinta fari nur per duonjara korespondado. Kaj, se mi povas eviti korespondadon, mi estas ĉiam kontenta. (AD p. 40.)

Postkongreso okazis en Budapeŝto la 15-17-an de aŭgusto.

*

Kvaronjarcento en a Esperanto-movado

La E-mondo rememoris, ke en tiu jaro la dudekvina datreveno, ke nia du plej grandaj Esperanto-poetoj, J. Baghy kaj K. Kalocsay komencis sian laboron por Esperanto. En la kadro de la *X-a Hungarlanda Esperanto-Kongreso* okazinta la 16-an de aŭgusto oni aranĝis festan kunvenon honore de la du jubileantoj. La salutparolon diris d-ro Leó Lóránd, kaj li transdonis al la du eminentuloj memormedalon. La ĉeestintoj — ankaŭ eksterlandaj delegitoj — per longdaŭra aplaŭdo ovaciis la festitojn. La *Hungara Esperanto-Federacio* eldonis glumarkon kaj poŝtkarton kun la portreto de Baghy kaj Kalocsay. *Literatura Mondo* per aperigo de arĝentlibro festas la jubileantojn. (P. B.)

315 Sub titolo *La perspektivoj de la Esperanta Literaturo* ĝi aperis en: DPr p. 55-70.

* * *

14.20 (1937)

Aperis la jubilea libro pri J. Baghy kaj K. Kalocsay:

ARGÛENTA DUOPO
Red. V. Bleier kaj F. Szilágyi
Budapest: Literatura Mondo, 1937.
Du volumoj, 327 p. kun 34 p. muzik-notoj.

Pri la naskiĝo de la libro rakontas ties redaktoroj en la Antaŭparolo:

"En la komenco de 1936 kelkaj amikoj en Budapest memoris, ke niaj plej famaj poetoj: Julio Baghy kaj Kolomano Kalocsay festos sian 25-jaran jubileon de Esperantistiĝo en tiu jaro. Ili proponis indan feston de tiuj jubileoj. Pripensante la eblecon de la festado, oni starigis ankaŭ la ideon pri eldono de speciala libreto, kiu entenu kelkajn salutleterojn, rememorojn de la amikoj de la jubileantoj kaj la jubileantoj mem. La libreto estis planata je maksimume 100—120 paĝoj. Kaj komenciĝis la redaktado... Dum la redakto venis la ideo, ke la libreto devus esti kompletigita per verkoj de la du aŭtoroj, kiuj sufiĉe por iu ajn grupa festo, kiel prezento-materialo por plena vespero... En tiu momento la libro nun jam fariĝis laŭplane 200 paĝa. Kaj daŭris la redaktado... Kaj baldaŭ post unujara laboro ni prezentas al la esperantistaro verkon de 400 paĝoj..."

Vere, el la planita libreto fariĝis libreto.

En la unua volumo Baghy kaj Kalocsay parolas pri si mem kaj pri ili parolas verkisto-amikoj el ĉiuj partoj de la mondo, inter ili la plej intimaj: Reto Rossetti, Henri Vatré, Gaston Waringhien.

La dua volumo enhavas verkojn de la jubileantoj: teatraĵojn, poemojn, scenojn, muziknotojn — ĉion, kio konvenas por aranĝi programojn, amuzajn vesperojn en grupoj.

La ekstero de la libro estas iom riproĉebla. La nigra-rozkolora kovrilo kaj la verda secesio-stila rando-ornamaĵo ne vekas artan ĝuon. La portretoj kaj la karikaturaj pri la du jubileantoj — desegnaĵoj de Stefano Barta — estas bonsukcesaj.

La du jubileantoj
Desegnaĵoj de Stefano Barta

— La 2-an de majo estis jarkunsido de la *Hungara Esperanta Pedagogia Societo*. D-ro Ernő Hoffmann, la ĝistiamia prezidanto abdikis, kaj je lia propono oni aklame elektis d-ro Kalocsay por prezidanto. Kalocsay dankante por la elekto, parolis pri la gravaj taskoj, kiuj atendas la pedagogan societeton. (P. B.)

Jubilea Kongreso

El la vicoj de la Universalaj Kongresoj de Esperanto elleviĝas la 29-a okazinta en Varsovio. La redaktoroj de *Literatura Mondo* decidis ankaŭ ĉi-foje aranĝi *Literaturan Vesperon*.

La rolantoj de la programo ekzercas sin al la prezentado
Maria Szervényi (stifilino de Kalocsay), ?, ?, K. Kalocsay, Lali Blond.

Foto: Máriabesnyő, 1936

Malgraŭ la diligenteco de la rolantoj, la prezentado en Varsovio ne sukcesis. Pri ties kaŭzo raportis Georgo Verda:

"... Sub la aŭspicioj de *Literatura Mondo* okazis literatura vespero, en kiu partoprenis niaj eminentaj Kalocsay, Baghy, Totsche k. a. Sed ial la publiko, kio kutime facile flamiĝas por ĉio ajn kaj io-ajn, ĉi-foje tre malmulte entuziasmiĝis. Ĉu pro tio, ke la akustiko estis tiom malbona, ke eĉ plej forta orelstreĉo ne helpis, aŭ eble pro tio, ke la prezentataj poemoj, plejparte altspecaj gemoj de nia poezio, estis malfacile digesteblaj. Tiu ĉi dua supozo estus vere malagraba atesto pri la poezia gusto de la verda popolo Ni do prefere kulpigu la vere teruran akustikon de la granda salono en la kongresejo..."

Redaktora rimarko:

"Ni absolute konsentas kun amiko Verda, ke la kongresejo estis ideale bona, sed — ne por la vesperoj. Nia *Literatura Vespero* tute simple fiaskis pro tio. Ni preparis aranĝon de *Vespero* interesa, varia, facile komprenebla kaj amuza. Sed por tio ni bezonis efektivan scenejon kaj lokon sur la scenejo por lastaj provoj. Malgraŭ, ke nia trupo alvenis kvar tagojn antaŭ la *Vespero*, estis tute neeble fari eĉ unu provon surcenejan, ni ricevis ne regulan scenejon, nek la necesajn helpilojn, malgraŭ la vera afableco de la LKK-anoj. Ties konsekvenco estis, ke ni ne povis prezenti la lernitajn kaj ni devis duonan horon antaŭ la komenco de la vespero tute simple *improvizi* la du trionojn de la programo. Kaj poste, almenaŭ du trionojn oferi al la Moloĥa faŭko de la surda akustiko." (LM 1937/98-100.)

La 8-an de aŭgusto okazis *Festa Vespero de Veteranoj de la Esperanto Movado*. La jubilea Universala Kongreso de Esperanto dediĉis esprimi sian estimon per aljuĝo de jubilea stelo pro la pionira agado al la aktivaj batalantoj de la lingvo Esperanto. Al esperantistoj, kies partopreno en la movado datiĝas antaŭ la aŭgusto de 1905 estis aljuĝita la "ora", al esperantistoj, kies partopreno en la movado datiĝas antaŭ la aŭgusto de 1912 estis aljuĝita la "Arĝenta Jubilea Stelo". Inter aliaj Julio Baghy kaj Kálmán Kalocsay ricevis arĝentan stelon.

La 9-an de aŭgusto okazis florkronado ĉe la tombo de Zamenhof. En la nomo de HES florkronis J. Baghy, K. Kalocsay, A. Szirom kaj J. Mihalik.

Al la invito de la Radio Brünn, hungaraj eminentuloj de la Esperanto-literaturo — Kalocsay, Szilágyi, Totsche, Bleier kaj aliaj — la 19-an de aŭgusto prezentis grandsukcesan *Esperanto-literaturan Vesperon*.

La *Loka Kongresa Komitato de la XXIX-a Universala Esperanto Kongreso* eldonis ORA LIBRO-n de la Esperanto-Movado 1887-1937. Ĝi aperis ĉe *Literatura Mondo* (1937) en redakto de V. Bleier kaj E. Cense. En la libro troviĝas esejo de Kalocsay sub titolo: *La kvindek jaroj de la lingvo*.

Kalocsay kaj Baghy inter kongresanoj
Varsovio, 1937.

*

— La *Hungara Esperanto Pedagogia Societo* en oktobro aranĝis ekspozicion. Sur la muroj pendis tabuletoj pri la *Esperanta Vortfarado*. La modelojn planis d-ro Kalocsay, kaj bonege desegnis Olga Német, sekretario de HEF. La modeloj alvokis interesiĝon ĉefe ĉe la iom pli klera publiko. (P. B.)

— La 18-an de decembro oni festis la afergvidan prezidanton de HEF. Jozefo Mihalik esperantiĝis antaŭ 20 jaroj, partoprenas 15 jarojn en la E-movado. En la nomo de la *Hungara Esperanto Pedagogia Societo* Kalocsay diris salut-vortojn.

Mihalik-jubileo
En la dua vico sidas J. Baghy kaj K. Kalocsay.

— En la Jarlibro (1937) de *Internacia Esperanto-Ligo* troviĝas mencio pri honora membreco de K. Kalocsay.

— La 19-an de decembro estis aranĝita Zamenhof-vespero. Kalocsay ĉi-okaze voĉlegis sian novelon pri la juna Zamenhof. Ĝia titolo estas pruntita de la poemo de Zamenhof: *Mia penso*. Ĝi aperis en: *Esperanto* 1933/12 (400), p. 193-194; *Norda Prismo* 1957:4, p. 182-185; K. Kalocsay: *DIINO HERTHA. Noveloj*. Editoris A. Csiszár. Chapeco: Fonto, 1992. 72 p.

* * *

14.21 (1938)

— "Az ERA-Grupo agadas vigle kaj donas esperantan vivon al samideanoj en Budapest. La 7-an de majo oni aranĝis je honoro de verkisto Kalocsay vesperon kun granda sukceso. Ankaŭ Baghy kaj Kalocsay helpis levi la nivelon de literatura vespero..."(HH 1932:2, p. 12.)

Eŭkaristio

La 25-29-an de majo 1938 okazis en Budapeŝto la *Eŭkaristia Kongreso*, kies kadro oni aranĝis la *Unuan Eŭkaristian Esperantan Mondkunvenon*. En 1976 — okaze de la morto de Kalocsay — D-ro J. Kondor en *Espero Katolika* (1976:5, p. 66-67.) aperigis poemon, kiun verkis kaj dum la kongreso deklamis Kalocsay. "Mi mem aŭdis kaj vidis lin dum la deklamado" — skribis J. Kondor, kiu tiutempe studadis en Budapeŝto. Jen la poemo:

AL LA EŬKARISTIA KONGRESO³¹⁶

Ĉe la Danubo, kiu per rubando
Majesta metas inter land' kaj lando
Ligilon firman, daŭran de jarmiloj,
Kaj ne rompeblan de la hom-armiloj,
Nun gajaj himnoj, piaj psalmoj voĉas:
La korojn milda reĝo Kristo kroĉas
En nerompeble firma harmonio
Per sankta sorĉo de la komunio.
Donacon de la sango kaj la korpo
De Dio, oferitan por homaro,
Jen miloj kaj dekmiloj, ega maro
Da homoj prenis al si en absorbo
Feliĉa, dum la koroj arde batis,
Ligitaj per *vinculum caritatis*.
Kaj tra la sange disŝirita mondo
Trakuras, kvazaŭ per elekta ondo,
En centmil koroj voĉ' de unu koro,
Sublime nobliĝinta per adoro
De l' diohomo, kies sava saĝo
Surteren portis benon de l' Mesaĝo.
Kaj tiu voĉo, tiu koraklamo,
Kiel korbato de ĉiela amo,
Kun vigla vibro kaj kun ritmo festa
Disflugas ĉien sur la ter' tempesta
Kaj trovas eĥon en la koroj frataj
Samvibre viglaj kaj samrime bataj,
En kiuj vivas, per la save gvida
Reĝ' Kristo, la Homaro sendivida.
Sed tiu voĉo trovas ankaŭ murdan
Malamom, trovas nekomprenon surdan,
Vojo-perdintajn korojn, ĉe idoloj
Paganaj, reportantaj al la tero,
Kiel dum la migrado de l' popoloj,
La leĝon de la sango kaj de l' fero,

Martirojn novajn, brulon de altaroj
 De l' Krista amo kaj de l' homa indo,
 Sangverŝojn de la cirko de l' cezaroj...
 Kaj antaŭ tiu ĉi anima blindo
 Ekmuĝas tiu voĉ' milionobla
 Kaj krias tondre, en indigno nobla:
 Quo vadis, mundus? Antaŭ via salto
 En la abismon, antaŭ fal' el alto,
 Ho haltu kaj rigardu dum momento
 Pri via glora verk' vi homa gento:
 La cerbo ja, pri kiu vi fieris,
 Kiam iel en Babel, jen liveris
 Al vi nur mondkonfuzojn, kataklismojn,
 Savo-promesajn, damnoportajn ismojn,
 Mizeron en abund', kaj por instigo
 De plej terure stulta memmortigo:
 Venenajn gasojn, flugmaŝinajn bombojn,
 Por fari senekzemplajn hekatombojn,
 Maŝinojn kreis al vi la genio
 Por sklavo, kaj vi iĝis jam nenio,
 Krom sklav' de via sklavo, ĉar en sino
 Vi portas la animon de maŝino!
 Ho rekonsciu en la lasta horo
 Ke vanta estas ĉio, sen animo
 Sublime nobliginta en adoro
 De l' diohomo! Venu por pilgrimo
 Al la altar' mistera, kie fumas
 Incens' de l' amo, kie arde lumas
 La korpo kaj la sango, tra landlimoj,
 Al sankta unueco de l' animoj!
 Ĉar sola savo estas por la tero,
 De ĉi neestingeblo lum' interna,
 La dolĉa reĝ' de Kristo, reĝ' eterna!

*

— La 23-an de julio okazigita ĝeneral-kunveno de la *Hungarlanda Esperanto-Societo* elektis d-ron K. Kalocsay prezidanto.

— Ĉe J. Muusses (Purmerend) aperis kajereto kun la noveltraduko de Kalocsay: ROZINJO de Gy. Török.³¹⁷

— "ERA respektplene sciigas al la Budapeŝta esperantistaro, ke ĝi komencis la dumvintran laboron per du kursoj (unu por komencantoj, unu por progresantoj). Por la unua varbu novajn adeptojn. Ĝi komenciĝos en la lastaj tagoj de septembro. Por la dua kurso amase anoncu vin, ĉar ĝia gvidanto estos nia eminenta samideano: D-ro K. Kalocsay. La kurso komenciĝos la 10-an de oktobro..." (HH 1938:2, p. 14.)

— En la Jarlibro de UEA (1938) la nomo de Kalocsay aperis sur la listo de "Honoraj membroj".

— Aperis la dua tralaborita eldono de PLENA GRAMATIKO de ESPERANTO de Kalocsay-Waringhien.³¹⁸

— Trista evento de la jaro: ĉesis *Literatura Mondo*. En aprilo aperis ĝia lasta numero. La 78-a libro eldonita de *Literatura Mondo estis* la antologieto NAŬ POETOJ,³¹⁹ sed li jam ne venis al la legantaro.

* * *

316 La poemo unuafoje aperis en: Katolikusok Csillaga (Katolika Stelo) 1938:6-7, p. 1.

317 Vd en: OMAĜE 4-a vol. p. 53.

318 Vd en: OMAĜE 5-a vol. p. 68-74.

319 Vd en: OMAĜE 6-a vol. p. 23-24, 42.

14.22 (1939)

Kion donis la hungaroj al la homaro?³²⁰

La 26-an de februaro (dimanĉe) la Hungara Radio aranĝis la unuan E-lingvan disaŭdigon, nomatan de la esperantistaro "Danuba Voĉo". En la prelegserio la unua parolanto estis d-ro K. Kalocsay. S. John rememorante al la radio-prelego de Kalocsay skribis "... Eĉ Kalocsay estis iomete kortuŝita pri la grava okazintaĵo, kiam li menciis, ke la hungara voĉo nun unuafoje enmiksas sian melodion en la verdan koncerton de la etero..."

*

— La 12-an de marto okazis la ĝenerala kunsido de la *Hungara Esperanto-Federacio*. Por la sekvonta tri jaroj oni elektis d-ron Kalocsay kunprezidanto.

— La 20-an de majo okazis la jara kunsido de la *Hungara Esperanta Pedagogia Societo*. Pro siaj multaj aliaj taskoj K. Kalocsay abdikis pri la prezidanta posteno.

— Kvankam en 1938 ĉesis *Literatura Mondo*, la libroeldonado funkciis kelktempe. En St Vito al Tagliamento oni presigis la poemareton de Kalocsay: IZOLO.³²¹ La volumo neniam estis bindita kaj aperinta en la libromarkato, ĉar komenciĝis la dua mondmilito. Ĝia efiko estis sentebla ankaŭ en la hungara interna politiko, sekve en la Esperanta movado. Ankaŭ por Kalocsay komenciĝis la tempo de la "izolo".

320 En: DPr p. 87-93.

321 Vd en: OMAĜE 2-a vol. p. 23-24.

* * *

14.23 (1940-1944)

Esperanto dum la militaj jaroj

Tiuj jaroj estas malhelaj por la esperantistaro en Hungarlando, malgraŭ, ke la movado ne estis malpermesita. Fervoraj esperantistoj klopodis agadi eĉ la plej malfacilaj tempoj. Lajos Kökény daŭrigis literaturajn kunvenojn en sia stenografia lernejo, kie ankaŭ renomaj hungaraj literaturistoj prelegis.

Laŭ la komunikaĵo de *Hungara Heroldo* (1943:3, p. 18.) Kalocsay estis elektita honora membrode HES.

La 12-an de marto en 1944 estis aranĝita boncukcesa Kalocsay-vespero. Ĉeestis 60 personoj. La vesperon malfermis J. Mihalik kaj salutis la multmeritan pioniron d-ron Leó Lóránd, kiu ĝuste la 12-an fariĝis 75-jara. Sekvis literatura parto de la kunveno. S-rino Janovszky deklamis tri poemojn de Kalocsay. Unu el ili estis dediĉita je la honoro de Leó Lóránd. L. Kökény detale parolis pri la literatura kaj scienca agado de Kalocsay kaj prezentis lian poemon: *Homo* en hungara traduko kaj en la originalo. L. Tárkony kaj Z. Szepessy deklamis kvar poemojn de Kalocsay ĝis tiam ne presitajn. Sekvis Kalocsay: Li prezentis kelkajn el siaj novaj poemoj. La ĉeestantoj longe aplaŭdis kaj ĝojis, ke dum malfacilaj tempoj ili povis ĝui veran poeziaĵon.

Post kelkaj tagoj post tiu bela vespero, la 19-an de marto enmarŝis Hungarion la germanaj naci-trupoj. Kaj venis la fatala septembro, kiam la hungaraj faŝistoj transprenis la regadon en la lando. Eksterlandaj gazetoj kaj leteroj jam ne alvenis. En tiu monato aperis la lasta numero de *Hungara Heroldo*, kiun probable malmultaj povis enmanigi. Jam diboĉis la faŝisma potenco. Esperantistoj ne kunvenis, kaj ankaŭ mi ne sciis, kiu kie kaŝis sin. En la ondo de teroro multaj samideanoj pereis. La finan liston pri la perdiĝintaj kamaradoj ni povis kunmeti kaj la perdojn mezuri nur post longa tempo, kiam en 1945 finiĝis la milito.

Paŭlo BALKÁNYI
(1977)

* * *

14.24 (1945)

— Apenaŭ ĉesis la milito en Hungario kaj la homoj estis suprenvenintaj el la keloj, ŝirmejoj, la persekutitoj el la kaŝlokoj, kiam la esperantistoj tuj provis estigi interrilatojn unu kun la aliaj. Ili komencis aranĝi siajn — kvankam grave maldensiĝitajn vicojn. HESL kaj poste HES komencis agadi. En la plej fervoruloj vivis la deziro reorganizi la movadon.

— En januaro 1946 en la urbo Gyula aperis *Sudhungarlanda Stelo*, la unua postmilita E-gazeto en Hungario, kiu havis gravan rolon en la reorganizo. Do komenciĝis nova epoko de la hungara Esperanto-movado.

— "Grava kunsido kaj enketo estis en la hungara parlamento la 21-an de februaro 1946. La kunsido celis la hungaran Esperantan movadon akceli precipe el la vidpunkto de la laborista kulturevoluo kaj la instruado de la lingvo en la lernejoj kaj universitatoj... Z. Tiborc konatigis la rezulton de la laborista Esperanto-movado. J. Baghy rekomendis Esperanton, fortigi la internacian rilaton de la hungararo. K. Kalocsay dro parolis pri la Esperanta literaturo..."
(SSt 1946:Marto, p. 3.)

En la 3-a n-ro de SSt aperis vivsigno de Kalocsay kaj Tárkony.

* * *

14.25 1946)

— La 23-an de marto estis aranĝita amuza vespero. En la programo rolis Kalocsay, Baghy, Tárkony, Baranyai, Sárosi, Kövecses.

— Laŭ la iniciato de d-ro F. Szilágyi, la tutmonda esperantistaro organizis helposervon al la hungara esperantistaro. Laŭ la supra iniciato estis fondita ses-membra divida komitato konsistanta el: J. Baghy, P. Balkányi, B. Bleier/Berceli, K. Kalocsay kaj L. Tárkony. (P. B.)

Hungarlanda Esperanto-Kongreso en Orosháza

HESL kaj HES la 18-20-an de aŭgusto aranĝis la unuan hungarlandan kongreson post la milito kun partopreno de 148 personoj. En laborkunsido oni pritraktis diversajn movadajn aferojn. En la diskuto alparolis ankaŭ Kalocsay. Dum la kongreso okazis sukcesa vespero de *Literatura Mondo* kun partopreno de Baghy, Kalocsay, Tárkony kaj Bleier/Berceli.

*

Interpelacio en la Hungara Parlamento

Parlamentano Stefano Csurgai faris interpelacion la 28-an de aŭgusto en la *Hungara Parlamento* al la ministro por edukado pri la enkonduko de la instruado de Esperanto en la lernejoj. Post la parlamenta interpelacio oni okazigis enketojn pri la temo en diversaj uzinoj. En unu el tiuj enketoj la diskuton malfermis d-ro Kerékgyártó (magistrato), kiu estis kontraŭ Esperanto kaj pledis por la angla lingvo. Liajn asertojn refutis kamaradoj, J. Baghy, K. Kalocsay, B. Szerémi, L. Halka kaj E. Végyári. La diskuto iĝis tre larĝskala kaj profundsenca. La aŭskultantoj (ne esperantistoj) povis aŭdi, ke la neŭtrala lingvo, kia estas Esperanto, pli taŭgas por la rolo de internacia uzado ol la angla. Tamen ankaŭ tiu enketo montris, ke la esperantistoj havas multajn farendajn taskojn por konvinki la publikon pri la utilo de Esperanto." (L. Kökény).

*

— En oktobro aperis la gazeto *Hungara Esperantisto*, organo de la Esperanto-movado en Hungario.

* * *

14.26 (1947)

— Granda evento de la jaro estis la revivigo de *Literatura Mondo*. Ĝiaj vartintoj firme kredis, ke en la tria periodo de la revuo disvolviĝos ĝis tiam neimagebla vasthorizonta E-literatura riĉiĝo. Béla Berceľ/Bleier fervore daŭrigis la laboron de la mortinta frato Vilmos Bleier. La ĉefredaktoro fariĝis K. Kalocsay, kiu jam liberspire daŭrigis la laboron tie, kie li antaŭ pli ol ok jaroj delasis. La materialo de la unua numero (en januaro) esence konsistis el la restintaĵo, kiun antaŭmilite jam oni ne povis presigi.

— En la ejo de HESL la 13-an de aprilo estis aranĝita la *Dua Matineo*. J. Baghy faris tre elokventan kaj interesplenan paroladon pri la E-lingvo kaj literaturo. Aliz Hekxendorf lerte interpretis la poemon *Kisoj* de Kalocsay. L. Tárkony/Totsche deklamis sian poemon kun granda sukceso. Tiu ĉi reaktivado montras, ke la hungaraj E-verkistoj volis konservi la akiritan literaturan pozicion, ke Budapeŝto restu plu la centro de Esperanta literaturo, la "Verda Metropolo". La matineon partoprenis pli ol 50 samideanoj. (L. Kökény).

32-a Universala Kongreso de Esperanto

De 26-a de julio ĝis 2-a aŭgusto estis aranĝita en Bern la unua postmilita Universala Kongreso de Esperanto. Post multaj jaroj unuafoje estis eblo al hungaraj ŝtatanoj vojaĝi al eksterlando. Sur la listo de hungara kongres-karavano (pli ol 60 personoj) troviĝas ankaŭ la nomo de Kalocsay. T. Schwartz/Soros same aliĝis al la karavano kaj kun sia familio definitive forlasis Hungarion.

La 28-an de julio en la *Preleg-vespero de Esperanto-verkistoj* rolis J. Baghy, L. Tárkony kaj K. Kalocsay. Ĉi-lasta prelegis *Pri la arto de verstraduko en Esperanto*.³²² La temo de lia dua prelego estis: *Iom da gramatiko*.³²³

La 30-an de julio en la programo de *Varieto* Kalocsay prezentis versaĵojn inter ili sian salut-poemon. Jen:

KONGRESA SALUTO

Bern, 1947

Ho fratoj en la signo de l' Espero,
Forpasis do la tempoj de sufero!
De kiam ĉesis la homar' tempesti
L' unuan fojon povas ni kunesti,
Dek jarojn post la ora jubileo.
Kiaj dek jaroj! Kiom da hom-veo,
Kiom da mortoj, kiom da turmento!
Sufiĉaj ili estus por jarcento!

En nia historio sesdekjara
Dufoje nin jam plagis sort' amara.
Dufoje mutis pri l' Esper' la kanto,
Dufoje preskaŭ mortis Esperanto.
Koncipiĝinte de animo sola,
Ĝi kreskis je trezor' interpopola,
Ĝin vartis diligenta kolegaro,
Kaj — jen ĝi marŝis jam sen halt' kaj staro.
Amasojn entuziasmajn por si gajnis,

Sed kiam ĝi decide venki ŝajnis,
Kaj post la solvo de l' interna krizo
Triumfon volis festi en Parizo,
Ekbrulis mond' — kaj ĝia belpromesa
Juneco velkis de la flam' freneza.

Kaj kiam ĝi el sin morto ŝajna
Revivis kaj kun pli-ol-iam-ajna
Viv-povo ree marŝis tra la tero,
Kaj sur rekta vojo de prospero,
Elaste, freŝe, riĉe de kulturo
Ĝi portis siajn fruktojn de maturo, —
Atakis mondon, kun potenc eksterma,
Faŝismo, tiu monstro plej moderna:
Pri rasa supereco sonis gurdo
Por muzik-akompan' de rab' kaj murdo.
Ho tempoj de la senespera nigro!
Revenis la epok' de l' popolmigro,
Landon post land' invadis novaj gotoj,
Kaj kien ili tretis en la botoj,
Kien atingis per flugil' vesperta,
Mortis la lumo de la stelo verda.

Popoloj venkis — ili venki devis:
La bruna best' en sia groto krevis.
Ĝi krevis, sed ne mortis la faŝismo,
Ĝi revas jam pri nova kataklismo,
Kaj ĝi infektas ĉie la animojn,
Milvoĉe disvastigas dubojn, timojn,
Volante tiel kun infera ruzo
Profiti ree el la mondkonfuzo.
Rezistu al ĉi mondo-malamiko!
Se vi, en embaraso de paniko,
Parolas treme pri milit' venonta,
Vi helpas ĝia plan' senhonta.
Ho liberigu vin de l' superstiĉo,
Ke ni de tiu monstra malfeliĉo
Ne povas savi nin: ĝi venos certe.
Samideanoj! krias mi averte:
Tiu dubemo estas kvazaŭ pesto!
Deklaru plej decide, kun protesto
Al ĉiu, ĉu trompanto, ĉu trompito:
Ne estos plu, ne estos plu milito!

Ĉar en la epoko de l' atomoj
Ĉio dependas de la simplaj homoj.
Kaj ke nek la fumantaj urbruinoj,
Nek amasiĝ' de orfoj kaj vidvinoj,
Nek eĉ la esplodig' de l' tuta mondo
Ja helpas la popolojn al la fondo
De la abundo kaj de l' viv' sentima,
Ke la milito estas ne nur krima,

Sed ankaŭ stulta oferad' de sango,
Ke l' atombombo estas bumerango.
Ke sur la sojlo de la mondfeliĉo
Malsaĝ' ridinda estus neniiĝo
Kajflug' al ĉiuj flankoj de l' etero:
Ĉio ĉi estas tiel simpla vero,
Ke eĉ plej simplaj homoj ĝin komprenas.
Kaj la decid' *al ili* apartenas!
Ne eblas fari sangan politikon,
Se ili faras grandiozan strikon
Kontraŭ la puŝ' de l' mondo al abismo.
Vivu la ĉiovenka optimismo
De la frat-popoloj en labor' laŭplana
Por mondo de abundo, mondo sana!

Por tiu mondo sana, mondo paca
Ni eklaboru kun fervor' sagaca!
Kaj por ke ni ne restu eta sekto,
De nun alia estu la direkto
De nia vojo sub la stel' kvinpinta!
Jam ĉesu tiu kredo, nin trompinta,
Ke ni por la sukceso havas ŝancojn,
Se ni konvinki penas la instancojn!
Ni ne konfidu nin je la bonvolo
De potenculoj, sed je la popolo!
De sube supren — tiu marŝo traos
Ĉiujn obstaklojn, barojn forbalaos,
Ĉar voĉ' popola estas voĉ' de Dio!
Ek! Ni ne timu esti la gvardio
De la Progreso! El ebura turo
Descendi kaj batali por futuro
De l' liberemaj, laboremaj homoj,
Kaj kontraŭ la faŝistaj mondfantomoj
Inter la vicoj de l' amasoj grandaj,
Ĝis en la koroj, cerboj ĉiulandaj
Ekradikiĝos firme la konscio,
Ke la hom-paco kaj la mond-racio
Posedas en ni fortan federanton.
Ni tiel vidos venki Esperanton.

*

KONATIĜO KUN BERN

Urborigardo

?, K. Kalocsay, S-rino Rossetti, B. Berceli Vojeraro

Iom da ripozo

?, ?, B. Berceli, ?, J. Baghy, K. Kalocsay

Ĉe la blanka tablo

S-rino Rossetti, B. Berceli, ?, K. Kalocsay

D-ro K. Kalocsay kiel kongresano en Bern

Ĉi tiu kongreso grava por ni literaturistoj. Nun ni almenaŭ povas grimpi sur montpintojn por serĉi novajn horizontojn kaj novajn perspektivojn.

(D. Wranka)

*

— Jubilea festkunsido de HES okazis la 10-an de oktobro. Ĉeestis 230 personoj. La malferman paroladon diris L. Kökény. Li rememoris, ke antaŭ 60 jaroj eldonis Zamenhof la Unuan Libron, kaj antaŭ 50 jaroj Gábor Bálint gvidis la unuan Esperanto-kurson en Hungarujo. La festa oratoro estis Anna Kéthly, vicprezidanto de la *Hungara Parlamento*. J. Baghy oratoris Esperantlingve. M. Sárosi kantis plaĉe kun propre gitarakompano. K. Kalocsay, L. Tárkony kaj L. Halka deklamis.

*

— La 8-an de decembro 1947 okazis la jarkunsido de *Hungarlanda Esperanto-Societo*. La plej grava punkto de la jarkunsido estis la deklaro pri la kunfandiĝo de HESL kaj HES. La kunfandiĝo kaj ankaŭ la elekto de la gvidantaro okazis unuvoĉe. Inter la nomoj de la komitatanoj troviĝas tiu de K. Kalocsay.

— La 14-an de decembro estis aranĝita Esperanto-festo, okaze de la 60-a datreveno de la unua Esperanta libro. Pli ol 700 personoj plenigis la festan salonon de la filmteatro *Fórum*. Malferman parolon diris J. Bognár, urbestro de Budapeŝto. Kadre de la festo oni prezentis filmon: *Budapest újra él és dolgozik* (Budapeŝto denove vivas kaj laboras) kun esperantigita teksto. En la literatura programo rolis renomaj hungaraj aktoroj kaj eminentuloj de Esperanto: J. Baghy, I. Csurgai, M. Sárosi, L. Tárkony. Kalocsay prezentis sian novan poemon: *Balado pri Zamenhof*.

322 Ĝi aperis en: DPr p. 39-54.

323 Mankas skribita teksto.

* * *

14.27 (1948)

— *Literatura Matineo* la 7-an de marto estis dediĉita al la centjara datreveno de la hungara liberec-batalo. Post la enkondukaj vortoj de la prezidanto, L. Tárkony deklamis la poemon de Petőfi: *Pens' tedas min* en traduko de Kalocsay. En la festparolado de Kalocsay temis pri la rolo de Petőfi en la revolucio kaj la sintezo de lia politika kredo.

— HES aranĝos superan E-kurson. Prelegantoj: J. Baghy, K. Kalocsay, L. Tárkony, L. Kökény, P. Balkányi, A. Pechán kaj aliaj. La prelegoj okazos ĉiuvendrede de la 5-a ĝis la 7-a.

I-a Danubvala Konferenco

Signifa evento de la jaro estis la konferenco aranĝita la 22-25-an de julio en Budapeŝt. Tiu estis la unua komuna preparolo de la delegitoj de la *Danubregionaj Esperanto-Asocioj*. El la najbaraj landoj partoprenis pli ol 70 personoj. Ĉeestis delegitoj de la landaj societoj de Aŭstrio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Jugoslavio, Polio, Rumanio kaj Hungario. En la konferenco ĉeestis reprezentanto de la hungara registaro, ŝtatestretario Iván Boldizsár, kiu promesis pluan helpon de la registaro pri instruado de Esperanto en la lernejoj. La delegitoj deklaris sian opinion favore al la amikeco kaj kunlaboro de popoloj vivantaj en la valo de Danubo.

En laborkunsido de la konferenco oni preparolis la kreon de la *Danubregiona Kontakta Komitato* kies sekretario estis en Sofio, pri komuna subteno de la grava revuo *Internacia Kulturo*. En la kunsido inter aliaj alparolis ankaŭ Baghy kaj Kalocsay. (Cetere pli antaŭe la gvidantar-kunsido de HES decidis, ke la hungara redakta komitato ĉe *Internacia Kulturo* konsistu el samideanoj: D-ro Kolomano Kalocsay, Paŭlo Balkányi, Ladislao Somlai).

La 23-an okazis Kultur-vespero. S-ano Imre Ungár kaj la Biró-kvarteto prezentis pianokvinteton de Schuman. Niaj konataj verkistoj samideanoj: Julio Baghy, Kolomano Kalocsay, Ludoviko Tárkony kaj Miĥaelo Sárosi prezentis originalajn verkojn.

Kadre de la konferenco la 24-an de julio okazis traktado pri *Literatura Mondo*, kies referanto estis K. Kalocsay. (P. B.)

*

— Je la honoro de la *Oktobra Socialista Revolucio* la 14-an de novembro HES aranĝis fest-kunvenon. En la programo Sárosi kantis rusajn kantojn en Esperanta, rusa kaj hungara lingvoj kun gitarakompano. Deklamis Kalocsay sian poemon: Oktobra Odo.

— La 19-an de decembro HES aranĝis Zamenhof-festenon en la kulturĉambro Tükörstrato 4. Parolis d-ro Kalocsay, Baghy, deklamis Halka kaj Tárkony.

* * *

14.28 (1949)

Krizo en la hungara E- movado

La *Hungarlanda Esperanto-Societo* anoncis sian jarkunsidon la la 6-an de marto 1949, sed anstataŭ tio okazis nur membro-kunsido, kie oni pritraktis la sorton de la Esperanta movado. S-ro Papp, ĉefsekretario skizis la situacion kaj enfazis, ke post la liberiĝo, kiam aliaj kulturmovadoj evoluas, en la Esperanta movado montriĝas signoj de grava refalo. Nia movado ne fiksas por si programon identan kun la interesoj de la nacio, ni ne aranĝis nian rilaton al la sindikatoj, partioj. *La Hungarlanda Esperanto-Movado estas en krizo!*

La paroladon de s-ro Papp sekvis vigla diskuto. S-ano Kárpáti akcentis: *Montriĝas du vojoj: aŭ ni aliĝas al tiu direkto, kion la popoldemokracio postulas, aŭ ni pereos!* (P. B.)

*

— La 19-a Hungarlanda Esperanto-kongreso okazis en la urbeto Gyula la 4-6-an de julio. Kadre de la kongreso oni elektis novan estraron de HEA. La nomo de Kalocsay ne troviĝas sur la listo de estraro. En tiu tempo li jam malofte montriĝis en Esperantaj rondoj. Cetere tiun kongreson dum longa tempo ne sekvis pluaj en Hungario.

— La 3-a n-ro de *Hungara Esperantisto* anoncis traduk-konkurson okazonta la 18-an de septembro. Membroj de la ĵurio estas: D-ro K. Kalocsay, J. Baghy, L. Kökény, L. Tárkony, d-ro G. Karczag.

— Granda tristo de la jaro 1949, ke la julian-aŭgustan numeron de *Literatura Mondo* ne sekvis pluaj. La fama revuo mortis triafoje kaj ne nur financaj kaŭzoj. Depost aŭgusto jam neniu E-gazeto aperis. Ĉesis la Esperant-lingva radio-dissendo. Pli kaj pli influis la personkulto, akriĝis la "malvarma milito", komenciĝis muteco de Esperanto, komenciĝis nova "izolo", sed ne nur por Kalocsay.

* * *

14.29 (1950-1953)

Silentaj jaroj

La silenton en nia movado kaŭzis, ke la ŝtata organizo donis buŝan atentigon, ke Esperanto estas ne dezirata en nia lando. La ĉefa argumento estis — kvankam neniam ie skribita — ke Esperanto estas "kozmpopolita" lingvo. Do nia societo memvole ĉesis, ĉar la tiamaj gvidantoj oponiis, ke *la uzado de Esperanto ne estas "laŭtempa", ĉar estas aliaj, gravaj, kaj pli urĝaj aferoj en la lando.* (P. B.)

— La gazeto *Esperanto en Skotlando* sian novembran numeron en 1951 dediĉis al la 60-jara Kalocsay. Poeto-fratoj per versaĵoj salutis la 60-jaran Kalocsay. El la poemoj — poste aperigitaj ankaŭ en KVAROPO — elsonas angoro pro la mutiĝo de Kalocsay: Jen versoj de W. Auld:

...
Nun vi silentas. Ie en izolo
vi sidas sen ekstaz' sen parolo:
ĉu en ebura tur'? Aŭ kel' prizona?
*

Kaj el la poemo de R. Rossetti:

...
Ja vi silentas nun rebuse.
Kiel solviĝos la enigmo?
Ho ve, al mia demandsigno
vi eble jam respondos ruse...
...

*

1954. Mateniĝis

En la KAL-ĈI Dokumentaro kuŝas letero de Waringhien datumita la 23-an de novembro 1954. Jen:

"Mi ricevis antaŭhieraŭ vian belan leteron de la 12a de la kuranta monato kaj tio ĝojigis min supermezure: ĉar mi vidas, ke nia korespondado plu daŭras, kaj vi denove, kvankam certe kun granda fortostreĉo kaj tempodamaĝo, povas zorgi pri Esperanto. Mi legis kun intereso, ke ankaŭ en via lando la rigoro de la postmilitaj tempoj iom malakriĝis..."

La famo pri la vivsigno de Kalocsay rapide disvastiĝis.

"Tuj kiam ekkuris la novaĵo pri via reapero sur la literatura kampo — skribis G. Waringhien en respondletero al Kalocsay la 17-an de januaro 1955 — el ĉie alvenis al mi leteroj, demandantajn detalojn kaj petantajjn, ke mi sendu al vi amikaĵon de la subskribantoj: aparte el Ĉeĥoslovakio: Pumpr, Kamaryt, Ginz, Urbanova ktp. Kompreneble ĉiuj skotoj: Rossetti, Auld, Francis ktp., Morariu kaj M. Boulton..."

* * *

14.30 (1955)

1955. Denove komenciĝis Esperanta vivo

— En januaro okaze de la 64-a naskiĝtago de J. Baghy kelkaj kunvenis por modesta soleno. Ĉeestis ankaŭ Kalocsay. Li konigis la diplomatan lukton kaj sukceson de Esperanto ĉe UNESKO, kaj prezentis sian ĉi-rilatan poemon: *Rondelo de Montevideo*.

— Entuziasmaj esperantistoj komencis reorganizi la movadon, ĉefe en Sud-Hungarlando kaj Budapeŝto. Ĉiu gazeto, presaĵo, libro, kiu venis el alia lando de amikoj, estis avide akceptita, ĝoje legata kiel trezoro. En urbetoj oni maŝinskribe kopiis la gazetojn (ekzemple la *Paco-n*) kaj cirkuligis ilin inter la samideanoj.

— La 4-an de aŭgusto fondiĝis la *Budapeŝta Esperanto Grupo*. La 17-18-an de septembro jam estis aranĝita en la ĉefurbo *Landa Esperanto-Packunveno*. Kelkdekoj grupigis en la lando ĉirkaŭ la *Mondpaca Esperanto Movado*, kies revuo rondiris inter ili. Kelkaj uzis la kunvenojn de packomitatoj por tie konigi sciigojn venintajn el diversaj landoj, samtempe konigante la utilan kunagadon de Esperanto. Tiu ĉi kunagado akiris ankaŭ la subtenon de la *Hungara Packonsilantaro*. (P. B.)

* * *

14.31 (1956)

— Ĉi-jare Esperanto-grupoj kaj fakgrupoj fondiĝis unu post la alia. Stencile multobligita monata informilo *Verda Vojo* komunikis sciindaĵojn hungarlingve.

— La 11-an de marto en la kulturdomo de la 18-a distrikto estis aranĝita *Esperanta Literatura Matineo*. Ĉefrolantoj estis J. Baghy kaj K. Kalocsay.

— La 13-an de majo okazis pac-renkontiĝo kun 120 partoprenintoj. En la programo rolis J. Baghy, M. Sárosi kaj K. Kalocsay, kiu prezentis en siaj tradukoj poemojn de E. Ady kaj A. József.

— La 11-an de julio aperis ministeria dekreto, laŭ kiu la hungara Esperanto-movado agados en kadro de la *Popolkleriga Ministerio*. Fondiĝis la *Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro*. Ĝia prezidanto fariĝis J. Baghy. De tiu jaro la reprezentantoj de la hungara Esperanto-movado denove partoprenis la Universalajn Kongresojn. Oni instruis Esperanton en kelkaj lernejoj. En aŭgusto aperis la unua hungara eldono de *Paco*, oficiala organo de MEM. Ĝi estis la unua presita esperantlingva presaĵo ekde ses jaroj en Hungario. (P. B.)

— La *Komuna Konversacia Klubo* (Kopenhago) eldonis la verse reverkitajn fablojn: EZOPA SAĜO.³²⁴ La verko pruvas, ke Kalocsay ankaŭ dum la "silentaj jaroj" laboris eĉ se por la tirkesto. La apero de tiu ĉi volumo estas dankebla al la klopodo de P. Thorsen.

— En tiu tempo Kalocsay malofte estis videbla inter esperantistoj. Grava malsano baris lin viziti klubejon.

Kalocsay-festo

"En la Budapeŝta "Paca Rondo" pli ol 150 esp-istoj solenis la 65-an naskiĝtagon de K. Kalocsay, kiu post longa malsano kaj grava operacio la unuan fojon aperis antaŭ la publiko. J. Baghy enkondukis la vesperon per festparolado... Ceterej rolantoj estis s-ino Chierer, la fileto de Prof. Pechán, M. Sárosi, L. Tárkony, L. Kökény. La plej profundan impreson ricevis la publiko tute nature el la persona prezentado de la solenata majstro, kiu legis klasikajn tradukojn al la publiko." (Norda Prismo 1956:4-5, p. 14.)

*

— Post kelkaj tagoj de la Kalocsay-festo, la 23-an de oktobro 1956 eksplodis revolucio kaj dum kelkaj monatoj denove estis paŭzo en la Hungarlanda Esperanto-movado. En tiu tempo Kalocsay denove estis malsana. Komplikacio post la reno-operacio devigis lin en liton. Dum la tagoj de la "renversiĝo" la loĝejo de Kalocsay (en la strato Mária n-ro 34) parte ruiniĝis. Multaj libroj de lia biblioteko brulpereis kaj neniigis valoraj manuskriptoj kaj esperantaĵoj.

324. Vd en: OMAĜE 2-a vol. p. 25-27.

* * *

14.32 (1957)

— La revolucio nur haltigis, sed feliĉe ne ĉesigis la agadon de la esperantistoj. Jam en februaro denove funkciis la *Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro*, kaj en kluboj agadis Esperanto-grupoj.

— La 13-14-an de aprilo estis aranĝita en Budapeŝto *Esperanto-Tago*. Festparolon diris J. Baghy, prezidanto de HEK. En la festa kunveno partoprenis ankaŭ la ankoraŭ iom malsana Kalocsay kaj prezentis sian poemon: *Je la mortotago de Zamenhof*.

— Granda literatura evento estis en tiu jaro la apero de la impona poemvolumo: LA FLOROJ DE L' MALBONO de Baudelaire, en traduko de Kalocsay, Waringhien kaj aliaj.³²⁵

— Okazis festkunveno la 8-an de novembro en la *Paco Esperanto-Fakrondo* de la V-a distrikta kulturhejmo. Parolis kaj deklamis J. Baghy, K. Kalocsay kaj L. Kökény. Kalocsay prezentis sian novan poemtradukon: *Per plena voĉo* de Majakovskij.

325 Vd en: OMAĜE 3-a vol. p. 66-68.

* * *

14.33 (1958)

— La januara n-ro de *Bulteno* (HEK) komunikas nomlistom de la estraro de la *Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro*. Laŭ tio K. Kalocsay estis estrarano.

— Okaze de la 57-a naskiĝtago de J. Baghy en januaro estis aranĝita festa kunveno. Ankaŭ Kalocsay gratulis la poeto-fraton kaj omaĝe al la festito, li voĉlegis en sia traduko poemon de S. Petőfi: *Tibisko*, kiu tiatempe tre plaĉis al Baghy. La programon riĉigis la kanto kaj gitar-ludo de M. Sárosi, kiu interpretis muzikigitajn poemojn de Baghy kaj Kalocsay. La publiko kune kantis hungarajn popolkantojn esperantigitajn de Kalocsay.³²⁶

Kalocsay-Vespero en Riga (Raporto de Lidia Lange el Latvio)

La 16-an de julio en Riga okazis belega vespero, kiam ni ĝuis multajn arte prezentitajn Esperantajn poemojn, plejparte ilia aŭtoro estis s-ano K. Kalocsay. Deklamis nia gasto, la rusa artisto el Moskvo, s-ano N. N. Rytjkov. Ĉar li preferis la poemojn de K. Kalocsay, la vespero fariĝis improvizita Kalocsay-vespero.

Elkorajn salutojn ni sendis ankaŭ al la aliajn samideanojn en Budapest. La kunvenintoj sendis apartan bildkartan saluton al s-ano Kalocsay, laŭ kio pleje plaĉis al la aŭskultantoj la fama poemo "Sonorilludo". (Bulteno HEK 1958:10-12, p. 3.)

*

— La 11-an de aŭgusto fondiĝis Esperanto-fakgrupo *Konkordo*. La prezidanto de la grupo fariĝis K. Kalocsay.

— La 6-an de septembro kunsidis la estraro de la *Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro*. La ĉeestantoj decidis aranĝon de *Landa Esperanto-Konferenco*. Pri la antaŭprepara laboro estis komisiita inter aliaj ankaŭ K. Kalocsay.

— En la grupo *Konkordo* d-ro I. Boda parolis pri la "Logika Esprimkapableco de Esperanto". Detale alparolis ankaŭ K. Kalocsay.

— La 10-an de decembro en *Konkordo* oni rememoris pri la *Hungarlanda Esperantista Societo Laborista* fondita antaŭ 45 jaroj. Fest-paroladon diris József Nagy, iama prezidanto de la societo kaj Paŭlo Balkányi, redaktoro de *Hungara Revuo* en 1919. György Krausz deklamis poemon de Zseni Várnai: *Laborista kanto* en traduko de K. Kalocsay.

— La 15-an de decembro okazis Zamenhof-festo en *Konkordo*. Prezidiis d-ro Kalocsay.

326 En la festa kunveno pretigitan sonbendon gardas la KAL-ĈI Dokumentaro.

* * *

14.34 (1959)

— La 11-an de januaro okazis kunsido de la *Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro*, kie oni konsideris, ke d-ro Kalocsay — pro sia kvardekjaraj E-literaturaj agadoj — meritas konvenan ŝtatan distingon. La kunsido unuanime akceptis la decidon por fari ĉi-rilatan proponon al la ŝtataj instancoj.

— Vere solena vespero estis donacita al la kunvenintoj en la grupo *Konkordo*. La 31-an de marto parolis kaj deklamis tie la angla-esperantista poetino Marjorie Boulton. Ŝi konigis la situacion de la nuna Esperanta mondliteraturo, la diversajn skolojn, ties agadon. Kortuŝe ŝi memoris, ke la hungaraj Esperanto-poetoj, la *Budapeŝta Skolo* donis instigon kaj direkton al la nuna alilandanoj, anglaj, skotoj ktp. La varmege akceptitan gaston en la nomo de budapeŝtanoj salutis d-ro K. Kalocsay, prezidanto de Konkordo. (Verda Vojo 1959:2, p. 4-5.)

Boulton vizitis ĉe Kalocsay
kaj faris foton pri la du granduloj
Baghy kaj K. Kalocsay.

— En la *Zamenhofa tago* en Varsovio J. Baghy voĉlegis la poemon de Kalocsay: *Centjara estus jam la koro*. La publiko longe aplaŭdis la poemon kaj la voĉleganton.

— La 15-an de decembro okazis *Zamenhof-festo* en *Konkordo*. Prezidiis K. Kalocsay. Ŝtatpremiita skulptisto Tamás Gyenes okaze de a naskiĝtago de D-ro Zamenhof, transdonis buston de Zamenhof. Ĝin danke transprenis K. Kalocsay, prezidanto de la fakrondo. Festparolis J. Baghy. K. Kalocsay voĉlegis sian rakonton el la vivo de la juna Zamenhof: *Mia penso*. Muziko kaj kanto de M. Sárosi, kaj la finaj vortoj de P. Balkányi estis la ĉefaj programpunktoj. Kelkaj gazetoj kaj la hungara radio menciis la sukcesintan feston.

Kalocsay apud la statuo de Zamenhof

— La *Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro* solene festis la centjaran naskiĝ-datrevenon de L. Zamenhof. La solenaĵo okazis en la *Nova Urbodomo*. Sur la muro pendis Zamenhof-bildo kaj cifero 100. Ĉeestis pli ol 500 personoj, inter kiuj estis pluraj elstaraj gastoj, i.a. la justicministro, d-ro F. Nezvál.³²⁷ Festparolon diris J. Baghy. Ĉeestis ankaŭ Kalocsay kaj voĉlegis sian poemon: *Centjara estus jam la koro*.

Sur la podio

De maldekstre: L. Márton, M. Kenesei, K. Kalocsay,
Gy. Sulyán, ?, en la fono J. Mátéffy.

327 Dum la jaroj 1977-1986 li estis prezidanto de la Hungara Esperanto-Asocio.

* * *

14.34 (1960)

— La Poŝtista Esperanto-Rondo aranĝis prelegad-serion. La 31-an de marto la preleganto estis K. Kalocsay. Li parolis pri *La poeziaĵo de Petőfi en la Esperanta literaturo*.

L. Kökény enkondukas la prelegon de Kalocsay M. Sárosi kantas kaj gitarludas
Ĉe la tablo sidas Kalocsay kaj Pechán.

Du knabinoj rolas
L. Tárkony kaj Kalocsay en la fono

Literatura Vespero honore al F. Szilágyi

En *Konkordo* oni aranĝis la 6-an de junio literaturan vesperon pri la vivo kaj verkado de d-ro Ferenc Szilágyi, kiu en tiu jaro fariĝis 65-jara. La ĉeestantoj festis varme d-ran Szilágyi, la ĉefredaktoron de *Norda Prismo*. Li antaŭ pli ol kvaronjarcento devis forlasi sian patrujon pro la prema senlaboreco.

Sinsekve parolis d-ro Kalocsay, P. Balkányi, L. Kökény, L. Halka kaj J. Baghy pri ilia iama kunlaboranto en la movado, ĉe *Literatura Mondo*, ĉe la ENCIKLOPEDIO de ESPERANTO. La prelegantoj prezentis el liaj verkoj, revokis personajn rememorojn kaj skizis la humorplenajn, neniam laciĝantan karekteron de F. Szilágyi. *El liaj interesaj, ofte spritaj, kolorriĉaj rakontoj kun eleganta kaj moderna stilo kelkaj povus fieri, aparteni al iu ajn nacio* — diris K. Kalocsay. M. Sárosi ĉarmigis la vesperon per gitarluda kantado laŭ propraj melodioj. (L. Kökény).

*

— La 29-30-an de oktobro la *Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro* kunvokis la estraron por preparoli pli taŭgan formon al la gvida agado. La ĉeestantoj unuanime konsentis fondi organizaĵon kun statuto sub la nomo *Hungara Esperanto-Asocio*. Kadre de la kunveno — en la festa salono de la *Poŝtista Kulturdomo* — Valéria Benke, reprezentanto de la *Ministerio por Kulturaj Aferoj*, transdonis distingajon "Pro la Socialisma Kulturo" al tri kulturlaborantoj de Esperanto. Nome: Julio Baghy, D-ro Kálmán Kalocsay kaj Mária Kenesei. D-ro Kalocsay dankante en la nomo de distingitoj, akcentis, ke tiu honorigo de la ministro pruvas unuavice la rekonon de la esperantista laboro.

Sur la jako de Kalocsay brilas la medalo

* * *

14.36 (1961)

— La 7-an de januaro la estraro de HEA kunsidis kaj fondis fak-komisionojn, destinitajn plenumi la grandskalajn laborplanojn. La gvidanto de literatura fakkomisiono fariĝis d-ro K. Kalocsay.

— En januaro aperis monata informilo *Hungara Esperantisto*, organo de HEA. En la redakto de d-ro István Nagy la nivelo de la gazeto fariĝis pli kaj pli alta. Ĝi donis raportojn, sciigojn pri la tuta Esperanto-movado, havis literaturan parton, pritraktis gramatikajn demandojn.

Kunveno de veteran-esperantistoj³²⁸

La 22-an de januaro kunvenis proksimume 170 veteran-esperantistoj en la kulturdomo de Pesterzsébet (kvartalo de Budapeŝto). La ĉambregon ornamis sloganoj: "Per Esperanto por la Hungara Popolrespubliko", "Per Esperanto por la Mondpaco". Ekspoziciejon el koloraj bildkartoj lerte aranĝis István Egervári.

Emocie eĥis en la koroj la saluta festparolo de la vicprezidantino Borbála Szerémi, kiu memoris tiujn veteranojn de la movado, kiuj ne povis veni, kiuj mortis, precipe kiuj sub la verda flago laboris por la nobla celo de Esperanto.

En la kulturprogramo rolis ankaŭ Kolomano Kalocsay. Jen:

Karaj Gesamideanoj. Kiom surprize trafis min la eldiro el la buŝo de nia kara samideano Német, ke en la programo sekvos Kalocsay. Tamen mi provos fari tion.

Kiam mi venis tien, al inter veteranoj, mi pensis, ke eble mi devus alglui barbon, por ke mi bone konfirmiĝu al tiu honorinda societo. Sed poste, kiam mi ekvidis kiuj parolis ĉi tie — kiel samideano Balla, samideano Mezei, samideano Barta, samideano Magyar, samideano Bubo, ktp.— mi vidis, ke mi venis inter junulojn.

Nu, alia afero, ke mi devas paroli. Ni havas sekretarion, kiu nomiĝas Frigyes Nemes. Ĉu vi konas lin? Li ne estas fidinda persono, ĉar li garantiis, ke mi ne devas tie paroli, estos neniam kulturprogramo. Tamen mi havis la suspekton, tiel en la lasta momento de mia foriro, kiam mi ricevis la lastajn konsilojn de la edzino: "ne malvarmumu" ktp.— tiam mi metis en mian teknon la libron "Ezopa Saĝo" kaj el tio mi laŭtleĝos al vi unu poemon, iom longan, sed se vi enuos, nur diru, ke sufiĉe! kaj mi tuj ĉesos paroli. Do la fablo estas: "La cerbo".

La publiko kun granda aplaŭdo honoris la prezentadon de Kalocsay. Neforgesebla ĝuo estis la fortepianludo de Imre Ungár, kiu virtuoze prezentis el la muziko de Chopen kaj Bartók. Mihály Sárosi prezentis kun gitarakompano valson el la opereto de J. Baghy. Sekvis la korincita *Kanto de vagabondo*, poemo kaj muziko de Kalocsay. Fine la publiko kune kantis hungaran popolkanton: *Tra la strato, tra la strato...* en traduko de Kalocsay.

Sekvis bona tagmanĝo, dume vigla babilado. La agrabla etoso ĝis malfruaj postagmezaj horoj kuntenis ĉe la tabloj la paroprenantojn. (P. B.)

Ĉe la prezidanta tablo

De maldekstre: A. Tóth, F. Nemes, J. Baghy, K. Kalocsay, B. Szerémi, filo de Pechán.

En la dua vico: ?, s-rino Ruzsits, L. Kökény, antaŭ la tablo sidas L. Rieth.

Ĉe la blanka tablo

D-ro J. Mátéffy, K. Kalocsay, M. Kenesei, M. Jurák, L. Tárkony.

En la unua vico staras: L. Kökény, ?, F. Nemes, M. Rieth, J. Baghy,

?, s-ino Ruzsits, S. György.

Maldekstre en la fono: I. Bácskai, A. Pechán, P. Balkányi

Veteranoj kaj gejunuloj
Dekstre: J. Baghy (kun okulvitroj), apude K. Kalocsay,
malantaŭ ili videblas P. Balkányi.

*

— En *Konkordo* en junio Kalocsay prezentis tre interese kaj bonhumore la verkadon de la konata esperantisto Raymond Schwartz. (HE 1961:7, p. 5.)

— Soveta docento Viktor Gruško el Rostov sur Don vizitis Hungarion en septembro, kun la turista grupo el Rostov. En la klubejo de la *Fervojista Esperanto-Grupo* proksimume 50 samideanoj kolektiĝis por saluti la gastojn. V. Gruško kunportis donace sonbendon surhavante muzikon, kantojn, deklamojn, inter ili la konata moskva aktoro Nikolaj Rytjkov recitas poemojn de Baghy kaj Kalocsay. (P. B.)

Sur la balkono de Kalocsay
V. Gruško, J. Baghy, K. Kalocsay.
1961 septembro

Kalocsay-vespero en Moskvo

La 24-an de septembro estis aranĝita la literatura festa kunveno. En la *Moskva Kulturdomo de Medicinistoj*, kie nun fakte funkcias *Moskva Esperantista Klubo*, kolektiĝis ĉirkaŭ 100 gesamideanoj... Sur la podio inter floroj pompis portreto de D-ro Kolomano Kalocsay, desegnita de konata moskva artistino Helena Afanasjeva. Sur la muro pendis, grandlitere presita Kalocsay-traduko de *La Internacio*. La preleganto, Moskva aktoro Nikolaj Rytjkov, kiu sin nomas adepto de la *Budapeŝta Skolo*, en horlonga interesege prelego brile kaj trafe skizis la biografion kaj karakterizis la verkojn de Kalocsay... Post la paŭzo, N. Rytjkov recitis plurajn poemojn de Kalocsay, kiuj verve sonas kristale klasikaj. Fine de la solenaĵo la ĉeestantoj starante kantis la novan tradukon de la *Internacio*.

(M. Farkas en: HE 1962:1, p. 8-9.)

Nikolaj Rytjkov sur la podio

*

Kalocsay 70-jara

En la grupo *Konkordo* la 7-an de oktobro estis aranĝita festa kunveno honore al Kalocsay. M. Khek, J. Baghy, d-ro K. Mezei, S. Csóra, M. Sárosi, L. Halka, L. Kökény, P. Balkányi, d-ro I. Bácskai rememoris per varmaj vortoj pri la sindona kaj longa Esperanta laborado de la festito. Kalocsay dankis la rememorojn kaj deziris al la pli junaj generacioj, ke ili facile kaj malpli pene atingu la sepdek-jaran aĝon.

Al la riĉigo de la arta programo kontribuis ankaŭ Kalocsay: Li interpretis esperantigitajn poemojn de Heine: *Vintra fabelo* kaj *La poeto de Firduzi* en la traduko de Waringhien. L. Halka voĉlegis la poemon de M. Boulton: *Kolomano Kalocsay*. La poemon de Kalocsay: *Protesto* deklamis L. Tárkony. Fine P. Balkányi klubestro transdonis al festito Esperanto-memoraĵon. (P. B.)³²⁹

*

Sukcesplena Kalocsay-solenaĵo en Miskolc

Okaze de la 70-a naskiĝtago de K. Kalocsay — je la iniciato de la iama lernejkamarado, d-ro Ludoviko Győry-Nagy — la 26-an de oktobro 1961 estis aranĝita festa kunveno en la urbo Miskolc, kie Kalocsay pasigis siajn junulajn jarojn.

La riĉan programon enkondukis la Esperanta Himno, kantita de vira ĥoro de la fervojista veturil-riparejo de Miskolc. La festparoladon diris Ludoviko Kökény, konigante la vivon kaj verkistan agadon de la jubileulo. La grandefika parolado — kolorita per deklamoj — vekis longdaŭran aplaŭdon, grandan furoron. En tia entuziasma etoso komencis sian prelegon Kalocsay pri *Esperanto kaj literaturo*.³³⁰

Meritas dankon nia samideano Stefano Pál (tiama sekretario de la *Departementa Komitato de Hungara Esperanto-Asocio en Borsod-Abaúj-Zemplén*), kiu surbendigis la tutan programon, konservante ĝin por la posteuloj.³³¹ La E-grupo en Mezökövesd la 3-an de novembro aŭskultis la sonbendigitan festenon.

*

— Konkordo agas. Interesan paroladon faris Kalocsay pri ata/ita. (NB 1961:10, p. 4.)

— En la grupo *Konkordo* en decembro oni memoris pri la forpasinta Emeriko Baranyai (EMBA). P. Balkányi konigis mallonge lian verkadon kaj prezentis el liaj poemoj. Anstataŭ la malsana Kalocsay, Simon György prezentis el la magnoservo de HEA belan programon. Oni aŭskultis la voĉon de Baghy, Kalocsay, Sárosi kaj M. Khek.

328 La programon sonbendigis S. György. Kopio en la KAL-ĈI Dokumentaro.

329 Sonbendo en la KAL-ĈI Dokumentaro.

330 La hungarlingvan prelegon de Kalocsay esperantigis d-ro I. Nagy. Aperigita en: DPr p. 117-121.

331 Sonbendo ĉe I. Pál, kopio en la KAL-ĈI Dokumentaro.

* * *

14.37 (1962)

— La 18-an de februaro en la Sovetunio oni aranĝis solenan vesperon, dediĉitan al la klasikulo de la rusa poezio A. S. Puŝkin. La vesperon malfermis per enkonduka vorto profesoro E. Bokarev. En la arta parto de la vespero estis recititaj diversaj verkoj de Puŝkin en Esperanto. La aktoro Rytjkov recitis filozofian funebran poemon en traduko de K. Kalocsay: "Sur strato de tumulto bruaj". La vesperon ĉeestis pli ol 70 personoj. (Medicina Revuo 1963:Decembro, p. 19.)

— La studon de prof. Waringhien pri Heine ni povis aŭdi en la kunveno de *Konkordo*. Pro malsano de d-ro Kalocsay la studon laŭtlegis P. Balkányi. Kvankam la prelego estis pli longa ol la kutimaj programoj, ĝian valoron pruvis, ke la aŭskultantoj — eĉ tiuj, kiuj volis pli frue foriri — kun intereso restis ĝis la fino de la voĉlegado. (HE 1962:3, p. 4.)

IFEF-kongreso

La plej granda sukceso de la hungara fervojista movado estis la aranĝo la 14-a *Internacia Fervojista Esperanto-Kongreso* la 5-11-an de majo en Budapeŝto. Ĉeestis la kongreson pli ol 800 eksterlandanoj. La hungara poŝto eldonis E-poŝtmarkon. La hungara sekcio de IFEF aperigis tre bonkvalitan gramofondiskon. En la programo estas du tradukoj de Kalocsay: *Fraŭlmokado* (hungara popolkanto, kun muziko de B. Bartók); *Lude, petole gajas la kor'* (fragmento el la "Legendo de Sankta Elizabeto". Poemo de O. Roquette. Muziko F. Liszt). La ĉefaj aranĝantoj de la kongreso estis: D-ro I. Bácskai, L. Kapitány, d-ro I. Pethes, S. Csóra, d-ro A. Tarnay, B. Szilárd.

*

— En la provinca urbo Gyula la 1-4-an de julio oni aranĝis la I-an *Someran Esperanto-Universitaton*. En la programo estis anoncita prelego de Kalocsay sub titolo: *La Esperanto literaturo kaj ĝia signifo*. Bedaŭrinde la sanstato de Kalocsay estis tre malstabila kaj li ne povis veturi al la aranĝaĵo. Do la publiko devis aŭskulti lian prelegon en mia malpli elokventa voĉlegado. (P. B.)

Jubilea kongreso

Antaŭ 50 jaroj en 1912 okazis la unua *Hungarlanda Esperanto-Kongreso*. La 28-29-an de julio estis aranĝita la jubilea kongreso en Budapeŝto. En la kultur-salono de la *Ĉefurba Konsilantaro* preskaŭ ĉiu sidloko estis okupitaj (ĉeestis ĉ. 700 personoj). En la prezidantaro de la kongreso troviĝis I. Kossa, ministro pri la poŝto kaj trafiko, Á. Szakasits, prezidanto de la *Tutlanda Packonsilantaro*.³³² La festparoladon diris J. Baghy.

Vespere estis aranĝita arta programo konsistanta el 16 eroj. La plej grandan aplaŭdon ricevis la unuakta komedio de Heltai-Makai: *LA PAĜIO DE L' REĜINO*³³³ en traduko de K. Kalocsay. En la teatraĵo rolis talentaj esperantistoj: M. Sárosi, J. Baghy, E. Radvánszky, G. Hattyár, M. Sarkady. T. Ujlaky-Nagy lerte kaj varie anoncis la programerojn. (D-ro I. Nagy).

*

— La unuaj honoraj membroj de la *Internacia Esperanto-Muzeo*: Julio Baghy, Andreo Cseh, d-ro Kolomano Kalocsay. (HE 1962:7, p. 17.)

— En la grupo *Konkordo* oni solenis s-anon Alfonso Pechán okaze de lia 40-jara agado en la Esperanta movado. Lin salutis la prezidanto de la grupo, d-ro K. Kalocsay. En la ĉi-foje aranĝita literatura programo Kalocsay parolis pri la vivo kaj verkado de la fama rusa esperantisto: Vasilij Nikolajeviĉ Devjatnin okaze de la centjara datreveno de lia naskiĝo.

(P. B.)

— D-ro K. Kalocsay okaze de la kvaronjara membrokunveno de la grupo *Konkordo*, parolis tre interese kaj detale pri la vivo kaj verkado de la pola esperantista poeto, verkisto kaj ĵurnalisto Leo Belmont. (HE 1962:12, p. 10.)

En decembro estis aranĝita *Zamenhof-vespero* en la grupo *Konkordo*. K. Kalocsay prelegis pri la kreinto de Esperanto.³³⁴ (P. B.)

332 Post la dua mondmilito (1945) li plenumis altrangajn ŝtatajn oficojn: parlamentano, vicĉefministro,

prezidento de la Hungara Popolrespubliko.

333 Vd en: OMAĜE 4-a vol. p. 42-45; ĉi-libre: p. 12, 24.

334 La prelego sub titolo *Zamenhofs tago, 1962* aperis en: HFM 1967:4, p. 48-50, repr. en: DPr p. 111-116.

* * *

14.38 (1963)

— En la grupo *Konkordo* Kalocsay rememoris pri la morto kaj agado de Károly Bodó, kunlaboranto de la iama *Literatura Mondo*. Alifoje li parolis pri la vivo kaj verkaro de la rusa esperantista verkista-poeto: V. Eroŝenko.³³⁵ (HE 1963:5, p.6.)

— La Esperanto-klubo de *Elektra Maŝino- kaj Kablofabriko* en Budapeŝto la 7-an de marto oni malfermis dektagan Esperanto-ekspozicion okaze de la 50-jara jubileo de la uzino. En la uzina kulturdomo estis metita Esperanto-flago. La ekspozicion — titolitan "Por la amikeco de popoloj"— estas komuna aranĝado de F. Dobos kaj I. Egervári. La ekspozicion vizitis ankaŭ Baghy kaj Kalocsay.

Antaŭ la angulo de Ŭzbekistano
De live: J. Baghy, M. Kenesei, K. Kalocsay,
F. Dobos, en la fono I. Egervári.

— La sesdek-jaran poeton, L. Tárkony oni salutis la 8-an de aprilo en la grupo *Konkordo* en amika rondo. D-ro Kalocsay verve kaj emocie parolis kun sia kutima bonhumoro pri la vivo kaj verkado de la ĉiam juna kaj modesta Tárkony, vigla kunlaboranto kaj artkritikisto de la iama *Literatura Mondo*. Li prezentis kelkajn belajn poemojn de Tárkony el diversaj kreo-epoko. Poste Tárkony voĉlegis kelkajn el siaj plej novaj poemoj, kiuj akiris tre varman akcepton. (HE 1963:6, p. 2.)

— La 5-an de julio alvenis al Hungario grupo de polaj pedagogoj sub la gvidado de Halina Krajska. La pedagogan grupon invitis Khek Mici Jurák, prezidantino de la Esperanto-Rondo de *Egressy Klubo*. La 17-an de julio oni aranĝis *Polan-Hungaran Amikan Vesperon*. En la hungara parto de la programo rolis ankaŭ Baghy kaj Kalocsay. Ambaŭ deklamis kaj prelegis el siaj verkoj. Granda estis la sukceso kaj la aŭskultantaro longe solenis la aŭtorojn. Same akiris grandan plaĉon kaj aplaŭdon M. Sárosi per siaj belaj kantoj. (HE 1963:8, p. 6.)

— En la *Egressy Klubo* la 16-an de oktobro oni aranĝis spontanegan festeton okaze de la naskiĝtago de la mondfama Esperanto-poeto: prof. d-ro Kolomano Kalocsay. S-ano Miĥaelo Sárosi arte prezentis kun gitara akompano kelkajn malnovajn kaj novajn versaĵojn de la poeto. La ĉeestantoj multe ĝuis la ĉarman kanton kaj la originalan muzikon de la artisto. D-ro Julio Radó varme gratulis s-anon Kalocsay okaze de lia universitata profesora nomumo. (HE 1964:1, p. 5.)

335 La prelego pri Eroŝenko aperis en: DPr. p. 71-77.

* * *

14.39 (1964)

— Bela festo okazis la 13-an de majo en la *Egressy-klubo*. La klubanoj festis la 400-jaran jubileon de Shakespeare. La festparolon faris T. Réthelyi. Éva Farkas deklamis sonetojn de Shakespeare en la traduko de Kalocsay. (HE 1964:7, p. 3.)

— En la grupo *Konkordo* prof. d-ro Kalocsay, prezidanto de la grupo, interese prelegis pri la unuaj jardekoj de la Esperanta literaturo. (HE 1964:12, p. 4.)

— En *Konkordo* okaze de la naskiĝtago de d-ro Kalocsay, prezentis de li poemojn Miĥaelo Sárosi kun siaj propraj gitar-akompanitaj melodioj. (HE 1964:12, p.4.)

— En la grupo *Konkordo* granda sukceso estis la Madách-memorvespero la 23-an de novembro, kiam la prezidanto de la grupo, prof. d-ro Kalocsay interese parolis pri "La tragedio de l' homo". P. Balkányi laŭtlegis kelkajn partojn el la prepariĝata nova traduko. S-ino Janovszky elokvente rakontis pri la sorto de la unua manuskripto. S-ano S. Szathmári edife klarigis sian opinion pri la tendenco de la grandioza verko.³³⁶ (P. B.)

336 La prelego de Kalocsay aperis en: DPr p. 107-110.

* * *

14.40 1965

— La 28-an de februaro okazis komitat-kunsido de la *Hungara Esperanto-Asocio*. La nomo de Kalocsay troviĝas en la listo de komitatanoj.

— Bone sukcesis la *IV-a Somera Esperanto-Universitato* aranĝita en la urbo Gyula (Hungario) la 4-9-an de julio. Artan nivelon certigis la hungaraj prelegantoj, kiuj ne nur hejmlande, sed ankaŭ internacie estas konataj: J. Baghy, d-ro K. Kalocsay, I. Ungár la fortepiano-virtuozo, I. Nolipa pentroartisto kaj aliaj. La prelego de Kalocsay temis pri *La hungara kultura revolucio*.³³⁷ La prelegon — anstataŭa la malsana Kalocsay — laŭtlegis Alfonz Pechán. (P. B.)

— En la traduko de K. Kalocsay aperis la dua, tralaborita eldono de LA TRAGEDIO DE L' HOMO de Imre Madách.³³⁸

— D-ro Kálmán Kalocsay prelegis pri la poezio de Dante Alighieri, okaze de la septcentjara datreveno de lia naskiĝo. (HE 1965:9, p. 3.)

337 Ĝi aperis en: DPr p. 95-105.

338 Vd en: OMAĜE 3-a vol. p. 43-47.

* * *

14.41 (1966)

— Okaze de la 350-a morto-datreveno de William Shakespeare en majstra traduko de K. Kalocsay aperis la REĜO LEAR³³⁹ en eldono de *Universala Esperanto-Asocio*.

— La 23-an de aprilo en la *Radio Budapest* oni aŭskultis intervjuon, kiun faris s-ino Valéria Szabó kun d-ro Kalocsay. Respondante al la demandoj, Kalocsay parolis pri la traduko de LA TRAGEDIO DE L' HOMO, pri la preperiĝanta Petőfi-volumo. Li konigis planon de la grandskala poem-antologio: TUTMONDA SONORO. Fine li voĉlegis en sia traduko la okversan poemon de la germana trobadoro Kürenberg: *La falko*. (HE 1966:7, p. 8.)

51-a Universala Kongreso de Esperanto (Budapest 30 julio — 6 aŭgusto 1966)

Signifa okazintaĵo de la jaro estis la plej granda postmilita UK (pli ol 4.000 kongresanoj el 42 landoj) aranĝita en la hungara ĉefurbo.

Honoraj kongresanoj: Julio Baghy kaj Kálmán Kalocsay.

En la festparolado Ivo Lapenna, prezidanto de UEA, omaĝis al la hungara movado kaj al ĝiaj du ĉefaj verkistoj, J. Baghy kaj K. Kalocsay, kiuj ĉi-jare fariĝis 75-jaraj. Okaze de iliaj jubileoj Ivo Lapenna en la nomo de UEA transdonis donace al ili, iliajn laste aperintajn verkojn lukse kaj arte binditajn. Por J. Baghy "Sonĝe sub pomarbo", por K. Kalocsay la majstre tradukitan dramon de Shakespeare "REĜO LEAR".³⁴⁰

Dum la tuta kongreso, kie ili aperis, ili estis salutataj per grandaj ovacioj. Pri la signifo de Kalocsay kaj Baghy kaj de la *Budapeŝta Skolo* oni aŭdis kompetentan prelegon de la prezidanto de la *Akademio*, prof. G. Waringhien, en kadro de la *Somera Universitato*.

La 3-an de aŭgusto okazis la *Belarta Konkurso* sub prezidio de G. Waringhien. Pro la antaŭanoncita partopreno de Kalocsay kaj Baghy superpleniĝis la ĉambro per pli ol 250 versamantaj personoj, kiuj venis por omaĝi al la du eminentuloj per la prezento de la jubilea libro ORA DUOPO.³⁴¹ La bonŝanculoj, kiuj sukcesis enpremi sin en la ejon de la aranĝo, havis eblon ĝui la deklamadon de la du steloj de la Esperanto-literaturo. Baghy deklamis el siaj poemoj: *Krono kaj kateno*, *Samtempaj sezonoj*, kaj *Deziro de grandveziro*.

Dum granda aplaŭdo paŝis Kalocsay al la mikrofono. "*Ne distri, sed emocii*". Tiel enkondukis Kalocsay sian roladon, kaj li laŭtlegis la VII-an tabulon el la plej malnova mezopotamia *Gilgames-eposo*. Ĉi tiu funebra kanto (lamento de la heroo pri la morto de Enkidu) vere tuŝis la korojn.

Enkonduke li skize rakontis la enhavon de la epopeo. Jen:

Karaj Samideanoj.

Permesu al mi, ke mi prezentu al vi unu tabulon el la epopeo Gilgameŝ. Por kiu eble ne scias aŭ ne certas kio estas Gilgameŝ, mi volas rakonti, ke Gilgameŝ estas la plej malnova epopeo de la mondliteraturo, miljaren antaŭa ol la Homera epopeo. Kaj eble mi skizos ankaŭ tute mallonge la enhavon de tiu epopeo.

Do Gilgameŝ estas reĝo de Uruk. Potenca homo "sovaĝ-taŭro" — tia estas la plej granda laŭdo, kiun oni povas diri tiutempe, tiu estas "sovaĝa virbovo". Nu du trionio dio, unu trionio homo, sed tamen tiu unu trionio estas mortema homo. Nu tiu tre potenca homo tro laborigas sian popolon. Kaj tial la popolo iras al la dioj — tiutempe oni povis ankoraŭ ricevi aŭdiencion de la dioj — kaj ili diras kaj plendas, ke Gilgameŝ estas potenca homo, Gilgameŝ estas tro potenca por ni, bonvolu nin liberigi de Gilgameŝ.

Kaj tiam la dioj por helpi al la popolo, kreis rivalon al Gilgameŝ. Tiu rivalo estas Enkidu. Li estas la homo de naturo, potenca, forta, vere la pranaturo mem, vera reprezentanto de la naturo. Kaj tiam la du homoj — post multaj epizodoj, kiujn mi ne rakontas — renkontiĝas, interluktas kaj Gilgameŝ estas pli potenca, Gilgameŝ venkas Enkidun. Sed li ne mortigas lin, akceptas lin kiel amikon, kiel plej fidelan amikon. Kaj poste ili faras multajn heroajn agojn kune. Ili kune la plej potencaj homoj de la tero estas nerezisteblaj.

Kaj post tiaj ĉi heroaĵoj Gilgameŝ en siaj festaj vestoj, festaj ornamoj, festaj armiloj estas tiel pompe, tiel bele brila homo, ke Iŝtar, la dio de la amo enamiĝas al li kaj faras al li amproponon. Sed Gilgameŝ rifuzas ŝin, dirante, ke ŝi estas perfida personino, kiu portas nur malbonon kaj malbenon al ĉiuj ŝiaj amantoj.

Nu tiam Iŝtar retiriĝas, iras al Anu, la ĉefoj de dioj kaj plendas kaj diras, ke oni devas venĝi kontraŭ Gilgameŝ, kial ŝin ofendis. Kaj la dioj kreis sovaĝan ĉielan taŭron kaj tiu taŭro ruiniĝas ĉion, sed tiam Gilgameŝ kaj Enkidu mortigas la ĉielan taŭron, sed post tiu venko Enkidu malsaniĝas kaj mortas.

Post la morto de Enkidu, Gilgameŝ estas en la plej granda funebro, ĉar unue, li perdis la amikon, due, li konsciiĝas unue pri tio, ke ankaŭ li mem ne estas senmorta. Kaj tiam li iras por serĉi rimedon, medikamenton kontraŭ la morto. Kaj ankaŭ trovas li medikamenton, poste perdas ĝin, poste li mortas — sed tiu jam ne apartenas al nia historio.

Do mi nun volas al vi laŭtlege la morton de Enkidu.

Kaj pardonu min, ke per la vortoj tre bele registritaj de tiuj argiltabuloj, kiujn oni elfosis el la polvo de pluraj miljaroj, mi nun volas vin ne amuzi, sed emociigi.³⁴²

KONGRESAJ MOZAIKOJ

Parto de la kongresa podio

G. Waringhien, K. Kalocsay, E. J. Woessink

Deklamas K. Kalocsay Deklamas J. Baghy

Dum la kongreso denove montriĝis, ke Kálmán Kalocsay kaj Julio Baghy estas la plej popularaj vivantaj verkistoj.

*

339 Vd en: OMAĜE 3-a vol. p. 69-71.

340 Ĝi estas gardata en la KAL-ĈI Biblioteko.

341 Vd ĉi-libre p. 91.

342 Sonbendo ĉe UEA. Kopio en la KAL-ĈI Dokumentaro.

* * *

14.42

ORA DUOPO

Jubilea libro pri
Julio Baghy kaj Kálmán Kalocsay.

Eldonita en ilia 75-a naskiĝjaro
okaze de la 51-a Universala Kongreso de Esperanto.

Redaktis: Ludoviko Kökény.
Budapest: Hungara Esperanto-Asocio
1966. 18 cm, 184 p. Tolbindita.

En 1937 okaze de la 25-jara esperantistiĝo de Baghy kaj Kalocsay *Literatura Mondo* aperigis la libron ARGENTA DUOPO je ilia honoro. La du "arĝentaj steloj" en 1966 fariĝis "oraj", honoritaj per la jena volumeto.

La libron enkondukas la vortoj de W. Auld cititaj el ESPERANTA ANTOLOGIO. Pri J. Baghy skribis portreton S. Szathmári, pri Kalocsay L. Tárkony.

La volumo enhavas verkojn de la du festitaj, aperintaj antaŭ la dua mondmilito kaj aliajn, kiuj libroforme ankoraŭ ne estis presitaj.

Jen revekiĝis en mi la karaj rememoroj, kiam post la unua granda milito tiuj ĉi du bardoj de Esperanto unufoje ravis nin per siaj versoj, pruvante, ke en Esperanto oni povas vere kaj profunde, jen plore, jen ride, senespere kaj esperplene aŭdigi el sia koro — aŭ el sia sobra menso — melodiojn de la vorto! Mi havis la honoron kunesti ĉe la fondo de *Literatura Mondo*. Kaj el tiuj tempoj por mi estas plej karaj la tiamaj poemoj. De nun mi iom bedaŭras ke el ili nur kelkaj estas troveblaj en tiu Ora libro. Sed la enhavon elektis la jubileantoj mem, kiujn ili opiniis plej indaj por la tutmonda legantaro.

La libro enhavas 78 paĝojn el la verkoj de Baghy, 70 el tiuj de KALOCSAY. El la tiutempa perdiĝinta IZOLO de Kalocsay sep poemoj trovis lokon en la libro, kiujn ni nun povas legi kaj ĝui.

Ludoviko Kökény per utilaj bibliografiaj notoj kaj postparolo kompletigis ĉi tiun oran juvelon.

Paŭlo BALKÁNYI

Budapest, 1976

Bibliografio

- HdE 1966:13, (1422), p. 4. Waringhien, G.
- NP 1966:3, p. 190. Szilágyi, F.
- HFM 1966:2, p. 25. Kökény, L.
- HV 1967:1, p. 25. Balkányi, P.
- TBE 1968:Oktobro, (748), p. 437. Young, K. J.

14.43 (1967)

— Trista evento de la jaro: mortis Julio Baghy. Kalocsay pro sia malstabila sanstato ne ĉeestis en la entombiga ceremonio de poeto-frato.

— En la traduko de Kalocsay aperis la komedio de Shakespeare: SOMERMEZNOKTA SONGŔO.³⁴³

343 Vd en: OMAĜE 3-a vol. p. 72-74.

* * *

14.44 (1968)

— En la Esperanto-grupo de la urbeto Dombovár la 29-an de februaro oni aranĝis literaturan vesperon. Unu programpunkto estis prezento de la "Unua bildo" de LA TRAGEDIO DE L' HOMO en la traduko K. Kalocsay. La publiko esprimis sian plaĉon per longdaŭra aplaŭdo. (HE 1968:5, p. 11.)

— La 18-an de marto en la grupo *Konkordo* oni aranĝis memorgesperon okaze de la unua datreveno de la morto de Julio Baghy. Multaj amikoj de Baghy ĉeestis en la vespero kaj per kortuŝaj rakontoj rememoris al la granda Esperanto-poeto. P. Balkányi rakontis, kiel Baghy fariĝis esperantisto (1911). Parolis ankaŭ S. Szathmári, L. Kökény, kaj multaj aliaj. La voĉon de d-ro Kolomano Kalocsay, kiu pro malsano ne povis ĉeesti, oni aŭdigis de sonbendo. Samteknike oni povis ankaŭ aŭdi la voĉon de Paĉjo, la neforgesebla Julio Baghy. (P. B.)

— La 18-an de majo la grupo *Konkordo* kaj la *Klubo Egressy* aranĝis komunan memorgesperon pri Julio Baghy. La kunvenojn ĉeestis malnovaj amikoj kaj Gyula Baghy, filo de "Paĉjo". La poeto-amiko K. Kalocsay kvankam ne povis persone ĉeesti, aŭdigis sian voĉon per sonbendo, prezentante la poemleteron al Julio Baghy, sprite rakontante trafajn memorojn pri la homo kaj poeto. Kaj sekvis granda surprizo: Paĉjo mem respondis al sia amiko. Mici Khek kunportis tiutempe faritan sonbendon, enhavante la respondon de Baghy. (HE 1968:5, p. 8.)

— La 26-an de aŭgusto festis a grupo *Konkordo* la 10-jaran datrevenon de sia fondiĝo. P. Balkányi kaj A. Pechán, la fondintoj de la grupo, rememoris pri la plej gravaj okazinaĵoj de tiuj ĉi 10 jaroj, emfazante, kiel multon dankas la grupoj al s-ino Sárkány (stifilino de K. Kalocsay), kiu estis tiatempe gvidantino de la kulturaj aferoj ĉe la II-a distrikta Konsilantaro, kaj ŝi akiris la nunan ejon por *Konkordo*. La grupo fieras, ke ĝin prezidas Kolomano Kalocsay, kiu kvankam en la lastaj tempoj pro malsano ne povis ĉeesti, tamen por montri sian fidelecon, sendis al la grupo — krom siaj varmaj salutoj — sian plej novan verkon, la ĵus aperintan Shakespeare-tradukon: SOMERMEZNOKTA SONGŔO. (HE 1968:10, p. 3.)

Kalocsay-vespero

La 7-an de oktobro plenpleniĝis la ejo de *Konkordo*. Ĉi tie kunvenis — ankaŭ el aliaj grupoj — la esperantistoj por festi la 77-an naskiĝtagon de la granda poeto d-ro Kolomano Kalocsay.

P. Balkányi enkonduke laŭtleĝis salut-leterojn alvenintajn de eksterlandaj eminentuloj por Kalocsay. Ludoviko Tárkony en sia solena parolo taksis la gravan agadon de Kalocsay faritan kaj faratan ankaŭ hodiaŭ. La ĉeestantoj emociiĝante aŭskultis la sonbendigitan saluton de Kalocsay, kiu pro malsano ne povis persone ĉeesti. Jen parto de la mesaĝo de Kalocsay sonbendigita fare de Helana Kárász la 3-an de oktobro 1968.

Karaj Gesamideanoj.

Vi venis al mia ermitejo preni mian voĉon por Konkordo, je la okazo — je kia okazo? Je mia naskotag-reveno. Je kioma? Je la 77-a. La numero 77 ĉiam estis al mi simpatia. En mia EZOPA SAĜO troviĝas 77 fabloj kaj Waringhien elkalkulis, ke mia Kalendaro troviĝas 77 poemoj.

Rilate al la jaroj tamen tiu nombro ŝajnas al mi malpli simpatia. Mi preferus verdire alian nombron de du egalaj ciferoj. Se jam ne 22 aŭ 33, almenaŭ 44 aŭ iom rezignacie eble 55. Sed tio estas — kiel diras en Budapeŝto.

Do mi dankas vin pro la vizito kaj mi petas vin — ne mi ne devas peti vin, ĉar mia voĉo ĉeestos en Konkordo. Do mi kore salutas Konkordanojn, ĉeestantojn kaj precipe varme salutas la pupteatristojn, kiuj prezentos scenon el la Shakespeare-verko SOMERMEZNOKTA SONGŬO en mia traduko.

Kara Konkordo! Mi ne estis bona prezidanto; lastatempe mi jam tute ne vizitis vin. Tamen mi tre petas, gardu min en via bona memoro. Al vi ĉiuj mi krias mian plej sincerkoran, varman saluton kaj al la karaj aktorartistoj, kiuj vivigos tiun scenon el la SOMERMEZNOKTA SONGŬO, mi forte aplaŭdas anticipe!

Ĉion bonan al vi ĉiuj!

*

Sekvis la prezentado de la teatra grupo de *Ŝtata Pupteatro*. La ensembleo en Esperant-lingve altnivele prezentis scenon (regisoritan de Anna Bánd) el la teatraĵo.

Per granda aplaŭdo premiis la publiko la deklamon de Ferenc Mózsi kaj la popolkantojn, kiujn bele kantis Andrea Hantos. La lasta programpunkto estis la deklamo de P. Balkányi. Li bonege sentigis la etoson de la poemo de *Sonorilludo*, kiu apartenas al la plej fruaj versaĵoj de Kalocsay. (HE 1968:11, p. 7-8.)

* * *

14.45 (1969)

— Antaŭ dek jaroj fondiĝis la Klubo Egressy. Por soleni tiun ĉi datrevenon la grupanoj la 23-an de februaro aranĝis solenan kunsidon. Kalocsay per poemo salutis la jubileanton.

(HE 1969:6, p. 5.)

— La 23-an de februaro okazis ĝenerala kunveno de la *Hungara Esperanto-Asocio*. La nova prezidanto de la Asocio fariĝis d-ro József Mátéffy, ĉefsekretario Béla Bercei. Estis elektita kiel honora prezidanto: d-ro Géza Bárczi, d-ro Kálmán Kalocsay kaj d-ro Mór Korach.

Festa kunveno en *Konkordo* honore al la 75-jara P. Balkányi

Helena Kárász, sekretariino de la grupo, transdonis al la festito bondeziron de Kalocsay sonbendigitan la 5-an de marto 1969.³⁴⁴ Jen:

Karaj Ĉeestantoj!

La Konkordo festas sian prezidanton — ne, tio estas iel seka, oficiala titolo — tre indas diri, ke ĝi festas sian patron.

Paŭlo Balkányi elpensis, fondis kaj inter ne malmultaj klopodoj kaj zorgoj fondis kaj vivtenis la grupon Konkordo, kiel li fondis ka vivtenis jam aliajn grupojn. Mi memoras kiel antaŭ 48 jaroj li fondis la grupon en la strato Eötvös. Tiaj estis la plej aĉaj tempoj de la Horthy-kontraŭrevolucio. En la Hotelo Bristol ankaŭ enestis "blankaj teroristoj", sed Balkányi jam povis trovi hejmon por la ne malmulte suspektata Esperanto. Mi memoras ankoraŭ, ke en ĉiu semajno ni faris ian literaturan prezentadon jen Esperante, jen hungare. Tiujn hungarajn pecojn mi tradukis pere de Esperanto el la pola, kataluna, finna ktp. poezioj. Balkányi enkondukis kaj mi deklamis aŭ recitis. Tio estis ankoraŭ en la tempo antaŭ ol Paĉjo, Julio Baghy hejmenvenis el Siberio. El la nunaj esperantistoj troviĝas jam inter la aŭdantaro kaj inter la prelegantoj Jozefo Mátéffy, kaj Lajos Totsche/Tárkony.

En artikolo verkita pri li, mi nomis Paŭlo Balkányi konstanta iniciatinto, instiganto, instruanto, informanto. Ĉi tion diras pri li ankaŭ Tárkony:

*Povas disfali ĉio eĉ tutlande,
tuttere, eĉ la sunsistem' ĝisrande,
persistos ĉiospite Paŭl' Balkányi
paclukte, artikole, propagande.*

En sia dekkvina jaro li fariĝis esperantisto, do nun en sia 75-jaro li festas ankaŭ sian 60-jaran esperantistecon, kaj tio estas fakte granda tempo, precipe se oni pripensas, ke li faris en preskaŭ konstanta aktiveco. Tion "preskaŭ" mi diras tial, ĉar troviĝis tiam kaj tiam paŭzoj. Tiuj tamen okazis ekster lia kulpo. Du mondmilitoj kaj similaj.

Mi ne intencas nun listigi multajn laborojn, kiujn li faris en la intereso de Esperanto en Hungarujo kaj en Eŭropo — por tio oni devus skribi tutan broŝuron.

Foje mi pensis pri tio, kiel oni povus triumfigi definitive Esperanton, kaj mi konkludis, ke oni devus havi unu miliardon da dolaroj por tio. Aŭ, mi pensis plu, oni devus havi mil Paŭlon Balkányi, dissemantajn en la tuta mondo. Ĉu tio signifas, ke Paŭlo Balkányi valoras unu milionon da dolaroj? Ho ne! Li valoras multe pli, tian valoron ne povas esprimi per dolaroj, nek per pundoj, per ringoj, spesmiloj, steloj aŭ sestercioj.

Mi diras nur, ke en la hungara Esperanto-movado havas multajn kolonojn, sed multaj el tiuj estas malfirmaj kvazaŭ faritaj el baŭksit-cemento,³⁴⁵ multe estas malpli firmaj, sed unu elstaras per sia solida firmeco, kvazaŭ kapablas teni mem sola la tutan konstruaĵon. Tiu kolono estas nia Paŭlo Balkányi.

En mia artikolo, kiun mi verkis pri li por Hungara Vivo en la jaro 1964, mi parolis ankaŭ pri liaj literaturaj ambicioj. Fakte unuavice li propagandisto, inicianto, instruanto, organizanto, klare rekonis la gravecon de literaturo por Esperanto.

Pluaj el niaj verkoj, precipe tiuj de Literatura Mondo — iam, en antaŭ diluvaj tempoj, en la komenca dudekaj jaroj estas indaj, ke oni elfosu ilin. Lia reva projekto estas, ke ni devas eldoni novel-kolekton, kiu havas nurajn Esperanto-temojn. Vi eble scias, ke de diversaj flankoj oni taŭzas sian nazon aŭdante pri tio, opiniante, ke novelo, romano eĉ poemo, kiu enhavas temo en la esperantista vivo, jam si mem ne povas esti bona. Mi tute ne dividas kun ili tiun opinion, kaj se ili dezirus pruvon mi povus montri unuavice tiujn du prozverkojn de Paŭlo Balkányi: unu melankolian kaj unu gaje burleskan.

Mi ĝojas, ke la literaturaj ekskursoj de nia Paŭlo, tamen ne pereos senpostsigne. En la Esperanto-lernolibroj de Szerdahelyi troviĝas multloke infanversaĵoj de certa Oĉjo Paŭlo. Eble mi ne perfidas zorge gardatan sekreton, se mi malkaŝas, ke tiu Oĉjo Paŭlo estas Paŭlo Balkányi.

Du grandaj oldulojn havas la hungara movado: unu Paĉjon, Julio Baghy kaj unu Oĉjon, Paŭlo Balkányi. Ni perdis la unuan, sed la dua estas por ni — kelkfoje lace, kelkfoje iom retiriginte, oni povas diri rejuniĝinte plu agas, agitas, verkas, entuziasmas kaj entuziasmigas.

Li faru tiun freŝe, kaj junhumore ankoraŭ tre multaj jubileoj.

Vivu nia althonora prezidanto Balkányi, vivu nia amata Oĉjo Paŭlo.

*

— Kolomano Kalocsay, la honora prezidato de la grupo *Konkordo*, festis la 6-an de oktobro sian 78-an naskiĝtagon. En la nomo de la grupo vizitis lin Márta Zemplényi. La saman tagon vespere ankaŭ la prezidanto, vicprezidantoj kaj ĉefsekretario de HEA faris honorviziton ĉe la ĉiam agema Nestoro de la movado. Sidante ĉe la tajpilo, li faris la lastan kompletigon en la impona manuskripto de LIBERO kaj AMO. (HE 1969:11, p. 18.)

344 Sonbendo ĉe H. Kárász, kopio en la KAL-ĈI Dokumentaro.

345 Komparo al la domoj konstruitaj per bauksit-betono en la kvindekaj jaroj. Post kelkaj jaroj ili ekfendiĝis kaj jam minacas disfalo.

* * *

14.46 (1970)

PEN honoris d-ron Kálmán Kalocsay

La hungara *PEN-klubo* prezentis honor-medalon al la "vivanta klasikulo" de la Esperanta kulturo. Per tiu honorigo ĝi rekonis la multjardekan laboron de Kalocsay, kiu per altnivelaj tradukoj diskonigis la hungaran literaturon en Esperanto tra la tuta mondo. Kalocsay estas la unua Hungaro, kiu elmeritis ĉi tiun honoron per la uzo de Esperanto kiel traduklingvo.

La transdono de la medalo "*Pro litteris hungaricis*" okazis la 30-an de januaro 1970 en la salono de la *Hungara Verkista Federacio*. La solenaĵon prezidis László Passuth, renoma roman-verkisto, vicprezidanto de la hungara PEN. En enkonduka parolo li menciis, ke ĝuste en 1911, kiam Kalocsay esperantiĝis, ankaŭ li renkontiĝis kun Esperanto en Kolozsvár (Cluj), kaj de tiam — li diris — li alte estimas la Esperantomovadon, kies celo: forigi la interpopolajn barojn.

La festparoladon diris Mihály Gergely, HEA-estrarano, ĉefredaktoro de *Hungara Vivo*. Li koncize prezentis la distingiton al la ĉeestantoj, menciis liajn elstarajn tradukojn el la hungara literaruro: JOHANO LA BRAVA (1923, 1948), LA TRAGEDIO DE L' HOMO (1924, 1965), HUNGARA ANTOLOGIO (1933), kaj la Petőfi-volumo: LIBERO kaj AMO, kio estas jam dum presado.

L. Passuth salutas la distingiton
En la fono sidas A. Csiszár.

Post la transpreno de la medalo Kalocsay dankis la altan distingon:

Kortuŝe mi dankas la distingon, per kio la Hungara PEN-klubo honorigis min pro mia tradukanta laboro. Emociigante mi pensas pri tio, ke proksimume kvardek jaroj, Frigyes Karinthy, la eminenta hungara verkisto — kiu iom da tempo estis prezidanto de la Hungarlanda Esperanto-Asocio — en iu kunsido de PEN proponis, ke la anoj de PEN per la uzado de Esperanto faciligu la internacian kontakton.³⁴⁶ Nun al mi ŝajnas, ke ĉi tiu distingo — krom mia persona honorigo — estas ankaŭ rekono de Esperanto kiel interpreta lingvo de la literaturo kaj poezio, estas samtempe aproba voĉo antaŭ al la kvardek-jara propono de Karinthy. Ankoraŭfoje profundan dankon.

Sekvis deklamo de renoma hungara aktoro Zoltán Selli. Li prezentis poemojn de S. Petőfi, Á. Tóth, Gy. Illyés kaj M. Radnóti en traduko de Kalocsay. Fine li recitis en hungara traduko de Kalocsay poemon de la pola Narcisa Zmichowska: *Circulus vitiosus*. La kamerhoraro de Rita Barabás prezentis kanton de Neuwach: *Ni iru en la naturon* kaj kanton el Palestrina en traduko de Kalocsay.

En la solenajo inter la invititaj renomaj hungaraj verkistoj ĉeestis ankaŭ la medalkreinto Zsigmond Kisfaludi-Strobl.

*

— En la traduko de Kalocsay sub titolo LIBERO kaj AMO aperis elektitaj poemoj de S. Petőfi.³⁴⁷

— Aperis la lasta Shakespeare-traduko de Kalocsay, la TEMPESTO.³⁴⁸

346 Frigyes Karinthy estis prezidanto de la Hungarlanda Esperanto-Asocio en 1932-1938. Li pledis por Esperanto en la PEN-kunveno okazinta en Budapeŝto 1932.

347 Vd en: OMAĜE 3-a vol. p. 52-55.

348 Vd en: OMAĜE 3-a vol. p. 78-80.

* * *

14.47 (1971)

Alta ŝtata honorigo al Kálmán Kalocsay

Ĉi tiu jaro portis al Kalocsay novan distingon. Okaze de lia 80-jara naskiĝ-datreveno la *Prezidia Konsilio de Hungara Popolrespubliko* distingis lin per ora grado de "Ordeno de l' Laboro".

La festa kunveno okazis la 9-an de oktobro en klubo de hungaraj artistoj *Fészek* (Nesto). Ĉeestis ĉ. 50 invititoj. En la festparolo de József Mátéffy, prezidanto de la *Hungara Esperanto-Asocio* aprecis la meritojn de la distingita scienculo, kuracisto kaj literatoro Esperanta.

Béla Berceli, cefsekretario de HEA interpretis la bondezirojn de UEA kaj persone tiujn de Ivo Lapenna, transdonante oran ringon al la jubileanto. Tiu donaco simbolas, ke la agado de Kalocsay estas vere orhava trezoro de la Esperanta kulturo.

Kortuŝite dankis Kalocsay la Omaĝon:

La alta distingajo estas por mi vere agrabla. Tiun mi ricevis pro Esperanto-laboro. Mi do ricevis "socialistan distingajon" kaj "burĝan donacon". Do en mia memo enkorpiĝas la ideo de paca kunekzisto. En mia ago mi ne povas fari egajn promesojn, tamen dum mi vivos, mi faros ĉion eblan por Esperanto, por ĝia kulturo.

Kalocsay ĉi-okaze prezentis du fablojn el sia EZOPA SAĜO.

Post la solena programo okazis komuna vespermanĝo en la restoracio de la klubo.

Kalocsay deklamas

* * *

14.48 1972

Hungara Kultur-festivalo

La ĉi-jara ĝoja evento estis la sukcese aranĝita *Hungara Kultur-festivalo* okazinta la 17-23-an de julio en Budapeŝto.

La aranĝon de la festivalo sugestis Ivo Lapenna, tiama prezidanto de UEA, doni eblon por kunveno al eŭropanoj, kiuj pro la malproksimeco kaj alta elspezo ne povis amase viziti la ĉi-jaran *Universalan Kongreson* okazintan en Portland, Usono. Do la *Hungara Esperanto-Asocio* aranĝis la festivalon sub aŭspicio de UEA. La festivalejo estis en la impona *Ĉefurba Kulturdomo*.

Multaj memoris ankoraŭ pri la grandsukcesa 51-a UK en Budapeŝto, krome la urbo havis altirforton ankaŭ kiel centro de la Esperanta literaturo. La interesiĝon montras la nombro de la partoprenantoj: ĉ. 600 personoj el 20 landoj.

La emblemo de la festivalo (libro, torĉo, liuto kaj teatra masko) simbolas la ĉefan enhavon de la festivalo, kaj la epiteto "Hungara" montras, ke la aranĝantoj intencis la programon tiel kunmeti, ke la festivalanoj ricevu gustumaĵon el ĉiuj terenoj de la hungara arto kaj kulturo.

La solenaĵon malfermis Béla Berceli, ĉefsekretario de HEA. Post lia parolo d-ro K. Polinszky, vicministro por edukado, kaj J. Hantos, vicprezidanto de la *Ĉefurba Konsilio* salutis la ĉeestantojn. La festparoladon diris D-ro Jozefo Mátéffy prezidanto de la *Hungara Esperanto-Asocio*. Li detale traktis la evoluon de la hungara kulturo.

Kalocsay entuziasme elektis materialojn por la programo. Kompreneble la centro de la prezentadoj unualoke estis la beletro. Pro tio pluraj kunvenoj prezentis la perlojn de la hungara literaturo, kiun enkondukis la prelego de Mihály Gergely, verkisto, ĉefredaktoro de *Hungara Vivo*.

Grandsukcesa estis tiu matineo, kie tri verkistoj-eminentuloj: Kalocsay, Szathmári kaj Tárkony parolis pri la *Literatura Mondo*, kaj pri ĝiaj forpasintaj kunlaborantoj: Julio Baghy, Ferenc Szilágyi kaj EMBA. La granda ovacio montris, ke la publiko ĝojis vidi la vivantan trion de la *Budapeŝta Skolo*. Sur la podio sonis la verkoj de la vivanta kaj la forpasinta trioj, kaj Kalocsay estis tondre aplaŭdata ankaŭ kiel poem-recitanto.

En la teatra programo oni prezentis unuaktaĵon "Bösendorfer" de Ferenc Karinthy (filo de Frigyes Karinthy). La teatraĵon en Esperanta traduko de Kalocsay, eminente ludis profesiaj aktoroj: Zoltán Gera kaj Lilla Mikes.

En la ekspozicio de esperantistaj belartistoj oni povis vidi kreaĵojn de Paŭlo Varsányi, Stefano Barta (ambaŭ kunlaborantoj de la iama *Literatura Mondo*), Zoltán Váli, István-Nolipa, Ágnes Lukács (kunlaborantoj de *Hungara Vivo*). La spektaklo de la entimologia ekspozicio, ĉefe la buntaj papilioj tre plezurigis la okulojn de Kalocsay.

Notoj de Kalocsay
en la vizitlibro de la ekspozicio.

Grandsukcesa estis ankaŭ la muzika programo, en kies kadro nia samideano Imre Ungár, la Kossuth-premiita pian-artisto ravis la publikon. Furoran sukceson rikoltis la ĥorestro Lajos Vass kun la ĥoro de la "*Artensemblo Vasas*", precipe kiam li entiris ankaŭ la publikon en komunan kantadon. La gastoj — ankaŭ eksterlandanoj — komence timeme, poste kuraĝe kantis la belmelodian hungaran popolkanton esperantigitan de Kalocsay:

VIDU, MIA PATRIN'...

Vidu, mia patrin', kara mia patrin, vi min naskis domaĝe,
Aŭ min en riveron, tuj min en riveron ĵeti estus pli saĝe.
Rivera flu' en Danubon frostan portus min,
Estus mi nenies, estus mi nenies neamata amantin'.

De l' ruzujo de roz', de l' rozujo de roz' falis, kuŝas surtere,
Haj, min mia amat', haj min mia amat' lasis for malfidele.
Mi ne ploras, ĉar perfide li min lasis for,
Sed eĉ en la tombo, sed eĉ sub la tero lin memoras mia kor'.

Kalocsay dum la tuta festivalo estis vigla, bonhumora. Ĉi tiu kunveno donis al li eblon renkontiĝi kun eksterlandaj konatuloj, esperantistaj amikoj. Eble li konjektis, ke li lastfoje rolas antaŭ grandnombra internacia publiko.

FESTIVALAJ MOZAIKOJ

Inaŭguro de la festivalo
Meze sidas K. Kalocsay, apude B. Berceli (kun okulvitroj).
En la fono sidas T. Vaskó, sekretario de HEA

Matineo de Literatura Mondo Antaŭ la mikrofono
S. Szathmári, K. Kalocsay, L. Tárkony

* * *

14.49 (1973)

Scienca vespero en la grupo Konkordo

La 7-an de majo en la salono de la *Medicina Sindikato* Kalocsay prelegis pri la Esperanta vortfarado.³⁴⁹ Akceptante la tezon de la franca de Saussure, Kalocsay funde analizis la E-vortfaradon. Dume li malkovris la t. n. "inversan vortefikon", kies esenco estas, ke ĉe duobla flankelemento ne nur la dekstra elemento povas difini la vortkarakteron de la maldekstra elemento, sed ankaŭ la maldekstra elemento povas efiki al la dekstra, difinante ties vortkarakteron. La esencon de la plene ellaborita teorio de la E-vortfarado, Kalocsay ĉi-okaze per simplaj ekzemploj klarigis al la publiko.

Kalocsay antaŭ la nigra tabulo,
kun kreto en la mano

La aŭskultantaro ekstaris kaj longe aplaŭdis la preleganton. H. Kárász, estrarino de la grupo *Konkordo* transdonis al li bukedon. Bonŝanculoj estas, kiuj ĉeestis ĉi-okaze en *Konkordo*, ĉar Kalocsay lastfoje estis videbla antaŭ E-publiko. Liaj fortoj — krom la ĝismorta literatura verkado — jam ne sufiĉis intense partopreni en la movado.

349 Vd en: OMAĜE-5-a vol. p. 40-49; ĉi-libre p. 104 (piednoto).

* * *

14.50

DEK PRELEGOJ
de Kálmán Kalocsay

Antaŭparolo kaj notoj de A. Csiszár.

Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1985.
20 cm, 126 p.

Pri movado, lingvo, literaturo

Ada Csiszár, kiu de la morto de Kalocsay zorgas pri la konservo de liaj manuskriptoj kaj Esperanto-biblioteko, nun liveris al ni valoran volumon. Ĝi entenas dek prelegojn de Kálmán Kalocsay.

Ĉi tiu libro estas tre valora, ĉar nenio, kion iam skribis aŭ diris Kalocsay ne estas indiferenta. Do tiu ĉi kolekto estas atente leginda. Salutinda ĝi estas, ĉar la vortoj surbendigitaj antaŭ multaj jaroj eĉ jardekoj, kaj la skriboj tajpitaj sur la plej aĉaj folioj estas jam konservitaj.

El la dek prelegoj nur tri aperis jam presite. Nome:

Prelego 1. en: Kataluna Esperantisto 1925: 12, 13, 14.

Prelego 6. en: Hungara Fervojista Mondo 1967:4, p. 48-50.

Prelego 10. en: Budapeŝta Informilo 1975, n-roj 2, 3, 4, 5, 7-8, 9, 10, 11, 12; repr. en: Sciencaj Komunikaĵoj 1977, p. 7-22.

Jen la prelegoj en kronologia aranĝo.

1. *La Esperanta poezio* (vd p. 29).
2. La perspektivoj de la Esperanta literaturo (vd p. 47).
3. Kion donis la hungaroj al la homaro? (vd p. 58).
4. La arto de la verstraduko (vd p. 62).
5. Esperanto kaj literaturo (vd p. 81).
6. Zamenhofa tago (vd p. 83).
7. Eroŝenko, la blinda mondmigrulo (vd p. 84).
8. La Tragedio de l' homo kaj Imre Madách (vd p. 86).
9. La hungara kultura revolucio (vd p. 86).
10. Pri la vortosistemo de Esperanto (vd p. 102).³⁵⁰

Post la tralego de ĉi tiu libro oni sentas ĝojon kaj malĝojon. Ĝojon pro la valora enhavo kaj pli bona ekkono la multfaceta, riĉa personeco de Kalocsay, sed malĝojigas nin ĝia ekstero. Kalocsay kaj tiuj prelegoj vere meritis pli belan "veston" ornamitan per inda prestekniko kaj senigitan je bedaŭrindaj preseraroj. Cetere la libro pretiĝis en la propra presejo de la *Hungara Esperanto-Asocio*.

En la Antaŭparolo oni legas pri perdiĝintaj manuskriptoj de Kalocsay. Do ni estu dankaj al Ada Csiszár pro la pecoj kunskrapitaj kaj savitaj vere en la lasta momento.

D-ro István NAGY
Budapeŝto, 1985

350 Apud la demando pri neologismoj kaj pri la demando de la pasivaj participoj (ATA/ITA), la vorto-sistemo de Esperanto estis la favorata diskuttemo de Kalocsay — kiel li diris — la "amata ĉevaleta". Inter la jaroj 1968-1972 li tralaboris sian vorto-sistemon kaj prezentis ĝin en la grupo Konkordo. "Estus tre bone, se tiu teorio pri la vortkunmeto estus eternigita" — diris li en oktobro 1975 kadre de intervjuo. Do kvar monatojn antaŭ sia morto li revis pri tio, ke ĉi tiu studo iam aperu ankaŭ en libro. Se Kalocsay estus vivanta, certe li ĝojus, vidante sian definitive prilaboritan vort-teorion en DEK PRELEGOJ. Cetere lian-vort-teorion akceptis ankaŭ la Akademio de Esperanto.

Esenca bibliografio

I' esperanto 1986:agosto-settembre p. 21-22. Pignatelli, F.
BrE 1987:Jan.-Febr. (874), p- 216. Salvesen, N. T. R.
LF 1987:102, p. 25. Waringhien, G.
El Popola Berklio 1987:jul.-aŭg. Don Harlow.

Notoj kaj referencoj

BI 1986:11, p. 9; 1987:6, p. 11.
Esperanto 1986/75.
derE 1986:5, p. 113.
HV 1986:3, p. 119.

* * *

UZITAJ MALLONGIGOJ

AD	ARĜENTA DUOPO (vd p. 49)
BrE	Brita Esperantist, La
DPr	DEK PRELEGOJ (vd p. 103)
ERA	Esperanta Rondo Amika (vd p. 11)
HE	Hungara Esperantisto
HEA	Hungara Esperanto-Asocio
HH	Hungara Heroldo
HEF	Hungara Esperanto-Federacio
HEK	Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro
HES	Hungarlanda Esperanto-Societo
HESL	Hungarlanda Esperantista Societo Laborista
HV	Hungara Vivo
KAL-ĈI	Tiel baptis Kalocsay la komunan kolektaĵon: Kalocsay-Csiszár.
Dokumentaro	Ĝi entenas la komencliterojn de la du familiaj nomoj; Kalĉi estas karesnomo de Kálmán; lom kripligita formo de la familia nomo Kalocsay, uzita fare de lernejoj kamaradoj.
LKK	Loka Kongresa Komitato
LM	Literatura Mondo
MEM	Mondpaca Esperantista Movado
NE	Nederlanda Esperantisto
(P. B.)	Paŭlo Balkányi
SSt	Sudhungarlanda Stelo
TBE	The British Esperantist
UK	Universala Kongreso

INDEKSO DE PERSONOJ

En ĉi tiu indekso la nomoj estas ordigitaj laŭ simplaj literoj de la Esperanta kaj latina alfabetoj, sen konsidero pri nacilingvaj supersignoj.

Ady, E.	24, 70
Afanasjeva, H.	80
Alighieri, D.	2, 44, 86
Arany, J.	7, 12
Auld, W.	69, 91
Babits, M.	7, 24, 46,
Bácskai, I.	78, 80, 82
Baghy, Gy.	92
Baghy, J.	1, 10, 11-13, 14, 22, 23-25, 28, 29, 30-31, 33, 34, 37, 39, 40-41, 46, 47-48, 49-50, 52-53, 55, 60, 61, 62, 65-66, 67, 68, 69, 70-71, 72, 73, 74, 76, 77-79, 80, 82, 84, 85, 86, 87, 89-90, 91, 92, 95, 99
Balla, I.	77
Bálint, G.	66
Balkányi, P.	2, 6, 8, 9-10, 12-13, 14-18, 21-22, 27, 28, 29, 30, 32-33, 39, 42, 43, 45, 46, 48, 51, 59, 61, 67, 68, 69, 70, 72, 73, 76, 77-81, 82, 83, 86, 91, 92, 93, 94-95
Bánd, A.	93
Barabás, R.	97
Baranyai, I. (ps.: EMBA)	61, 81
Bárczi, G.	94
Barta, St.	49-50, 77, 100
Bartók, B.	77, 82
Baudelaire, Ch.	71
Bayer, B.	21-22
Belmont, L. (ps. de L. Blumenthal)	2, 47, 83
Benárd, Á.	20, 42
Benke, V.	76
Berceli/Bleier, B.	61, 62, 65, 94, 96, 98, 99, 101
Bleier, V.	37, 42, 43, 46, 47, 49, 52, 62
Blond, L. (ps. de Totsche/Tárkony)	47, 51
Boda, I.	72,
Bodó, K.	11, 30, 37, 39, 42, 84
Bognár, J.	66
Bokarev, E. A.	82
Boldizsár, I.	67
Boulton, M.	69, 73, 80
Cart, T.	35
Cense, E.	52
Chambre, L.	30
Chierer, s-ino	71
Chopin, F.	77
Collinson, W. E.	35
Cseh, A.	1, 33, 36, 82
Csóra, S.	80, 82

Csurgai, I/S.....	61, 66
Dalmau, D.....	29
Devjatnin, V. N.....	2, 83
Dobos, F.....	84
Dresen, H.	47
Dürer, A.	23
Egervári, I.	77, 84
Eksta, V.	33
Ellersiek, F.....	16
EMBA (ps. de I. Baranyai)	99
Emőd, T.	24
Erošenko V.	84, 103
Farkas, É.	86
Farkas, M.....	80
Fethke, J. (ps.: Jean Forge).....	28
Font-Giralt, J.....	36
Forge, J. (ps. de J. Fethke).....	40
Francis, J. I.	69
Frenckell von	16
Frühwirt, M.....	30-31, 34
Gáldos, N.....	34
Gera, Z.	99
Gergely, M.	96, 99
Ghez, A.....	8
Giesswein, S/A.	4-5, 8, 13, 21, 26-27, 28, 33, 34
Ginz, O.	69
Goethe, J. W.....	42
Grabowski, A.	8, 10
Gregorius J.	31
Gruško, V.....	79
Gyenes, T.	73
György, S.....	78, 81
Győry-Nagy, L.....	4-5, 81
Haefelinger, E.....	29
Hall, H.....	7
Halka, L.	11, 34, 42, 43, 47, 61, 66, 67, 76, 80
Hankel, M.	8
Hantos, A.....	93
Hantos, J.	99
Harlow, D.....	104
Hattyár, G.	82
Heine, H.....	80, 82
Hekxendorf, A.....	62
Heltai, J.....	12, 24, 82
Hevesi, E.	10, 25
Hoffmann, E.....	51
Hohlov, N.	29
Illyés, Gy.	97
Isbrucker, J.	26
Janovszky, s-rino	59, 86
John, S.	58
József, A.....	70

Jung, T.....	28, 40
Jurák/Khek, M.....	78
Kárász, H.....	93-95, 102
Karczag, G.....	68
Kardos, ?	14
Kamarýt, S.....	69
Kapitány, L.....	82
Karinthy, Ferenc	99
Karinthy, Frigyes.....	24, 39, 42, 46, 97, 99
Kárpáti, ?	68
Kenesei/Kleinberger, M.	74, 76, 78, 84
Kerékgyártó, ?	61
Khek/Jurák, M.....	80-81, 85, 92
Kešik, H.	29
Kéthelyi, s-rino	29
Kéthly A.	66
Kisfaludi-Strobl, Zs.....	97
Kökény, L.....	30, 42, 43, 46, 59, 61, 62, 66, 67, 68, 71, 75, 76, 78, 80-81, 91,
Kölcsei, F.....	7
Kondor, J.	55
König/Király, L.....	21
Korach, M.	94
Kossa, I.....	82
Kosztolányi, D.....	24
Kovács, T.....	21
Kövecses, ?	61
Krajcska, H.	85
Krausz/Kéthelyi, I.....	21
Krausz, Gy.....	72
Kürenberg (trobadoro)	87
Lange, L.....	72
Lapenna, I,.....	87, 98, 99
Leizerowicz, I.....	47
Lippmann, W.	25
Liszt, F.	82
Loránd. L	9-10, 21-22, 27, 28, 42, 48, 59
Lukács, Á.....	100
Lukács, Gy.....	30
Madách, I.....	28, 86, 103
Magyar, ?	77
Majkovszkij V. V.....	71
Major, J.....	10
Makai, E.....	12, 24, 82
Maninnen, O.	16
Marczell, Á	42
Márton, L.	74
Mátéffy, J.....	74, 78, 94, 98, 99
Mezei, K.....	77, 80
Migliorini, B.	35
Mihalik, J.....	30, 42, 46, 52-53, 59
Mikes, L.	99

Móra, F.	46
Morariu, T.	1, 28, 69
Mózsai, F.	93
Muusses, J.	56
Nagy, I.	77, 81, 82, 104
Nagy, J.	72
Nagy-Molnár, I.	21-22, 28
Nemes, F.	77-78
Német, O.	53
Neuwach, ?	97
Newell, L. M. N.	47
Nezvál, F.	74
Noiret, I.	24-25
Nolipa, I.	86, 100
Oventen, E.	7
Page, ?	23
Pál, I.	81
Palestrina, ?	96
Papp, Zs.	68
Passuth, L.	96
Patai, S.	6, 33
Pechán, Alfonz.	67, 71, 75, 78, 83, 86, 92
Pechán, Anna	23, 24-25
Pechán, C.	24, 25
Pethes, I.	82
Petőfi, S.	2, 7, 22, 23, 28, 46, 67, 72, 75, 87, 96 97
Pignatelli, F.	104
Poe, A. E.	34
Polinszky, K.	99
Post, H.	23, 27
Privat, E.	8, 16, 24, 26, 29
Pumpr, T.	69
Puškin, A. S.	82
Rácz Kövesd, B.	21-22
Radnóti, M.	97
Radó, J.	85
Radvánszky, E.	82
Réthelyi, T.	86
Rieth, L.	78
Rieth, M.	78
Roboz, S.	22
Roquette, O.	82
Rossetti, R.	49, 69
Rossetti, s-rino.	65
Rozmarynowsky, H.	37
Runeberg, N.	16-17
Ruzsits, s-rino	78
Rytjkov, N. N.	72, 79-80, 82
Salvesen, N. T. R.	104
Sarkadi, M.	82
Sárkány, M. (vd Szelvényi)	92

Sárosi, M.	10, 11-12, 14, 24-26, 29, 33, 34, 39, 40, 42, 46, 1, 66, 67, 70-71, 72, 73, 75, 76, 77, 80-81, 82, 85, 86
Saussure, F. de	5, 102
Schulhof, S.	8
Schuman, R.	67
Schwartz, R.	2, 40, 79
Schwartz, T.	13, 24-25, 41, 62
Sellei Zoltán	97
Setälä, E. N.	15
Setälä, V.	14, 17
Shakespeare, W,	86, 87, 92-93, 97
Širjaev, I. G.	46
Somlai/Spieler. L.	67
Soros, G.	13
Szabó, V.	87
Szakasits, Á.	82
Szász, ?	39
Szász, E.	39
Szathmári, S.	86, 91, 92, 99, 101
Széchenyi, I.	33
Székely, E.	12
Székely, ?	14
Szelvényi/Sárkány, M.	51
Szép, E.	24
Szepesi, Z.	59
Szerémi, B.	61, 77-78
Szerdahelyi, I.	95
Szilágyi, F.	34, 37, 39, 42, 49, 52, 61, 76, 91, 99
Szilárd, B.	82
Szirom, A.	52
Starke, ?	29
Starke, s-rino	29
Stettler, Ed.	43-44
Stockinger, ?	47
Sturmer, K. R. C.	35
Sulyán, Gy.	74
Tamás, T.	14, 22
Takács, J.	21, 27, 30, 37
Tárkony, L.	59, 60, 61, 62, 66, 67, 68, 71, 75, 78, 80, 84, 91, 93, 94, 99,
Tarnay, A.	82
Telling, ?	43
Thorsen, P.	70
Tiborc, Z.	60
Tolnai, E.	21
Tolnai-Göndör, R.	43
Tomán, M.	12
Török, Gy.	56
Tóth, A.	78
Tóth, Á.	97
Tóth, V.	21, 22, 29, 33

Totsche/Tárkony L. (ps.: Lali Blond)	37, 42, 43, 47, 52, 60, 94
Turzó, P.	21
Ujlaki-Nagy, T.	82
Ungár, I.	67, 77, 86, 100
Urbanova, E.	69
Vajda, J.	7, 42
Váli, Z.	100
Vangel, M.	33
Várnai, Zs.	72
Varsányi, Pál.....	100
Vass, L.....	100
Vaskó, Tibor.....	101
Vatré, H.	49
Végyvári, E.	61
Venetianer/Vándor, S.	5
Venture, A.....	41
Verda, G.	47, 52
Verhaeren, E.....	40
Vikár, B.	33
Vörösmarty, M.	7
Wagner, R.	31
Wakots, M.....	29
Warden, ?	28
Waringhien, G.....	41-42, 46, 47, 57, 69, 71, 80, 82, 87, 89, 91, 104
Woessink, E. J.	89
Wranka, D.....	66
Young, K. J.	91
Zacsek, I.	12
Zamenhof, F. (ps.: FeZ).....	31-33
Zamenhof, Lidja	1, 31-33
Zamenhof, L. L.....	8, 10, 22, 26-27, 28, 35, 39, 40, 52, 54, 66, 67, 71, 72, 73-74, 83, 103
Zemplényi, M.	95
Zimmermann, L.....	11, 14
Zmichowska, N.	10, 97
Zöldy, I.	30

ENHAVTABELO

ĈAPITRO 14 Kalocsay en la Esperanto-movado

ANTAŬPAROLOJ:

Al la Sepa volumo

14.1	Enkonduko	1
	Esperanto-postenoj de Kalocsay	3
14.2	Kiam, kial kaj kiel mi lernis Esperanton? (K. Kalocsay).....	4
14.3	(1919)	6
	<i>La Internacio</i> (Traduko de Kalocsay)	6
	<i>Kanto de Suomi</i> (Traduko de Kalocsay)	7
14.4	(1920)	9
14.5	(1921)	11
14.6	(1922)	14
	<i>Kongresa Runo</i> (Poemo de Kalocsay).....	15
	<i>Dolora saluto</i> (Poemo de Kalocsay).....	18
14.7	(1923)	23
	Pri la kabaredo de Literatura Mondo (Rakontas Kalocsay).....	24
14.8	(1924)	28
14.9	(1925)	29
14.10	(1926-1927)	30
14.11	(1928)	30
14.12	(1929)	31
14.13	(1930)	34
	<i>Kongresa Prologo — Oxford</i> (Poemo de Kalocsay).....	34
14.14	(1931)	37
	<i>Stelo super la Wawel</i> (Poemo de Kalocsay)	37
14.15	(1932)	40
	<i>Sur ŝtuparo...</i> (Poemo de G. Waringhien).....	42
14.16	(1933)	43
	<i>La kapitan' el Berno</i> (Poemo de Kalocsay)	43
	<i>Esperantista Skolthimno</i> (P. Balkányi)	45
14.17	(1934)	46
14.18	(1935)	46
14.19	(1936)	47
14.20	(1937)	49
	ARĜENTA DUOPO (Librokonigo).....	49
14.21	(1938)	55
	<i>Al la Eŭkaristia Kongreso</i> (Poemo de Kalocsay).....	55
14.22	(1939)	58
14.23	(1940-1944) Esperanto dum la militaj jaroj (P. Balkányi)	59
14.24	(1945)	60
14.25	(1946)	61
14.26	(1947)	62
	<i>Kongresa Saluto — Bern</i>	62
14.27	(1948)	67
14.28	(1949)	68
14.29	(1950-1953) Silentaj jaroj.....	69
	(1954) Mateniĝas.....	69

14.30	1955) Denove komenciĝis Esperanta vivo	70
14.31	(1956)	70
14.32	(1957)	71
14.33	(1958)	72
14.34	(1959)	73
14.35	(1960)	75
14.36	(1961)	77
14.37	(1962)	82
14.38	(1963)	84
14.39	(1964)	86
14.40	(1965)	86
14.41	(1966)	87
	<i>Gilgameŝ</i> (K. Kalocsay).....	88
14.42	ORA DUOPO (Librokonigo de P. Balkányi)	91
14.43	(1967)	92
14.44	(1968)	92
14.45	(1969)	94
	Honore al Paŭlo Balkányi (Salutas Kalocsay)	94
14.46	(1970)	96
14.47	(1971)	98
14.48	(1972)	99
	<i>Vidu, mia Patrin'...</i> (Kantotraduko de Kalocsay)	100
14.49	(1973)	102
14.50	DEK PRELEGOJ (Librokonigo de István Nagy).....	103
UZITAJ MALLONGIGOJ.....		105
INDEKSO DE PERSONOJ.....		106
ENHAVO		112

ANTAŬPAROLO
Al la sepa volumo
1912-1976

La cirkonstancoj dum la E-agado de Kalocsay ne ĉiam favoris al la movado, ĉar en ĉi tiu epoko abundis politikaj okazintaĵoj kaj ŝanĝoj en Hungario: reĝa potenco, proleta diktaturo, poste jaroj de revenĝo (ankaŭ la Esperanta movado estis nemalmule suspektata), regado de la hungaraj faŝistoj, "popola demokracio", malvarma milito, subpremita revolucio en 1956 — ĉiuj kun siaj ideologioj kaj potencoj, eĉ se ne paroli pri la du mondmilitoj.

Feliĉe Esperanto en Hungario transvivis ĉiun tempeston, ĉar fervoraj laboristoj de la movado vivtenis ĝin. Omaĝe ankaŭ al iliaj memoroj.

La indikoj ĉi tiu materialo — krom miaj propraj rememoroj — estas ĉerpitaj el la tiutempaj gazetoj kaj el la skribaj rememoroj de la karmemora Paŭlo Balkányi. Mi ŝuldas al li apartan dankon pro la raraj fotoj. El la represitaj salut-poemoj de Kalocsay kvar pecoj estas malpli konataj, ĉar ili ne aperis en volumo. Nome: *Stelo super la Wawel* (1931), *La kapitan' en Berno* (1933), *Al la Eŭkaristia Kongreso* (1938), *Kongresa saluto — Bern* (1947).

En la serio de OMAĜE ĝis nun aperintaj volumoj:

EL ABAÚJSZÁNTÓ ĜIS LA ESPERANTA PARNASO. Parto de ampleksa biografia kompilaĵo. Kun fotoj, desegnaĵoj, reproduktoj. 1998. 143 p.

POETO DE LA INTERNACIA LINGVO. Prezento de Kalocsay kiel poeto kun alfabetaj indekso de ĉiuj liaj poemoj kaj tradukoj al diversaj lingvoj kun aperfontoj kaj klarigaj piednotoj 1999. 110 p.

TRADUKINTO DE LA INTERNACIA LINGVO. Kalocsay la poemtradukanto. Ampleksa bibliografia kompilaĵo. 2000. 153 p.

LA PROZA VERKISTO KAJ TRADUKINTO. Ampleksa bibliografia kompilaĵo en alfabetaj indekso. 2000. 75 p.

LA LINGVISTO KAJ GRAMATIKISTO. Historio de la diskutoj pri *neologismo*, ĝusta uzado de la *pasivaj participoj*, la *Esperanta vortfarado*, *ktp.* kun multaj indikoj kaj citaĵoj. 2001. 112 p.

LA REDAKTORO. LITERATURA MONDO — BUDAPEŝTA SKOLO. Kun portretoj de la stabo de fama revuo. 2001. 77 p.

La aplikata dekuma sistemo en ĉiuj volumoj estas samaj. Por gardi la kontinuecon la piednotoj estas numeritaj sinsekve sen interrompo.

Budapest 2002

Ada CSISZÁR